Poezia Postrikolto

Francisko Valdomiro Lorenz

kompilis
Miĥaelo Bento

Eldonejo
Terutero

Poezia Postrikolto

Poezia Postrikolto

tradukis, mediumis, verkis
Francisko Valdomiro Lorenz

kompilis
Miĥaelo Bento



Portalegro, Junio 2026

Poezia Postrikolto

Francisko Valdomiro Lorenz

kolekto de poemoj en Esperanto, Ido kaj Volapuko
tradukitaj, mediumaj, originalaj

Kompilo: Miĥaelo Bento

Kovrila ŝablono: Raissa Lizieri

Eldonejo Terutero
eldonejo.terutero@gmail.com
eldonejoterutero.blogspot.com

1-a eldono
PDF-forma, senpaga

Porto Alegre, Junio 2026

L869p
Lorenz, Francisco Valdomiro, 1872-1957
Poezia Postrikolto / tradukis, mediumis, verkis Francisko Valdomiro Lorenz; kompilis Miĥaelo Bento. – 1-a eld. -- Portalegro: Terutero, 2026.
337 p. — PDF-libro.

ISBN: 978-65-975688-0-2

1. Esperanta literaturo: Poezio. 2. Ida literaturo: Poezio.
3. Volapuka literaturo: Poezio. I. Bento, Miguel Rocha, 1997-

Kataloga slipo ellaborita de Eugenio Hansen — CRB–10/1419

Enhavtabelo

Antaŭparolo.....15

Tradukitaj Poemoj en Esperanto

El la angla

Henry Longfellow (1807–1882)

La Sonĝo de la Sklavo.....27

Samuel Lover (1797–1868)

Kiel eliri el embaraso.....30

Thomas Moore (1779–1852)

Velkas ĉiu bril' (kanto).....32

William Wordsworth (1770–1850)

Ni estas sep.....34

El la antikva greka, tra la franca, tra la portugala

Oraj Versoj de Pitagoro.....38

El la araba

Proverboj.....42

Ŝanĝita Sorto (egipta popolkanto).....42

El la armena

Plendo de Malfeliĉulo (popolkanto).....43

El la bengala, tra la angla

Rabindranath Tagore (1861–1941)

Al Dio.....44

El la bulgara

La interna Kristo parolas (el la gazeto “Bratstvo”).....46

El la ĉeĥa

Birdeto kaj Knabino (popolkanto).....47

Karel Havlíček Borovský (1821–1856)

Eterna estas la vivo.....48

Svatopluk Čech (1846–1908)

Ho, ne ploru! (Ekvojaĝo de fianĉiĝinta laboristo).....50

Adolf Červinka (1875–1936)

Himno al la Vivo.....52

Boleslav Jablonský (1813–1881)
La Libro de l' Naturo....54
Eliška Krásnohorská (1847–1926)
Printempo kaj Amo....55
Jan Evangelista Nečas (1849–1919)
La Forto de la Vorto....56
Josef Sládek (1845–1912)
La vivo al mi venis....57
Ervín Špindler (1843–1918)
La Amo....59
Josef Kajetán Tyl (1808–1856)
Kde domov můj? (Bohema kanto nacia)....60
Kje dom' al mi? (Bohema kanto nacja)....61
El la ĉina
Ĉina popola kanto....62
El la ĉina, tra la angla
Li Tai Po (ĉ. 701 – 762)
Senfina Angoro....63
El la eŭska
Kanto de Altabiskar....64
El la franca
Victor Hugo (1802–1885)
El la poemo "La Preĝo pro Ĉiuj"....67
Paul Verlaine (1844–1896)
Plendo de l' Malliberulo....70
La Aŭtuno....71
El la germana
Theodor Fontane (1819–1898)
Konsolo....72
Johann Wolfgang von Goethe (1749–1832)
La Ranoj....73
El la hispana
Sankta Tereza de Ávila (1515–1582)
Amo al Dio....74

Ismael Enrique Arciniegas (1865–1938)
La Kaciko Ĉanĉón....75
Senmorteco....76
José Asunción Silva (1865–1896)
Rido kaj Ploro....78
El la hungara
Sándor Petőfi (1823–1849)
El la libro “Nuboj”....79
El la irlanda
El “Kahlino de Kluha”....81
El la itala
Giosuè Carducci (1835–1907)
Por Instituto de Blinduloj....82
Vintra Tedo....83
Antonio Scalvini (1835–1881) kaj Carlo d'Ormeville (1840–1924)
Balado de l' Guaraní....84
El la japana
Printempa Vento (kanto)....86
El la keĉua
Ĉiutaga Preĝo de l' Inkao....87
Peruana Serenado....87
El Latino
Publius Ovidius Naso (43 a.K. – ĉ. 17 p.K.)
Ariono kaj Delfeno....88
La Kvar Mond-Aĝoj....89
El la latva
Orfoj (popolkanto)....92
El la nederlanda
Isaäc da Costa (1798–1860)
La Erao de l' Vaporo....93
El la norvega
Bjørnstjerne Bjørnson (1832–1910)
Norvega Nacia Himno....94
El la palia
La Propra Memo (el la 12-a ĉapitro de “Dhammapadam”)....96

Vera Propraĵo (el “Samjúta-nikájo”).....97
El la persa
Ferîd-ud-dîn 'Attâr (ĉ. 1145 – ĉ. 1221)
Honesteco.....98
El la pola
Adam Asnyk (1838–1897)
La Feliĉo.....99
El la portugala
Djalma Andrade (1892–1975)
Ago de Karito.....101
Humileco.....102
Mater Admirabilis.....103
Rezigno.....104
Virino Glora.....105
Olavo Bilac (1865–1918)
Maljunaj Arboj.....106
La Rivero.....107
Didi Câmara Cardoso
Muziko.....110
Vicente de Carvalho (1866–1924)
Lasu min, ho rivereto!.....111
Antônio Frederico de Castro Alves (1847–1871)
La Negrista Ŝipo.....113
Manuel Batista Cepelos (1872–1915)
En Grekujo.....122
João da Cruz e Sousa (1861–1898)
Karcero de l' Animoj.....124
Rido.....125
La Steloj.....126
Joaquim Osório Duque-Estrada (1870–1927)
Brazila Nacia Himno.....127
Odegar Dy
Maria.....130
Afonso Celso de Assis Figueiredo Júnior (1860–1938)
Ĝojoj.....131

Abel Gomes (1876–1934)
Hirundetoj....132
La Kredo....133
Ni havas Jesuon....134
Ricardo Gonçalves (1883–1916)
Malnova Bieno....135
Antônio Gonçalves Dias (1823–1864)
La Tempesto....137
Sebastião Gonçalves Leite (1881–1952)
Al Martins Fontes....144
La Sola Floro....145
Carlos de Laet (1847–1927)
Malĝoja Filozofio....146
Antônio Eliezer Leal de Souza (1880–1948)
Kristo....147
Pluva Tago....148
Arlindo Castor de Lima (1917–2007)
Demandoj....149
Joaquim Maria Machado de Assis (1839–1908)
La Floroj kaj Pinoj....150
José Martins Fontes (1884–1937)
Al mia Patro....151
Arabesko....152
En la Ĝardeno de l' Poetoj....153
Parolado de Sankta Francisko de Assisi al la Hirundoj....155
Penso de Floro....156
Saŭdado — Floro de l' Foreco....157
Sonĝo pri Donado....159
La Vizaĝo de Mia Filo....160
Gregório de Matos (1636–1696)
La belulin', ke Dio....162
Othoniel Menezes (1895–1969)
Per Angusta (Per Klopodoj)....163
La Plej Granda Ordono....164
Poeto....165

Alberto de Oliveira (1857–1937)
Al la Foririntino....166
La Batado de l' Kradopordo....168
Antônio Sales (1868–1940)
La Rivereto kaj la Inundo....170
Guaracy Silveira (1893–1953)
Himno de la Granberjanoj....173
Auta de Souza (1876–1901)
Agonio de l' Koro....175
Pedro Velho (1879–1919)
Águas Passadas....176
El la provenca
Arnaut de Mareuil (fl. fine de la 12-a jarcento)
Printempa Kanto....177
El la rumana
Vasile Alecsandri (1821–1890)
Rodika....178
El la rusa
Gavríl Derĵavin (1743–1816)
Odo pri la morto de la princo Meŝĉerski....179
Alekséj Kolcóv (1809–1842)
Cerbumo de Malriĉa Kamparano....183
Kanto de l' Plugisto....184
Iván Krylóv (1769–1844)
La Simio kaj la Okulvitroj....186
Aleksándr Puŝkin (1799–1837)
La Ĥo....188
Fjodor Tjutĉev (1803–1873)
Noktaj Voĉoj....189
Fjodor Tumanskij (ĉ. 1800 – 1853)
Birdeto....190
El Sanskrito
Kiel Nalo svatis Damajantin (el "Mahâbhârata")....191

El la slovaka
Svetozár Hurban-Vajanský (1847–1916)
Kanto de l' Horloĝo....194
El la sveda
Esaias Tegnér (1782–1846)
La Eterno (kio estas eterna)....196
El la tupia
Kanto ĉe Plenluno....198
El la ukraina
Iván Kotljarevskyj (1769–1838)
La Sonĝo....199
Mediumaj Poemoj en Esperanto
João da Cruz e Sousa
Pri la Preĝoj....203
Malĝoja Gloro....204
Ĉu ĉio pasas?....205
Du Testamentoj....206
Astralaj Karceroj....207
En Kaĝo....208
Voko de l' Spiritoj....209
Eterna Nutraĵo....210
La Evolua Ŝtuparo....211
Teodoro A. Dolejŝ
Fortenhavaj Vortoj....212
Grava Leciono....213
Homara Progreso....214
Pri Malamikoj....215
Ne juĝu!....216
Ne semu malkonkordojn....217
Venku la tentojn!....218
Dispelu la nubojn!....219
Tentoj en la Astrala Mondo....220
Gardu vin!....222
Ne koleru!....223
Ideoj kaj Pensoj....224

Nescio de Saĝulo....225
Ŝatu ĉian vivon....227
El Miaj Surteraj Rememoroj....228
I — Pri l' Anĝeloj....228
II — Pri Dio....229
III — Dio helpas la kredantojn....231
IV — Resanigo....232
V — Saĝa Postulo....233
Pri Iu Edza Paro....236
Paskaj Pripensoj....238
Profitita Konsilo....239
Abel Gomes
La Celo de la Surtera Vivo....241
Diversaj Oferoj....242
Ne malbenu la suferon!....243
Ne forpelu verajn ĝojojn!....244
Kiam mi ne kredis....245
Kiam mi ekkredis....246
Pri la Dia Justeco....247
Atentu la finon!....248
La pensoj estas fortoj....249
Rememoroj kaj la Nuno....250
Hirundetoj....252
Miaj Rememoroj....253
Ne miru!....254
Tri Grandaj Virtoj....255
Venku la pesimismon!....256
Avarulo....257
Mallaboremuloj....260
Memmortiginto....263
Trompistoj....265
Morto de Justulo....267
La avarulo pentas....269
Kaŝitaj Perloj....271
Ni laboru!....273

Laŭdu ni Dion....274
Antoni Grabowski
Rekonstruo....275
Sonas sonoriloj....277
Nobla Batalo....278
La Celo de l' Evoluo....279
Stanislav Schulhof
Ni danku al Dio!....280
Orfino....281
Kiam mi vidas....282
Ofte mi vidis....283
Akvo kaj Vino....284
Viva Akvo....285
Trankviliĝu!....286
Kie estas Dio?....287
L. L. Zamenhof
La paco proksimiĝas....288
Ne forgesu!....289
Estu optimistoj!....290
Kredo Racia....291
Originalaj Poemoj en Esperanto
La vivo estas bela....295
Ne ekzistas sur la tero....295
La nobla homo ĉiam....296
Novjara Saluto 1943....297
Al la Novjaro 1944....298
Al la Novjaro 1945a....299
Al la Deka Brazila Kongreso de Esperanto....300
Al la Novjaro 1946a....304
Dum miaj sepdek kaj kvar jaroj....305
Al la Ĵurnaleto *Suda Stelo*....306
Al la Dekdua Brazila Kongreso de Esperanto....307
Kristnaska Donaco (Teatraĵeto)....309
Patro Nia....312
Laŭdo al Dio....314

Venu la Regno de Dio!.....316
Koncentriĝo.....317
Miaj Saŭdadoj.....318
Al la Dekkvara Brazila Kongreso de Esperanto.....319
Tradukita Poemo en Ido
El la portugala
Casimiro de Abreu (1839–1860)
Mea Ok Yari.....323
Originala Poemo en Ido
Du Astri.....329
Tradukitaj Poemoj en Volapuko
El la germana
Friedrich Beck (1809–1888)
Klem.....333
El la rusa
Miĥaíl Lérmontov (1814–1841)
Plek.....335
El la slovaka
Glorakanit. (Netakanit slovakik).....337

Antaŭparolo

Kun granda ĝojo mi prezentas al la publiko la unuan libron de la nun fondata Eldonejo Terutero!

La publikigo de pli ol 300-paĝa posteuma poemaro, jardekojn post la forpaso de Francisko Valdomiro Lorenz, necesigas kelkajn klarigojn miaflankajn. Estas fakte multo por diri, sed mi strebos al koncizo, skribante laŭ temoj.

Estiĝo

Antaŭ kelkaj jaroj, foliumante la skanaĵojn de la fruaj numeroj de *Rio Esperantista*, mi rimarkis la eneston de kelkaj tradukaĵoj de Lorenz kiuj ŝajnis plene forgesitaj. Restis en mia tirkesto la projekto iam kolekti kaj republikigi ilin.

La temo reviviĝis en mia kapo iam poste, dum reta kunsido de reprezentantoj de ŝtataj Esperanto-asocioj el Brazilo. Tiam Diogo Chicatto rakontis ke Jandira Lorenz, konata artisto kaj emerita docento, nepino de F. V. Lorenz, ankoraŭ konservas en sia hejmo kelkajn paperaĵojn de la avo — nemultajn sed tre interesajn.

Fine mi decidis vojaĝi al Florianópolis por interalie viziti ŝin kaj konsulti tiun materialon; Diogo kaj lia familio afable gastigis min. Raporto de tiu vojaĝo aperis en la revuo *Posta Mundi* (n-ro 44, jun/2024).

Ĉe Jandira mi povis konstati, ke granda parto de la paperaĵoj konsistas el apenaŭ aŭ tute ne konataj poemoj. Aldone, mallonge antaŭe mi eltrovis multajn forgesitajn versaĵojn de Lorenz en la revuo *Pernambuco Esperantista* (dum volontulado en Biblioteko Carlos Domingues, de Brazila

Esperanto-Ligo). Kaj jam atendis republikigon aliaj poemoj, kiujn mi estis trovinta en Biblioteko Ary Zamora, de Gaŭĉa Esperanto-Asocio. Tute nature, do, konturiĝis la ideo eldoni la nunan kolekton.

Celo

La celo de ĉi tiu kompilo estas simpla: arigi ĉiujn planlingvajn poemojn de Lorenz — originalajn, mediumajn, tradukitajn — kiuj ne troviĝas en liaj kvar bone konataj kaj ankoraŭ facile akireblaj poemlibroj (*Diverskolora Bukedeto*, *Bhagavad-Gîtâ*, *Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo* kaj *Brazila Antologio Poezia*).

Mi klopodis ke la libro estu kiel eble plej kompleta, sed verŝajne ankoraŭ pliaj poemoj plu kaŝiĝas en arkivoj kaj en obskuraj bultenoj. Ankaŭ eblas, ke mi ion pretervidis en la traerpitaj periodaĵoj. Se vi elfosis ion, kio troviĝas nek ĉi tie, nek en la kvar menciitaj libroj, bonvolu sciigi min — via helpo estas tre bonvena! Eventuale malkovrotaj poeziaĵoj aperos en nova(j) eldono(j); intertempe ankaŭ en la retejo de Eldonejo Terutero.

Helpo estas bonvena ankaŭ pri aliaj detaloj. Ekzemple, supozeble almenaŭ en kelkaj kazoj eblus elspuri la aŭtorojn de la popolkantoj, kaj certe por pluraj pecoj eblas trovi pliajn aliaŭtorajn esperantigojn (mi mencias ilin piednote). Kompreneble mi iam devis meti finon al mia esplorlaboro, almenaŭ provizoran, ĉar alie la libro neniam aperus!

Fontoj

Krom la paperaĵoj de Jandira, la ĉefaj fontoj estas la periodaĵoj *Reformador*, *Pernambuco Esperantista*, *Brazila Esperantisto* (kiu dum kelka tempo aperis sub la titolo *O Brasil Esperantista*) kaj *Rio Esperantista*. Tamen plurajn disajn erojn mi plukis el aliaj fontoj — ĉio estas notita fine de ĉiu poemo.

La verkoj kiuj konsistigas la nunan kolekton estis grandparte forgesitaj de la publiko, sed ekzistas esceptoj. Precipe la mediumaj poemoj aperintaj en *Reformador* restis atentataj de kelkaj spiritistoj, ekzemple Aymoré Vaz Pinto, kiu republikigis plurajn en la periodaĵo *Komunikoj*. Cetere, en *Reformador* la originalojn akompanadis prozaj portugallingvaj tradukoj de Ismael Gomes Braga, kaj kelkfoje ankaŭ komentoj. Mi ne reproduktis ilin ĉi tie, sed ili supozeble interesos la spiritistojn. Tamen Braga neniam konkretigis la ideon lanĉi duan volumon de *Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo* (*Reformador*, feb/1945), kvankam ne mankis materialo por tio.

Ekzistis ankaŭ intenco publikigi duan volumon (aŭ duan, pligrandigitan eldonon) de *Diverskolora Bukedeto*. En unu el la tajpaĵoj el la arkivo de Jandira legeblas la indiko — *Por Dua Bukedeto*. En letero publikigita en *Esperantista* (jan/1948) Lorenz deklaris: "*Mi tradukis jam ĉirkaŭ 200 novajn poemojn kaj poemetojn el 44 lingvoj, sed mi ne scias kiam ili aperos en libroformo, ĉar mia eldoninto estas malsana*.".

Waldomiro Lorenz, filo de F. V. Lorenz, fotokopiadis diversajn verkojn de la patro kaj disdonadis ilin al bibliotekoj kaj al interesatoj. En liaj fotokopioj de *Diverskolora Bukedeto* (ekzempleroj troviĝas en Biblioteko Ary Zamora kaj en la Municipa Biblioteko de Dom Feliciano) legeblas la jena noto

[sic]: *“La dua eldono mustas aperi kun poemoj kaj poemetoj tradukitaj el 100 lingvoj, kiuj verkoj jam estis liveris al eldonisto. WL.”*. Ŝajne do Waldomiro kolektis la tradukaĵojn kaj sendis ilin al eldonejo — sed al kiu eldonejo? Tiu projekto ne konkretiĝis, kaj mi (ankoraŭ?) ne retrovis tiun materialon. Mi tamen dubas, ĉu vere temis pri 100 lingvoj. Eble Waldomiro konfuziĝis — Lorenz ja tradukis biblian versiklon (Joh 3,16) al 100 lingvoj (aŭ ĉu li eble nur kolektis tiujn tradukojn?).

Mediumaj poemoj

Tiu kategorio de poemoj certe mirigos tiujn, kiuj neniam antaŭe aŭdis pri la temo. Resume: kelkaj homoj kredas ke spiritoj de forpasintoj povas dikti, aŭ alimaniere komuniki, poemojn kaj alispecajn tekstojn al vivantaj homoj, la tiel nomataj *mediumoj*, kiuj do en tiuj okazoj ne mem verkas, sed nur transskribas. Jen kiel Ismael Gomes Braga klarigis la aferon en la antaŭparolo de la libro *Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo* (FEB: 1987 (2-a eld.), paĝo 14):

> *Nu, nia respektinda samideano prof. Francisco Valdomiro Lorenz estas mem poeto kaj mediumo por spiritaj poetoj. Kiam li mem verkas poezion, li pensas, kalkulas silabojn, elektas rimojn, ŝanĝas verson tie ĉi, elektas sinonimon tie, malfermas kaj refermas vortarojn, en longa kaj pacienca laborado kaj pripensado. En la morgaŭa tago, li retralegas atente la poemon kaj repoluras ĝin. En la tria tago li enpoŝtigas ĝin; sed post kvar tagoj li hazarde relegas la kopiaĵon de la sendita poemo kaj trovas ion nebona. Li tuj skribas leteron al la eldononto, kaj ordonas novan ŝanĝon.*
>
> *Sed kiam li skribas kiel mediumo, li ne pensas, lia cerbo ne laboras, li nur aŭskultas kaj aŭdas la versojn, unu post alia, en malrapida diktado, kaj fine li aŭdas la nomon de la poeto. Li nenion*

kalkulas, nenion mezuras, nenion elektas nek poluras. Do, li neniam povus konfuzi sian propran verkadon kun la verko de la Spiritoj, mediumece ricevita. Tian klarigon li donis al mi en leteroj kaj li legis tiun ĉi antaŭklarigon kaj ĝin konfirmis per malgrandaj korektoj.

Disponeblas en Esperanto multe da materialo por tiuj, kiuj deziras pli da informoj pri la afero. Unuavice oni povas sin turni ĝuste al la cetero de tiu teksto de Braga.

Mi tamen konfesu, ke mi mem ne estas spiritisto kaj tute ne kredas je la "astrala" deveno de tiuj verkoj. Sed mi tute ne dubas, ke Lorenz sincere kredis je tio, kaj do, respekte al la spiritistoj, kaj precipe al Lorenz mem, mi ne miksis la mediumajn poemojn kun la originalaj, publikigitaj sub lia nomo. Aliflanke, mi rezervis al mi la rajton ne reprodukti ĉi tie verkojn atribuitajn al la spirito de Lorenz, ricevitajn de aliaj mediumoj (plej notinde Porto Carreiro Neto).

La poetiko de Lorenz

En Brazilo Lorenz estas figuro kultata de la esperantistoj kaj de la spiritistoj: poligloto studinta dekojn da lingvoj (la enhavtabelo de ĉi tiu libro klare ilustras tion!), legenda mediumo kaj popolkuracisto, verkisto produktinta dekojn da libroj, originalaj kaj tradukitaj, pri multaj diversaj temoj... malgraŭ la modesta vivo kiel bazlerneja, vilaĝa instruisto. Li ja meritas siajn laŭrojn kaj la laŭdojn kiujn li ricevadis kaj plu ricevadas, de la tekstoj de Ismael Gomes Braga ĝis nun.

Tamen Lorenz estis, same kiel ni ĉiuj, neperfekta homo. Ĉe senpartia analizo de lia poezia verkaro, pluraj kritikeblaj

punktoj riveliĝas: eluzitaj rimoj, tro libera vortordo, naiveco, troa ripetemo, ĝenerala malaltigo de la poezia nivelo ĉe la tradukoj ktp. (pli ampleksan komentarion mi lasas al la fakuloj!). Ĉiuokaze, la nivelo de la nuna kolekto ne multe diferencas de tiu de la kvar bone konataj poemaroj, do certe ankaŭ ĝi trovos legantaron kaj ĝin ĝuigos!

Aliaj planlingvoj

Lorenz okupiĝis ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri aliaj planlingvoj, kaj eĉ skizis tri proprajn lingvoprojektojn (*Reform-Esperanto*, *Mundial* kaj propran Volapuk-reformon). Mia prelego *La planlingva itinero de Francisko Valdomiro Lorenz*, spektebla ĉe YouTube, pritraktas la temon (sed iam mi preparos novan studon pri tio, ĉar intertempe mi malkovris plurajn pliajn informojn).

Ĝis nun estis retrovitaj nur du poemoj de Lorenz en Ido, sed pri lia poezia agado en Volapuko ekzistas pli da spuroj. Estas sciate ke li tradukis, interalie, versaĵojn el la ĉeĥa (inkluzive de la manuskriptoj *Zelenohorský* (plene) kaj *Královédvorský* (parte)) kaj la poemon *Odo pri Dio*, de la ruso Derĵavin. Krome, Lorenz poeziis en Volapuko ankaŭ originale.[1] [2] Li eĉ ricevis de Schleyer mem la titolon *poedan* (poeto) (*Volapükabled zenodik*, jul/1889)! Tamen, ŝajnas ke tiuj

1 NOVOBILSKÝ, Vlastimil. **Francisko Valdomiro Lorenz - atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo.** Trad. Margit Turková. KAVA-PECH, 2017; paĝo 30 [la koncerna fragmento estas el membiografieto de Lorenz]

2 Letero de F. V. Lorenz al F. Schaden (02/03/1947). En *Leteroj de Niaj Pioniroj*, ĉapitro de **Esperanto – Baza Kurso**, de Marco Antônio Ferreira Teixeira (UFSC, 2005); paĝo 264.

poemoj ne estis publikigitaj, sed nur senditaj al Schleyer — kaj bedaŭrinde perdiĝis!

Lorenz aldone rakontis, en la menciita letero al F. Schaden, ke siatempe li sendis versaĵojn al la *Volapükagased* de Moritz Obhlidal. Tiu periodaĵo troviĝas en la bita kolekto de la Bavara Ŝtata Biblioteko, sed mia foliumado ne alportis fruktojn. En tiu kolekto tamen mankas preskaŭ ĉiuj numeroj de la jaro 1890: eventualaj versaĵoj tie kaŝitaj devos atendi la venontan eldonon de ĉi tiu libro.

Jaroslav Mařík[3] atribuas volapukan version de *Kde domov můj?* al Lorenz, sed tio ŝajne estas fuŝo, ĉar en *Literat Volapükik* (Iparraguirre, 1887) tiu traduko estas atribuita al Jan Nečas.

Ĝis la lasta minuto ŝajnis do ke, malgraŭ la diversaj spuroj, ĉi tiu libro povos enhavi neniun volapukan poemon. Tio tamen ŝanĝiĝis kiam en Biblioteko Carlos Domingues mi tute hazarde trovis, ene de volapuka libreto, folion iam deŝiritan el numero de la revuo *Volapükan Belgänik* — enhavantan tri poemojn tradukitajn de Lorenz! Ne nur: jardekojn poste Lorenz krajone alnotis, por du el la tri poemoj, novan tradukon, adapton al la "moderna" Volapuko, reformita de Arie de Jong (kiun Lorenz tamen ne vere ŝatis, kaj malpli bone regis). Tiu folieto, kiun oni poste donacis al mi, estas la fonto de la tri volapukaj tradukoj ĉi tie troviĝantaj.

Eventualaj poeziaĵoj de Lorenz en aliaj planlingvoj ankoraŭ ne estis trovitaj.

---

3 MAŘÍK, Jaroslav. **Francisco Valdomiro Lorenz (1872-1957) - la duobla pioniro.** En *Menade bal püki bal – festlibro por la 50a naskiĝ-tago de Reinhard Haupenthal* (Iltis, 1998); paĝo 187.

Redaktokriterioj

Kiel eldonanto mi ĉiam preferas tuŝi kiel eble malplej multe la originalojn, sed ĉe tiel diversa materialo necesas kelkaj intervenoj. Mi provis konsekvencigi la uzadon de majuskloj, kaj mi disigis kelkajn vortojn kiuj estis strange ligitaj per streko (*ajn-ies→ajn ies*; *ne-tro→ne tro* ktp.). Mi iom modifis la sistemon de Lorenz por transskribi rusajn kaj ukrainajn nomojn, provante konsekvencigi ĝin. La lingvojn mi nomis laŭ miaj preferoj (ekz. *baska→eŭska*; *provencala→provenca*). Kaj kiam la sama teksto estis trovebla en pli ol unu fonto, mi zorge komparis ilin: mi tiel elsarkis kelkajn koboldetojn kaj atentis la kelkfojajn malgrandajn diferencojn (ĉefe interpunkciajn), provante alveni al kiel eble plej taŭga versio.

La originaloj enhavas ankaŭ kelkajn lingvajn erarojn, kelkajn dubindaĵojn kaj kelkajn eble iom troajn licencojn. Kiam la eraroj estis nur unuliteraj, plej verŝajne kaŭzitaj de nura kompost-miso, mi senplie ilin korektis. Kiam la eraroj ne estas tiaj, sed ne vere ĝenas la komprenon, mi signis ilin per °. Kaj, kiam tio necesis, mi aldonis koncizan klarigan piednoton. Sed multon mi allasis al la legantoj, ĉar mi ne volis polui la libron per senfinaj piednotoj!

Povas esti, ke enŝteliĝis tajperaroj miaflankaj: mi strebis eviti ilin, sed ja neniu alia provlegis la libron! Atentigoj pri tiaj eraroj estas tre bonvenaj — volontulaj provlegantoj des pli!

Kopirajtoj

La verkaro de Lorenz ankoraŭ ne iĝis publika havaĵo en Brazilo: tio okazos nur la 1-an de Januaro 2028. Kiam

kopirajton de iu verko ne havas iu eldonejo, ĝin havas la heredantoj de Lorenz — tiu ĉi estas la stato de la poemoj nepublikigitaj aŭ aperintaj nur en periodaĵoj. Sed la posteularo de Lorenz estas tre multnombra, kaj ne ekzistas formala mastrumado de liaj aŭtorrajtoj flanke de la familio.

Jandira Lorenz diris al mi ke ŝi konsideras la verkaron de la avo jam publika havaĵo, kaj ke same agas ĉiuj familianoj kiujn ŝi konas. Precize la samon diris al mi Fernando Lorenz, honora konsulo de Ĉeĥio en Porto Alegre kaj pranepo de F. V. Lorenz. Ĉi tiu eldono krome estas tute neprofitcela: la PDF-versio estas senpaga, kaj la papera estas vendata je kostoprezo.

En la traduka parto troviĝas ankaŭ poemoj de kelkaj malmultaj poetoj, kies verkoj ankoraŭ ne iĝis publika havaĵo. Ili tamen estas tiel malmultaj ke tiuj pecoj, fronte al la cetero de la libro, povas esti konsiderataj kiel simplaj specimenoj.

Ekzistas ankaŭ la aŭtorrajtoj rilataj al mia kompila laboro — oni ne piratu ĝin, ĝi ja jam estas disponebla senpage!

Dankoj

Mian plej koran dankon al: **Jandira Lorenz**, kiu afable akceptis min en sia hejmo kaj permesis al mi konsulti ŝian arkivon; **la familio Lorenz**, kiu grandanime konsideras la verkaron de F. V. Lorenz jam publika havaĵo; **Diogo Chicatto**, kiu peris la kontakton kun Jandira, kaj kun sia familio gastigis min en Florianópolis; **Néia Lúcia Souza**, multjara ĉefrespondeculo de la nemalhavebla Biblioteko Carlos Domingues; **Fabrício Valle**, kiu bonvolis rekontroli la kolekton de *Pernambuco Esperantista*, kiam miaj iom haste faritaj notoj montriĝis ne tute fidindaj; Fabrício Valle kaj **Evandro Avellar**, kiuj skanis

multajn numerojn de *Brazila Esperantisto*; **Allan Argolo**, kiu skanis la fruajn numerojn de *Rio Esperantista*; **Leandro Abrahão** kaj **Paulo Cesar Pires**, kiuj respektive retrovis kaj retajpis la poemojn atribuitajn al la spirito de Abel Gomes, kaj afable sendis la rezulton al mi; **Gonçalo Neves**, kiu helpis min pri kelkaj tiklaj punktoj en la originaloj; Gonçalo Neves kaj **Partaka**, kiuj antaŭ kelkaj jaroj helpis min pri la poemo *Mea Ok Yari*, kiam mia Ido-kono estis ankoraŭ magra; **Hermann Philipps**, la nuna ĉifalo, kiu akribie prinotis la volapukajn poemojn; **Roland Rotsaert** (de **Internacia Esperanto-Arkivo**), kiu retrovis la numeron de *Volapükan Belgänik* en kiu aperis poemoj de Lorenz; **Aŭstria Nacia Biblioteko**, **Brazila Spiritisma Federacio** kaj **Katolika Universitato de Lublin**, kies bitaj kolektoj estis nepraj dum miaj esploroj; **NPH/UFRGS** (Núcleo de Pesquisa em História da Universidade Federal do Rio Grande do Sul), kies mikrofilman kolekton de la ĵurnalo *Correio do Povo* mi konsultis.

Miĥaelo Bento
Porto Alegre, Majo 2026

Tradukitaj Poemoj en Esperanto

El la angla

Henry Longfellow
(1807–1882)

La Sonĝo de la Sklavo

Li kuŝis ĉe l' nerikoltita rizo,
kun serpo en la nigra mano;
la brusto estis nuda; sur la sablo
la stupharar' de afrikano.
En sonĝa ombro al li reaperis
nun lia naskoland' kun klano.

De liaj sonĝoj tra l' pejzaĝo vasta
majesta, forta Niger fluis;
li ofte ĝin trapaŝis, kiam sian
liberon kiel reĝ' li ĝuis,
kaj aŭdis kiel sur la monta vojo
de l' karavanoj tintoj bruis.

Revidis li reĝinon sian karan,
ridantan inter la infanoj;
brakumis ili lin kaj kisis kore,
tenante lin per siaj manoj;
kaj en la sablon falis larmo, kiun
elverŝas la palpebraj kranoj.

Kaj tiam rapidege li rajdadis
de Niger sur la bordo glita,
kaj lia brido estis ora ĉeno,
kaj tintis lia ŝtal' milita,
kaj saltis, stimulata per la sprono,
ĉevalo lia bonkvalita.

Fenikopteroj, kvazaŭ ruĝa flago,
fuĝadis antaŭ li en klaro,
kaj de la birdoj fuĝon li sekvadis
sur kampoj de tamarindaro,
ĝis °kiam al li la domaĉoj kafraj
aperis, kaj la granda maro.

Li nokte aŭdis de l' leono muĝon,
de la hieno kun bruado
kaj de l' hipopotam', tretanta kanojn
sur riverbord', ĉe ĝia vado;
kaj tio ŝajnis voĉo de tamburo
triumfa, lia dum sonĝado.

L' arbaroj per sennombraj siaj langoj
vivuon kriis al libero,
kaj ĝin vivuis tiel fortavoĉe
de la dezerto la aero,
ke ridetante en dormad' ekstaris
la homo plena de sufero.

Ne sentis li de l' inspektist' la vipon,
nek l' ardon, kiun Suno ĵetis,

ĉar Mort' lumigis lian sonĝolandon
kaj la senviva korp' kvietis,
katen' kaduka, kiun la animo
disrompis kaj de si formetis.

Reformador, jan/1945

Samuel Lover
(1797–1868)

Kiel eliri el embaraso

— Amata Maria, mi vian patrinon
demandos, — mi diras.
“Ho, vi ne parolu kun ŝi,” jen respondas
Mari' kaj sopiras;
“ĉar panjo diradas, ke viroj trompadas;
mi scias, ke panjo neniam konsentos;
ŝi diras: se urĝe knabin' edziniĝas
ŝi poste repentos.”

— Amata Maria, mi vian do patron
demandos, — mi diras.
“Ho, vi ne parolu kun li,” jen respondas
Mari', kaj sopiras;
“ĉar mia patreto min amas tre kore,
ke mi lin forlasu, neniam li volos;
se vi lin demandos, nur ‘Ne’ li respondos
kaj vin malkonsolos.”

— Amata Maria, — mi diras, — mi vivon
sen vi ne toleros;
se viaj gepatroj al mi vin rifuzos,
mi morti preferos.
“Pri morto ne pensu,” ridante konsilas
l' amata knabin';
“se miaj gepatroj rifuzas, demandu
ne ilin, sed — min.”

Pernambuco Esperantista, n-ro 57–58 (apr–maj/1944)

Thomas Moore
(1779–1852)

Velkas ĉiu bril'
(kanto)

Velkas ĉiu bril',
se iĝis ĝi plej hela;
ĝojo fuĝas for,
se iĝis ĝi plej bela.

De l' lumsteloj fal',
mallonga viv' de l' floroj
estas tip' de ĉio ajn
agrabla al la koroj.

Velkas ĉiu bril',
se iĝas ĝi plej hela;
ĝojo fuĝas for,
se iĝis ĝi plej bela.

Ne valoras ĝu',
se ĝi per ve' finiĝas;
ni ne fidu al
ligil' se ĝi rompiĝas.

Mi preferas ja
en plenmallumo kuŝi,
ol vidi lumon en fuĝad'
ĉiama, sen ĝin tuŝi.

Velkas ĉiu bril',
se iĝis ĝi plej hela;
ĝojo fuĝas for,
se iĝis ĝi plej bela.

Pernambuco Esperantista, n-ro 55–56 (feb–mar/1944)
O Brasil Esperantista, n-ro 380–382 (okt–dec/1945)

William Wordsworth
(1770–1850)

Ni estas sep

Knabinon iam mi renkontis:
malriĉa ŝi, sed bela estis;
okjara — kiel ŝi rakontis,
per simplaj ŝtofoj ŝi sin vestis.

Ŝi kamparane aspektadis;
la kap' vindiĝis per harligoj,
l' okuloj belaj ridetadis
kaj ŝajnis esti gajinstigoj.

Mi ŝin demandis: "Ĉu vi havas
gefratojn? Kiom ĉiuj vi?"
Kaj ŝi informis: "Jes, vi pravas;
ni estas sep, ili kun mi."

— "Kaj kie estas la gefratoj?"
Respondis tuj la knabineto:
"Du servas sur la marboatoj,
du loĝas en la vilaĝeto.

Du kuŝas, jen, en la tombejo,
la karaj frato kaj fratino,
kaj estas la kaban' loĝejo
por mi kaj mia por patrino."[1]

— "Infano, pensu ja kun saĝo:
du fratoj servas sur boatoj,
du fratoj loĝas en vilaĝo:
ne estas vi do sep gefratoj."

— Ŝi diris: "Pensas mi kun saĝo:
ni estas sep: du sur la maro,
aliaj du en la vilaĝo,
en la tombejo unu paro."

— "Ĉi tio mian koron tuŝas,
sed vi eraras, belulin'!
Se du jam en tombejo kuŝas,
ne sep vi estas ja, sed kvin!"

1 En la versio el *Pernambuco Esperantista: kaj la kabano estas loĝejo / por mi kaj por mia patrino."*

Ŝin ne konvinkis miaj nombroj.
“Jen verdaj estas kaj proksime
je nia pord' iliaj tomboj,
kiujn rigardas mi sentime.

La ŝtrumpon ofte mi trikante,
aŭ tukon mi brodante, sidas
ĉe ili sur la grund' kaj kante
al ili pensojn mi konfidas.[2]

Kaj ofte, bela dum vetero,
post sunsubiro, simpatie
mi venas mia kun telero[3]
kaj manĝas mian supon tie.

Fratino Janjo post malsano
dolora sur la lito mortis;
ŝin vokis Di'; el la kabano
tombejon oni ŝin transportis.[4]

2 En la versio el *Pernambuco Esperantista: al ili la pensojn konfidas.*
3 En la versio el *Pernambuco Esperantista: mi venas kun mia telero*
4 En la versio el *Pernambuco Esperantista: tombejen oni ŝin transportis.*

La herboj kiam jam sekadis
pro l' forta varmo sunradia,
mi kaj la frat' Johan' ludadis
tre ĝoje ĉirkaŭ tombo ŝia.

Kaj kiam sur la neĝo glita
mi povis amuzadi min,
Johano estis forvokita,
kaj kuŝas apud la fratin'."

— "Do kiom estas vi," — mi diris,
"se du en la ĉielo estas?"
— Kaj la infano iom miris
dirante: "Ĉiam sep ni restas."

— "Sed du jam estas en ĉielo
kaj ne surtere, ho knabin'."
Sed vana estis mia streb'
pri l' nombro kvin konvinki ŝin.
Ŝi respondadis sen ŝancelo:
"Sinjor', ni tamen estas sep."

Rio Esperantista, n-ro 19 (okt/1948)
Pernambuco Esperantista, n-ro 62 (sep/1944)

El la antikva greka, tra la franca, tra la portugala[1]

Oraj Versoj de Pitagoro[2]

Preparado

Per l' akceptita kult' l' eternajn Diojn servu;
la kredon gardu; la memoron de l' herooj
bonfaraj, duondiaj spiritoj, respektu.

Purigado

Fil' bona estu, bona frato, edzo, patro;
amiko via estu ja amik' de l' virto.
Aŭdu liajn konsilojn, servu lian vivon;
neniam lin forlasu pro homo vantema.
Obeu lin, se eblas, ĉar leĝo severa
la Povon aŭ eblecon ligas kun Neceso.
Vi tamen povas lukti kaj je l' fino venki
viajn stultajn pasiojn; lernu ilin bridi.
Evitu la koleron; estu sobra, vigla
kaj ĉasta, kaj ne faru agon malbonan,
sekrete nek publike; kaj vin mem respektu.

---

1 La esperantigo de Lorenz baziĝas sur la portugallingva versio de Dario Vellozo, kiu siavice baziĝas sur la franclingva versio de Fabre d'Olivet.

2 Lorenz parafrazis la *Orajn Versojn* en la lasta peco de sia porinfana portugallingva poemaro *Ensinos Paternos* (Selbach & Mayer, nedatita (1909 aŭ 1910)).

Ne parolu nek agu antaŭ reflektado.[3]
Estu justa. Memoru ke l' plej alta Povo
ordonas morti, ke l' havaĵoj kaj honoroj
facile akiritaj facile perdiĝas.
La malbonaĵojn, kiujn la Destin' kuntrenas,
jugu sentime, ilin altenu, kaj strebu
kiom eble, mildigi la dolorajn frapojn:
eĉ al saĝul' escepton la Destin' ne faras.
L' Erar', kiel la Vero, adorantojn havas;
la filozof' prudenta laŭdas aŭ mallaŭdas,
se triumfas l' Erar', li for de ĝi atendas.
Aŭdu kaj en la kor' gravuru miajn vortojn;
al l' antaŭjuĝ' l' okulojn kaj l' orelojn fermu;
timu l' ekzemplon fremdan, pensu laŭ logiko;
konsultu kaj decidu, elektu libere.
Eĉ se l' stultuloj agas sen kaŭzo, sen celo;
vi devas en l' estanto rigardi l' estonton.
Ne volu fari, kion vi ne scias;
lernu: ĉio dependas de l' labor' kaj tempo.
Zorgu bone pri l' sano; donu, kun mezuro,
nutraĵon al la korp', al spirit' ripozon.
Evitu la troecon kaj la nesufiĉon
de l' zorgo; ĉar ekscesoj ambaŭ malutilas.
La luks' kaj l' avarec' similajn sekvojn havas;
elektu ni en[4] ĉio mezon justan, bonan.

3 *meditado, pripensado* (*reflexão* en la portugala)

4 La vorteto *en* estis aldonita de mi.

Perfekteco

Neniam al vi sonĝo fermu la palpebrojn
sen vi demandi:[5] Kion mi hodiaŭ faris?
Se estis bon', daŭrigu ĝin; malbon' ne daŭru.
Meditu pri konsiloj miaj; sekvu ilin,
kaj ili vin kondukos al la diaj virtoj.
Per tiu ĵuras mi, en koroj kiu skulptis
Tetradon sanktan, grandan la simbolon puran,
la fonton de l' Natur', modelon de la Dioj.
Sed antaŭ ĉio, via animo fidela
alvoku tiujn Diojn, kies helpo povas
nun fini la laborojn, de vi komencitajn.
De ili instruitan nenio vin trompos.
De estaĵoj malsamaj sondos vi l' esencon;
de Tuto la komencon konos vi kaj finon.
Vi scios, se l' Ĉielo volos, ke l' Naturo
similа en la aĵoj, estas sama ĉie.
Pri viaj veraj rajtoj vi priklarigite,
la koron per deziroj vanaj °vi ne nutros.
Vi vidos ke l' malbono, glutanta la homojn,
de ilia elekto estas nur la frukto;
la fonton de l' feliĉ' en si ili ignoras.
Ludiloj de l' pasioj, sur maro sen bordo,
rulĵetataj de ondoj kontraŭaj, ne povas
ili rezisti, nek al la turmento cedi.
Di' ilin savus, se Li malfermus al ili
la okulojn, sed homoj de dia la raso

5 *sen ke vi demandu*

devas l' Eraron koni kaj vidi la Veron.
La Natur' ilin servas. Vi, ĝin penetrinte,
en la haven' ripozu, saĝa hom' feliĉa.
Sed sekvu miajn leĝojn kaj detenu vin
de tio, kion devas timi vi en koro.
Lasu ke l' korpon reĝu la inteligento,
kaj en l' eter' brilega °vi vin mem levante,
inter la senmortuloj ankaŭ vi estos di'.

International Bulletin (World Union of Pythagorean Organizations) – n-ro 11 (special edition – 1980)
Oraj Versoj de Pitagoro – faldfolio eldonita de Instituto Neo-Pitagórico por la 66-a UK (1981)[6]
Almanako Lorenz 1993

6 Laŭ indiko en la faldfolio, la traduko estis farita en 1953. Troviĝas ankaŭ ne tute klara informo pri alia publikigo, en 1962.

El la araba

Proverboj

“Estis” estas vorto, kiu nin °enuas,
se ĝi por l' estonto ion ne konstruas.

Ne ĉiam tuta restas poto
post forta bato aŭ post froto.

Se la potoj ne rompiĝus,
novaj potoj ne troviĝus.

Amo kaŝas la difektojn
kaj malkovras nur perfektojn.

Pernambuco Esperantista, n-ro 57–58 (apr–maj/1944) kaj n-ro 69 (apr/1945)
O Brasil Esperantista, n-ro 367–369 (okt–dec/1944)
Du tajpaĵoj el la arkivo de Jandira Lorenz

Ŝanĝita Sorto
(egipta popolkanto)

Feliĉa kiel reĝ' najbaro mia estis;
sed kiam kontraŭ li la sort' sin manifestis,
li eĉ en sia domo sen amikoj restis,
kaj kiam lia ŝip' fornaĝis por alporti
la kuracilojn, ve! — piratoj ĝin arestis.

Pernambuco Esperantista, n-ro 57–58 (apr–maj/1944)
O Brasil Esperantista, n-ro 383–385 (jan–mar/1946)
Du tajpaĵoj el la arkivo de Jandira Lorenz

El la armena

Plendo de Malfeliĉulo
(popolkanto)

El naskiĝa lando mia mi foriris,
al amikoj miaj mi adiaŭ diris,
kaj en fremda lando mi nun, kun doloro,
velkas kiel kampa, solkreskanta floro.
Jaroj pasas; venas post maten' vespero,
kaj post la printempo ĉiam la somero;
nur por mi nenio nova ekaperas:
kiel mi suferis, daŭre mi suferas.

Dorna voj', de mia viv' la horizonto,
kaj mizer' min tenas kvazaŭ mia honto.
Mian malfeliĉon neniu kompatas,
pro la malriĉeco multaj min malŝatas.
De naskiĝo mia sur ĉi tiu tero
peze frapas min la vipo de l' sufero;
sort' malĝoja mokas min, kaj kun sufiĉo;
ĝis nun ne ridetis al mi la feliĉo.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la bengala, tra la angla

Rabindranath Tagore[1]
(1861–1941)

Al Dio

Kiam Vi ordonas
al mi kanti, ho Sinjoro,
ŝajnas ke dissaltas
pro fiero mia koro.
Mi rigardas Vian
lumvizaĝon harmonian,
kaj okulojn miajn
am' inundas kaj ĝojploro.

Malaperas ĉia
de la viv' disharmonio;
ĉio kunfandiĝas
en tre dolĉa melodio.
Kiel bird' fluganta
gaje super mar' bruanta,
flugas mia menso
por adori Vin, ho Dio!

Al vi veni povas
mi nur kiel amkantanto,
por tuŝeti Vian

1 রবীন্দ্রনাথ ঠাকুর

piedsubon per la kanto;
kaj mi, ĝojebria,
nomas Vin “amiko mia”,
forgesante ke Vi
estas la Sinjor', Reĝanto.

Laŭ la angla traduko senrima de l' aŭtoro

Pernambuco Esperantista, n-ro 50–52 (sep–nov/1943)
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la bulgara

La interna Kristo parolas
(el la gazeto “Bratstvo”)

En hor' de ĝem' kaj dubokri'
rigardon ĵetu vi al Mi!

En hor' ĉagrena voku Min,
Eternan vian Protektanton;
ĉar Mi eterne vin rigardas
kaj kiel Mian kunloĝanton
animon vian ĉiam gardas.

En hor' malĝoja vi sen tim'
rigardu l' enon de l' anim';
okulo via ektrankvilos,
de ĝoj' radi' al vi ekbrilos.

Mi estas fonto de la Pac'
kaj Lum', feliĉo supertera,
kaj de l' beleco fort' mistera.

En hor' de ĝem' kaj dubokri'
rigardon ĵetu do al Mi!

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la ĉeĥa

Birdeto kaj Knabino (popolkanto)

Kion diras la birdet'
sur silik'[1] sidanta?
Ke paliĝas la knabin'
knabon ametanta.

Eksilentu, ho birdet',
tute vi ne pravas;
ĉar mi knabon amas, kaj
ruĝkoloron havas.

Pernambuco Esperantista, n-ro 49 (aŭg/1943)
O Brasil Esperantista, n-ro 355–357 (okt–dec/1943)

1 Supozeble devus esti *salik'*.

Karel Havlíček Borovský
(1821–1856)

Eterna estas la vivo[1]

Ke mallonga estas vivo,
ne plendu, animo;
kio estos post la morto,
atendu sen timo.

En senfina l' universo
ĉiam vivo fluas;
nur disigas mort' estaĵojn,
eston ne detruas.

La funebra sonorilo
finon ne predikas;
kiel sonoril' teatra,
ŝanĝon ĝi indikas.

Ĝi anoncas l' aktofinon;
falas la kurteno,

1 Portugallingva versio de Lorenz troveblas en *Pequena Antologia Tcheca* (1-a eld.: Veselý/Edda, 1928; 2-a eld.: IPFVL, 2015; 3-a eld.: Class, 2021).

sed leviĝas tuj por nova
akto, nova sceno.

Post la akto, la aktoroj
tuj alivestiĝos,
sed de l' dram' eterna kuro
neniam finiĝos.

Pernambuco Esperantista, n-ro 25 (aŭg/1941)

Svatopluk Čech
(1846–1908)

Ho, ne ploru![1]
(Ekvojaĝo de fianĉiĝinta laboristo)

Ho, ne ploru, bluokuloj,
baldaŭ mi revidos vin.
Estos miaj vi stimuloj
en la lukto de l' destin'.
Mi vin vidos en blufloro,
en ĉiela la koloro;
min fortigos en labor'
via bildo,
mia ŝildo,
bela stel' de mia kor'.

Sereniĝu, belvizaĝo,
baldaŭ mi rekisos vin;
via bild' dum la vojaĝo
restos mia sur retin';
montros sin en rozo bela,
en serena bril' ĉiela;
min fortigos en labor'
via bildo,
mia ŝildo,
bela roz' de mia kor'.

1 Portugallingva versio de Lorenz troveblas en *Pequena Antologia Tcheca* (1-a eld.: Veselý/Edda, 1928; 2-a eld.: IPFVL, 2015; 3-a eld.: Class, 2021).

Viŝu, bela man', la larmon;
baldaŭ mi repremos vin;
ĉie mi nur vian ĉarmon
sentos, kara belulin':
dum la vintro en neĝfalo,
dum printemp' en la konvalo;
min fortigos en labor'
via bildo,
mia ŝildo,
blanka flor' de mia kor'.

Heroldo de Esperanto, n-ro 1083 (01/03/1948)

Adolf Červinka
(1875–1936)

Himno al la Vivo[1]

De l' pratempo al l' eterno,
de la spaco tra la lim',
Cia regno etendiĝas
al senfina malproksim',
kaj standardoj Ciaj brilas
ĉiam kun triumf-esprim'.

Ci brakumas l' Universon
kaj susuras en la kor';
Ci eterne kreas formojn
sen laciĝi pro l' labor';
Ci spiradas en la steloj,
sonĝas en la roza flor'.

Ĉiujn ulojn lumiganta
reflektilo estas Ci;
kaj ni estas nur fajreroj,
ĝermoj nur de materi';

1 Portugallingva versio de Lorenz troveblas en *Pequena Antologia Tcheca* (1-a eld.: Veselý/Edda, 1928; 2-a eld.: IPFVL, 2015; 3-a eld.: Class, 2021).

Ci spirit' mistera estas
kaj kreanta la Geni'.

Kio vivis, vivi daŭras
en la mondoj de l' Astral';[2]
kvankam detruiĝis regnoj
per la vento de l' fatal',
ne perdiĝis Atlantiso,
nek eĉ unu ideal'.

Pernambuco Esperantista, n-ro 62 (sep/1944)

2 Astralo = transmaterio, la stato de l' animoj sen fizikaj korpoj. [noto de Lorenz]

Boleslav Jablonský
(1813–1881)

La Libro de l' Naturo[1]

Estas unu granda libro,
kiun skribas, rektas Di',[2]
granda libro de l' naturo
estas sankta nom' de ĝi.

Se vi havas sentan koron,
legu diligente ĝin,
en literoj ĝiaj lernu
koni Dion, mondon, sin.[3]

Úplná učebnice mezinárodní řeči dra. Esperanta / Plena lernolibro de la lingvo internacia de dro. Esperanto. Lorenc/Hoblík, 1890.
La Liro de la Esperantistoj. Grabowski, 1893.
Kooperativismo, n-ro 10 (okt/1960)

1 Rimarku, ke tiu peco estas tre frua, el 1890, kio klarigas ĝiajn partikularaĵojn.
2 En la *Liro* de Grabowski tiu verso estas *kiun skribas mem la Di',*
3 En *Kooperativismo* Ismael Gomes Braga anstataŭigis *sin* per *vin*.

Eliška Krásnohorská
(1847–1926)

Printempo kaj Amo[1]

La printemp' — misnomas vi
de l' amad' belhorojn;
sed aŭtune trovas ni
de la tomb' en asoci'
ankaŭ amo-florojn.

La printempo kun malfru'
por tempeto venas:
vera am' en momentflu'
venas kaj neniam plu
nin forlasi penas.

Pernambuco Esperantista, n-ro 69 (apr/1945)
O Brasil Esperantista, n-ro 383–385 (jan–mar/1946)

1 Portugallingva versio de Lorenz troveblas en *Pequena Antologia Tcheca* (1-a eld.: Veselý/Edda, 1928; 2-a eld.: IPFVL, 2015; 3-a eld.: Class, 2021).

Jan Evangelista Nečas
(1849–1919)

La Forto de la Vorto[1]

Regas terure la forto de l' vorto,
koron turmentas kaj premas;
iam pro vorto ja mortas feliĉo
kaj la animo ekĝemas.

Vorto malmilda samkiel ponardo
tranĉe alportas suferon,
kaj la animon ĝi povas faligi
en torturegan inferon.

Pernambuco Esperantista, n-ro 62 (sep/1944)

1 Portugallingva versio de Lorenz troveblas en *Pequena Antologia Tcheca* (1-a eld.: Veselý/Edda, 1928; 2-a eld.: IPFVL, 2015; 3-a eld.: Class, 2021).

Josef Sládek
(1845–1912)

La vivo al mi venis[1]

La vivo al mi venis,
anĝelo ridetanta,
pokalon plenan tenis
da bona vin' ardanta.
“Jen fort', feliĉo”, diris ĝi,
“en ĉiu tiu guto;
junulo, trinku do!” Kaj mi
tuj trinkis, sen disputo.

La vivo al mi venis,
figur' de palfantomo,
amaran tason tenis
kaj diris: “Trinku, homo,
la galajn gutojn de dolor',
konsaĝon de l' homraso;
suferi lernu via kor'.”
Mi trinkis el la taso.

1 Portugallingva versio de Lorenz troveblas en *Pequena Antologia Tcheca* (1-a eld.: Veselý/Edda, 1928; 2-a eld.: IPFVL, 2015; 3-a eld.: Class, 2021).

La vivo al mi venis
en flug' de l' rememoro;
ĝi velkan floron tenis
kaj larmojn sur la floro.
La velkan floron prenis mi
kaj kisis kun kor-skuo;
la larmojn sorbis mi el ĝi,
verŝitajn dum viv-bruo.

Rio Esperantista, n-ro 10 (jan/1948)

Ervín Špindler
(1843–1918)

La Amo[1]

Feliĉo floros al la Am',
se, firma, ĝi suferas
la frapojn de kontraŭa sort',
kaj, sen malben', esperas.

L' animo nobla, kies kor'
ne malbenas la sorton
eĉ en terura agoni',
postvivos ĉian morton.

Kaj en la templo de l' homar'
ĝi ĉiam brilos ore;
la Am' ne mortas sur la kruc',
sed reekstaros glore.

Pernambuco Esperantista, n-ro 25 (aŭg/1941)

1 Portugallingva versio de Lorenz troveblas en *Pequena Antologia Tcheca* (1-a eld.: Veselý/Edda, 1928; 2-a eld.: IPFVL, 2015; 3-a eld.: Class, 2021).

Josef Kajetán Tyl
(1808–1856)

Kde domov můj?[1] [2] [3]
(Bohema kanto nacia)

Kie patruj', mia patruj'?
Akvoj fluas tra floraroj,
montojn beligas arbaroj,
multa ĝardenon frukter';
tie paradiza ter';
kaj ter' tia, tiel bela
Bohemuj', al mi patruj'.

Kie patruj', mia patruj'?
Ĉu vi tiun teron konas,
kie kantoj ĉiam sonas,
kie sana la anim',
kie sencoj sen la tim'?
De popol' tiu la tero
Bohemuj', al mi patruj'.

Úplná učebnice mezinárodní řeči dra. Esperanta / Plena lernolibro de la lingvo internacia de dro. Esperanto. Lorenc/Hoblík, 1890.

---

1 Rimarku, ke tiu peco estas tre frua, el 1890, kio klarigas ĝiajn partikularaĵojn.

2 Ekzistas multaj aliaj tradukoj. Tri versioj de M. Lukáš kaj unu de K. Kudrna troveblas en *Píseň Písní Národu Českého* (A. Neubert, 1935). *Esperanto – klíč a slovník* (A. Perout, 1923) enhavas alian esperantigon, kaj plia versio de M. Lukáš estas citita en la artikolo de J. Mařík en *Menade bal püki bal – festlibro por la 50a naskiĝ-tago de Reinhard Haupenthal* (Iltis, 1998).

3 Portugallingva versio de Lorenz troveblas en *Pequena Antologia Tcheca* (1-a eld.: Veselý/Edda, 1928; 2-a eld.: IPFVL, 2015; 3-a eld.: Class, 2021).

Kje dom' al mi?[1]
(Bohema kanto nacja)

Kje dom' al mi, patr'jo de mi?
Akvoj fluas tra herbaroj,
montojn beligas arbaroj,
la ĝardenon multa flor'!
Paradiz' por sento, kor':
Tiu tero, bela tero,
la Bohem'jo patr'jo-ĉi.

Kje dom' al mi, patr'jo de mi?
Ĉu vi tiun teron konas,
kie kantoj ĉiam sonas,
kie sana la anim',
kie sencoj sen la tim'?
De popolo tiu tero:
La Bohem'jo patr'jo-ĉi.

La Liro de la Esperantistoj. Grabowski, 1893.

1 Ĉi tiu versio aperis en la *Liro*. Inter la diversaj ŝanĝoj troveblas ankaŭ kelkaj el la eksperimentaĵoj de Grabowski, kiujn bone klarigis Waringhien (*la nica literatura revuo,* n-ro 28 (mar–apr/1960)). Mi ne certas, ĉu Grabowski havis permeson de Lorenz!

El la ĉina

Ĉina popola kanto

Por fari al mi ĝojon,
hodiaŭ frue, ĉe aŭror',
ĉe l' pordon iu metis
branĉeton de belega flor'.

Egale bela floro
ne estas ja en la ĝarden';
kaj ĉiujn admirigos
la blanka floro de jasmen'.

Pernambuco Esperantista, n-ro 49 (aŭg/1943)
O Brasil Esperantista, n-ro 349–351 (jul–sep/1943)

El la ĉina, tra la angla

Li Tai Po[1]
(Ĉ. 701 – 762)

Senfina Angoro

De l' vojaĝ' la celon deziregas mi atingi
kaj ardantan la aflikton de l' angor' estingi.
Kiel miaj zorgopensoj, la insektoj zumas
ĉe la fontobordoj, kiujn lunradi' orumas.
Sur malvarma mia mato, da glaci' tabulo
maldiketa brilas, kvazaŭ estus ĝi spegulo.
La lanterno sur la mur' malforte trembriletas,
en aflikton mian ĝi pli da malĝojo ĵetas.
Min por trankviligi, el la ombro mi foriras,
al la Luno mi rigardas, tamen resopiras.
Kvazaŭ floro, inter nuboj paŝas ĝi kviete;
super mi ĉiela blu' etendas sin diskrete,
kaj malsupre tre intense verda la koloro
kaj trankvilas akvoj, kun kaŝita la trezoro.
La ĉiel' senlima estas, granda tre la tero;
pliangoras mia kor' ĉe tiu konsidero:
Kiel tra l' pordego pasos mi al la montaro?
Ĉu projekton mian ne detruos iu baro?
Kial tremas mia koro
pro la mens-angoro?!

Rio Esperantista, n-ro 7 (okt/1947). Laŭ la angla traduko de Witter Bynner.

1 李太白

El la eŭska

Kanto de Altabiskar[1]

Aŭdiĝis krio sur la Baskaj kampoj,
kaj la Dommastro, antaŭ sia pordo,
aŭskultis ĝin kaj diris: “Kiu vokis?
Kaj kion oni volas ke mi faru?”
La hund', dorminta apud sia mastro,
sin levis kaj per sia laŭtbojado
l' Altabiskar'an najbararon vokis.

Sur la monteto Ibañeta bruo
tre forta resoninte, proksimiĝas,
tuŝante ambaŭflanke niajn rokojn:
tumulto de armeo, alveninta
el malproksimaj lokoj. Kaj la niaj
respondis nun al ĝi per siaj kornoj
elalte de la montoj. La Dommastro
komencis jam akrigi siajn sagojn.

Armeo venis! Kia, jen, arbaro
da lancoj! Kiel la soldatoj tie
pariĝas meze de l' standardoj multaj
kaj tre diverskoloraj! Kaj radioj
eliras el l' armiloj! Kia estas
la nombro, ha! da tiuj militistoj?

1 Pri la malvenko de l' armeo de la reĝo Karlo Granda, en la jaro 778a, en la montkolo Roncesvalles. [noto de Lorenz]

Kalkulu ilin bone, mia knabo!
Unu, du, tri, kvar, kvin, ...dek, ...ho, dudek!

Ĉu dudek? Kaj se eĉ da ili miloj
alvenis, tutkalkuli ilin ĉiujn
por ni nun nur perdita tempo estus.
Ni unuigu niajn fortajn brakojn,
eltiru el radikoj ĉi la rokojn
kaj ĵetu ilin de sur la deklivo
de l' mont' malsupren, sur iliajn kapojn
kaj mortbatante ni frakasu ilin!

Ho, kion volas sur montaro nia
la viroj el la Nordo? Kial ili
perturbi venis nian pacon? Kial?!
Kreinte la montaron, certe Dio
ne volis, ke transpasu ilin homoj.
La rokoj falas, ruliĝante suben,
frakasas la trupvirojn; sango fluas
torente el senvivaj karnopecoj.
Ho, kiom tie da rompitaj ostoj!
Ho, kia mar' da sango malamika!

Forfuĝas la vivantoj, kiuj povas:
nur kiuj havas fortojn kaj ĉevalojn.
Forfuĝu, reĝo Karlo Granda, fuĝu,
kun via nigra plum' kaj ruĝ-mantelo!
Amata via nep', Orlando brava,
mortinte kuŝas, jen, malsupre. Lia
braveco al li ne utilis. Sed nun,

ni Baskoj, ĉiuj ĵetu niajn sagojn
sur tiujn, kiuj estas forfuĝantaj!

Forfuĝas ili. Kie estas tiu
arbar' da lancoj? Kie la standardoj?
Silentas la armiloj, sangkovritaj.
Nun kiom da soldatoj estas tie?
Kalkulu ilin bone, mia knabo!
Dudek, dek naŭ, dek ok, ...dek, naŭ... unu.

Nur unu! Lin eĉ ne plu oni vidas.
Finiĝis. Vi, Dommastro, nun do povas
reiri domen, kaj al via hundo,
l' edzinon kaj gefilojn ekbrakumi.
Poluru viajn sagojn kaj kunigu
en via korno de bubalo ilin.
La agloj nokte venos kaj manĝaĉos
la karnopecojn de la mortigitoj,
kaj l' ostoj tie restos °ĝiseterne.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la franca

Victor Hugo
(1802–1885)

El la poemo “La Preĝo pro Ĉiuj”

Filino mia, preĝu! Pro l' patrin' unue;
ŝi lulis vin dum multaj noktoj, eĉ malfrue;
ŝi al la mond' alportis vin el la ĉiel'
kaj — panjo bona — ŝi kun amo senkompara
du partojn faris de ĉi tiu viv' amara:
absint' por ŝi ke estu, kaj por vi miel'.

Kaj vian preĝon pli ol ŝi mi mem bezonas.
Ŝi estas kiel vi, fidela kaj pardonas,
kun frunt' kontenta, puraj kor' kaj konscienc'.

Al multaj ŝi kompatas, vivas sen envio
kaj sen venĝemo, ĉiam laŭ la leĝ' de Dio,
malbonon suferadas ŝi kun pacienc'.

…

Pro mi do multe preĝu! Diru: “Dio mia,
Sinjor' potenca, kiu estas Patro nia,
Vi estas bona, granda, kompatema tre.”
— Filino, poste la parolon lasu iri,
la koro kien sendas ĝin, sen timon spiri;
vin trankviligu; Dion trovos la ide'.

...

Pro via patro preĝu! Ke meritu vidi
en sonĝo mi anĝelon al mi flugrapidi,
kaj kun incens' en mi ke brulu la intim'!
Estingu via ĉasta blov' en mi pekaron
ke, kiel oni lavis je l' vesper' l' altaron,
fariĝu senmakula mia mens-anim'!

...

Kaj ankaŭ preĝu pro la homoj
vivantaj sur ĉi tiu ter'!
Pro tiuj, kies voj' kaj domoj
en ŝtormo tremas pro l' danĝer'!
Pro l' ul' malsaĝa, nur feliĉa
se brilas li en vesto riĉa,
aŭ gajnas lia vet-ĉeval'.
Pro tiuj preĝu, kiuj ploras,
suferas multe kaj laboras
por manĝo aŭ por ideal'.

Pro tiu, kiu ĝu-malsata,
je ĉiu tag' amuzas sin,
je l' hor' al preĝoj destinata
okupas sin per danc' kaj vin',
dronante en tumult' orgia
dum la momento, kiam pia
anim', kun dolĉa melodi'
de himnoj sonon kant-etendas,

al la ĉielo petojn sendas,
penante ke ĝin aŭdu Di'.

Pro l' vualitaj virgulinoj,
pro la ĝemantoj en karcer'
vi preĝu, kaj pro la virinoj
vendantaj amon pro mizer'!
Kaj preĝu pro l' bonul' revanta,
kaj pro la homo blasfemanta
eĉ kontraŭ la plej sankta leĝ'.
Ĉar Dion via kred' obeas,
al tiuj eĉ, kiuj Lin neas,
utilas via pia preĝ'.

Kaj preĝu ankaŭ pro l' animoj
de l' ekdormintoj sub la ter',
en abisma lit' sen limoj,
fermita pordo de l' mister'.
L' animoj kun sufer' en brusto
bezonas ke de l' korp' la rusto
foriĝu per la lum' kaj pent';
ni helpu ilin per kompata
preĝado kaj koramo frata;
parolas ili en silent'.

Pernambuco Esperantista, n-ro 55–56 (feb–mar/1944)

Paul Verlaine
(1844–1896)

Plendo de l' Malliberulo[1]

Ĉielo super dom' kaj ter'
kviete bluas;
la branĉojn super dom' kaj ter'
arbo lulskuas.

De l' sonorilo en l' aer'
fluas la sono;
de l' bird' aŭdiĝas en l' aer'
plenda kanzono.

Jen tie vivo, — mia Di'!
simpla, serenas;
la paca homa bruo, ĝi
de l' urbo venas.

El la juneco kion vi
faris forgese,
malfeliĉulo, ke nun vi
ĝemas senĉese?

Pernambuco Esperantista, n-ro 62 (sep/1944)

1 Traduko de Kálmán Kalocsay troveblas en *Tutmonda Sonoro*, vol. II (HEA, 1981).

La Aŭtuno[1]

La sopirsonoj
de l' violonoj
de la aŭtuno
estas al mia
kor' apatia
sentoharpuno.

Ĉio sufokas,
palon elvokas;
ĉe l' son' de l' horo
al mi imagoj
de l' intaj tagoj
venas kun ploro.

De l' vento fata
estas portata
mi kun devio,
kiel falinta
kaj jam mortinta
arba folio.

Pernambuco Esperantista, n-ro 62 (sep/1944)

1 Traduko de Antoni Grabowski troveblas en *El Parnaso de Popoloj* (Pola Esperantisto, 1913; represo ĉe Iltis, 1983); traduko de Kálmán Kalocsay troveblas en *Tutmonda Sonoro*, vol. II (HEA, 1981).

El la germana

Theodor Fontane
(1819–1898)

Konsolo

Konsoliĝu, ĉio pasas,
ankaŭ malfeliĉa hor';
kio nun vin embarasas,
iutage fuĝos for.

En l' eterna ir' kaj veno
kuŝas ĉe l' dolor' la ĝoj';
ankaŭ de l' feliĉ' la beno
venos re sur via voj'.

Vivu kun esper-motivo
ĉe ajn iu horobat';
ŝanĝo estas leĝ' de l' vivo,
ŝanĝon portas nia fat'.

Rio Esperantista, n-ro 16 (jul/1948)

Johann Wolfgang von Goethe (1749–1832)

La Ranoj

Surfacon de lageto frosto fermis;
ĝi ranojn en l' interno ne ekstermis,
sed kvaki en fund' ne povis ili,
nek salti; tamen ili sin konsolis:
“Venonte teren” — ili laŭtparolis —
“ni kiel najtingaloj povos trili.”
Degelis la glaci' per sunvetero;
la ranoj remis, venis al la tero:
nun sur la bordo ili, jen, bivakas
kaj laŭ antaŭa maniero — kvakas.

Pernambuco Esperantista, n-ro 49 (aŭg/1943)
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la hispana

Sankta Tereza de Ávila[1] (1515–1582)

Amo al Dio[2]

Mi amas, Dio, Vin ne pro l' espero
de ĝu' ĉiela, al mi promesita;
°de Vin ofendi estas detenita
mi ne pro la teruro de l' infero.

Vin ami movas min Via sufero
esti mokita, sur la kruc' najlita,
tiu vidaĵ' de Via korp' vundita,
la mort-angor' de Via sin-ofero.

Mi amus Vin, kaj kun sincera amo,
se ne ekzistus eĉ ĉielo Via,
kaj timus Vin eĉ sen l' infera flamo.

Mi, sen sopir' je rekompenco ia,
Vin amus kiel amas, sen malsamo,
se ne ekzistus eĉ l' espero pia.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Ĉi tiu soneto estas ofte atribuata al Sankta Tereza de Ávila, sed fakte ĝi estas apokrifaĵo.

2 Traduko de Kálmán Kalocsay troveblas en *Tutmonda Sonoro*, vol. I (HEA, 1981).

Ismael Enrique Arciniegas
(1865–1938)

La Kaciko Ĉanĉón

De Makaregŭa jam retroiradis Galiano[1]
sen rajdobestoj, kun tridek nur siaj soldatoj.
Marĉo fariĝis per pluvo la kampo kaj stratoj,
kiam Ĉanĉón direktadis sin al la hispano.

Ĉiu fusil' humidiĝis en l' akva fi-bano,
tamen la tridek pretigas sin, malgraŭ la fatoj,
al la batalo, sed vidas ke… jen! la gvidatoj
de la kaciko jam ilin ĉirkaŭis laŭ plano.

Venis Ĉanĉón. Li portadas kirason el oro,
tigrodentegan kolĉenon, en frunto-dekoro
ringojn kun verda smerald', kiun multaj admiris.
Vidis li ke la blankuloj, de l' pluv' invaditaj,
staras kun mutaj fusiloj, vestaĵoj rompitaj;
firme rigardis li ilin kaj… mute foriris.

Pernambuco Esperantista, n-ro 50–52 (sep–nov/1943)
O Brasil Esperantista, n-ro 361–363 (apr-jun/1944)
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Galiano (legu: *Galjano*) estis hispana milita komandanto. [noto de Lorenz]

Senmorteco

> “La tuta senlima Universo
> estas Vivo; morto ne ekzistas.”
> (Verso de l' usona poeto
> J. L. McCreery.)

Mi al tombejo forgesita iras
ĉe l' lumo de l' mortanta jam vespero;
piece el la brust' mi eksopiras,
pensante de la morto pri l' mistero.

Ĉe l' lasta lumo de la okcidento
rigardas mi en la malhela fono
nur simplajn lignokrucojn, en silento,
l' atestojn klarajn de la mort-ordonoj.

Ĉirkaŭe leviĝadas sen dekoro
humila heĝ' el verdaj loniceroj,
sur kiun larmoj verŝas la aŭroro
kaj kie birdoj kantas je vesperoj.

Profunda rivereto ĉi najbaras,
en part' per verda-nigra kot' vestita,
kaj sur la bordo salikarbo staras,
de l' morto kvazaŭ gvardiano mita.

Aŭdante mi[1] de l' arbustaro bruon,
demandas l' ombron sklavan pri l' difino:

1 Mi aldonis la vorteton *mi*.

Ĉu tiel viv' komencas sian fluon?
Ĉu estas tiu bru' de l' vivo fino?

Ĉu ĉio mortas? — diras mi. Subite
mi vidas ke de verda dekliveto
leviĝas kolombaro senhezite
al la ĉiela blu', en fluga ĵeto.

De l' angla[2] bardo la konsola verso
rememoriĝas kaj al mi raportas:
“Vivanta tuta estas l' Universo;
post morto vivos vi; nenio mortas.”

Pernambuco Esperantista, n-ro 49 (aŭg/1943)

2 Fakte J. L. McCreery estis usonano.

José Asunción Silva
(1865–1896)

Rido kaj Ploro

Ni ambaŭ ridis tre je iu tago,
ni ridis kun °humoro;
la rido estis brua, tamen baldaŭ
ĝin anstataŭis ploro.

Pli poste ambaŭ ni je iu nokto
tre ploris pro doloro,
kaj tiuj larmoj, jen, postlasis ĉarmon
misteran en la koro.

Sopirojn veajn naskas la orgio
ĉe l' plad' kaj tas' regalaj,
kaj en la akvo sala de la maroj
formiĝas perloj palaj.

Pernambuco Esperantista, n-ro 49 (aŭg/1943)
O Brasil Esperantista, n-ro 355–357 (okt–dec/1943)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la hungara

Sándor Petőfi
(1823–1849)

El la libro “Nuboj”

Saĝulo iam sur azen' vojiris,
sed poste ŝanĝon nia mond' akiris:
kutimas rajdi nun azenoj — nuloj,
kaj piediri devas la saĝuloj.

—

Vi kion manĝis, Tero,
ke tiom soifante
vi trinkas larmojn, sangon
ofte kaj ega-kvante?!

—

Respondu, mi demandas la saĝulojn,
enigmon la plej gravan el faritaj:
Ĉu povas lavi de l' homar' makulojn
la larmoj, de l' homaro elverŝitaj?

—

Malĝojo estas granda maro,
kaj ĝoj' — perleto en l' akvaro;
se supren mi elportos ĝin
mi timas ke ĝi rompos sin.

Pernambuco Esperantista, n-ro 46–48 (maj–jul/1943)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la irlanda

El "Kahlino[1] de Kluha"

Alvenu, radio de l' Stelo Vespera,
vi sola ekbrilo en nokto malluma;
vi ventoblovadon traboras, kaj ondoj
ridetas sub via kiseto oruma.

Ĉe cent riveretoj de mia patrujo
kaj super la akvo de multaj lagetoj
l' animoj de bravaj herooj mortintaj
vagadas, en formo de l' "lumaj vojetoj".[2]

En kanto ne vivas ankoraŭ nun ĝojo;
vekiĝu, vekiĝu, ho lango de l' kordoj,
venigu kuraĝon al kor' suferanta
kaj ree konsolu nin viaj agordoj.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz[3]

---

1 *Kahlin'* estas nomo virina; irlandlingve ĝi signifas la lumstrekan reflekton de la Vesperstelo sur la lagondoj. [noto de Lorenz]

2 "Lumaj vojetoj" estas la erarlumoj; la irlandaj kamparanoj kredas, ke ili estas la animoj de la mortintoj, kiuj vizitadas la lokojn, kie ili antaŭ la morto vivadis. [noto de Lorenz]

3 La tajpaĵo (nura paperpeco) enhavas ankaŭ la jenan piednoton de Lorenz, kiu ŝajne tamen rilatas al alia poemo, kiu eble antaŭe troviĝis en la supra parto de la folio: "En tiu ĉi tradukaĵo mi ŝanĝis iomete la formon metrikan: mi ne povis konservi la originalan, pro la manko de tiom da unusilabaj vortoj en Esp°. Alia noto: Ŝajnas al mi, ke en la unua linio de la originalo devas esti unu silabo pluse. Eble devas esti: *I do not fear that what man do.*"

El la itala

Giosuè Carducci
(1835–1907)

Por Instituto de Blinduloj

Kiam Homer' rigardadis batalojn, Trojaj sur kampoj,
plenaj de bril', per okuloj levitaj, sen vido;
kiam, kun frunt' en malvarma mallum' leviĝanta, vidadis
Milton Jehovon paŝantan sur mondoj venkitaj:
rompis l' Anim' Universa la nubon senmovan de l' sensoj,
kaj en la grandaj spiritoj la suno ardadis.
Kiam Tobi' malfeliĉa rekonis la bojon de l' hundo
kaj palpadante etendis la blankajn manojn,
venis la sankta kompato, sendita de Di': Rafaelo
al la blindulo redonis la filon kaj lumon.
Staras ĉeflanke sur vasta la Ter' la herooj de l' penso:
al Rafaelo la mondo la brakojn etendas.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Vintra Tedo

Ĉu sur la ter' sunvarmo,
de floroj la parfumo,
rideto, ardo, lumo
ekzistis vere jam?

Ĉu iam ja ekzistis
la dolĉa korjuneco,[1]
la gloro kaj beleco,
la fido, virto, am'?

En tempoj tio eble
Homeraj fakte estis,
sed nun nenio restis,
eĉ sun' ne estas plu.

Vualas min nebulo
de la malpura vintro,
de mond' estinta cindro,
malgaja kor-enu'.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Variaĵo krajone almetita: *juneca, gaja koro, / beleco, vera gloro,*

Antonio Scalvini (1835–1881) kaj Carlo d'Ormeville (1840–1924)

Balado de l' Guaraní[1]

Estis princo bela kaj
de serioz' modelo,
ĉiuj lin amis, estis li
la gloro de l' kastelo.
Sed amon fuĝis li,
ne volis koni ĝin.

Forta, lojala estis li
kaj ŝajnis amant' fidela:
okulojn li havis tre ĉarmajn,
sed amon fuĝis li,
ne volis koni ĝin. Ha!
Amon fuĝis li!

Sed... foje... junulin' malriĉa, bela, jen,
je li proksime paŝis;
li haltis senmova kaj al li
la amo sin malkaŝis... kaj li ŝanĝiĝis tuj.

1 Temas pri peco el la opero *Il Guarany*, komponita de la brazilano Carlos Gomes, kun libreto de Scalvini kaj d'Ormeville. Ne estas klara indiko, ĉu Lorenz tradukis rekte el la itallingva originalo aŭ ne.

Ami li devis, ami, jes. Ho jes! Ho jes, ho jes!
Nun amos li! Nun amos li! Ho jes!
Ha-ha-ha-ha!

Kaj vane tentis[2] rezisti li
al la voĉ' de l' korbato:
al ĉiuj sur la Tero ĉi fato
...[3]

Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

2 *provis* (*tentar* en la portugala)

3 La fino perdiĝis, pro ŝiriĝo de la paperpeco.

El la japana

Printempa Vento
(kanto)

La milda vent' alflugis,
nin ne forgesis;
sur vangon min kisante
ĝi min karesis,
kaj al la rizokampo
ĝi tuj regresis.

Pernambuco Esperantista, n-ro 49 (aŭg/1943)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la keĉua

Ĉiutaga Preĝo de l' Inkao

Ho venu Vi, pli granda ol Ĉielo,
Sinjoro de la Tero tuta,
Unua Kaŭzo de estaĵoj ĉiuj,
Kreinto, Dio Absoluta:
mi serĉas Vin kun kora pi',
revelaciu Vin al mi!

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Peruana Serenado

Vekiĝu; ĉu vi dormas ja?
Aŭskultu, ne malĝojigu min;
mi jam konfesis kaj nun rediras,
ke mi sopiras
kaj tre sincere amas vin.
Kor' mia tremas
kaj ĝemas,
kaj deziras
vidi vin, ho karulin'!

Pernambuco Esperantista, n-ro 57–58 (apr–maj/1944) kaj n-ro 69 (apr/1945)
O Brasil Esperantista, n-ro 367–369 (okt–dec/1944)
Du tajpaĵoj el la arkivo de Jandira Lorenz

El Latino

Publius Ovidius Naso
(43 a.K. – ĉ. 17 p.K.)

Ariono kaj Delfeno

Kiu terlando aŭ mar' Arionon ne konis?
Kiam li kantis, ĉe l' son' ofte ekhaltis river';
persekutante ŝafidon la lup', per la voĉ' deteniĝis;
apud leono sur rok' cervo ekstaris sen tim';
apud kornik' babilema la strigo silenta eksidis,
kaj la timema kolomb' de l' akcipitro ĉe l' flank'.
Oni rakontas ke l' kant' Ariona Dianan ravadis,
kvazaŭ ĝi estus la voĉ' frata de l' di' Apolon'.
De Sicilio en l' urboj la nom' de l' poeto famiĝis,
kies versaĵojn tre ŝatis l' itala popol'.
Hejmen el tie l' artist' revenante, sur ŝipon eniris,
monon portante ĉe si, kiun li gajnis per l' art'.
Eble vi, malfeliĉul', timegadis la venton kaj ondojn,
sed pli sekura la mar' estis ol tiu ĉi ŝip',
ĉar la ŝipestro vin, ha! mortminacas per spad' elingita,
kaj la ŝipanoj kun li, ĉiu kun glavo en man'.
Kial vi tenas la glavon? La ŝipon prizorgu; danĝeras,
bone direktu vi ĝin per konvenanta armil'.
“Mi ne forkuros de l' mort'”, Ariono deklaris, “permesu
tamen ankoraŭ ke mi kantu iome je l' lir'.”
Ili permesas kun rid'; li do metas surkapen la kronon,
kies beleco, Sundi', certe ornamus eĉ vin;

°vestas mantelon el Tiro, dufoje purpure farbitan.
Sonon ekdonis la kord', sub de la fingroj altuŝ',
kiel ja kantas malĝoje la cigno mortonta, se ĝian
blankan tempion ĉasist' lerta traboris per sag'.
Kaj, ornamita, li saltis en l' ondojn; l' akvo blueta
supren eksaltis ĉi tuj ĝis °al la rando de l' ŝip'.
Tiumomente delfen' °elmerginte ofertis la dorson
kurban kaj tuj Arion' gaje eksidis sur ĝi;
mane tenante la citron, la prezon veturan li pagas
per sia kant', kaj per ĝi tre kvietiĝas l' akvar'.
Pro la piag' Jupiter' la delfenon al si transportinte,
kronon naŭstelan al ĝi donis el l' alta ĉiel'.

31/12/1941

Fotokopiita tajpaĵo el la kolekto de Biblioteko Ary Zamora

La Kvar Mond-Aĝoj[1]

Ora l' unua mondaĝ' estis, kiu ne havis punantojn;
ĉiu spontane, sen leĝ' kondutadis honeste kaj juste.
Puno ne estis, nek tim', nek minacaj paroloj sur bronzaj
plakoj, nek homa amas' atendadis tremante deklarojn
juĝajn, ĉar sen juĝist' estis tiam la homoj sekuraj.
Tiam ankoraŭ la pin', faligita per hak', ne forlasis
l' altajn montojn por, tra marondoj, viziti la mondon;
fremdajn plaĝojn tiam la homoj ankoraŭ ne konis.
L' urbojn ne ĉirkaŭadis ankoraŭ fosaĵoj profundaj;

1 Traduko de Gerrit Berveling troveblas en *Antologio Latina 2* (Fonto, 1998).

tiam ja nek klarion' ekzistadis, nek kurbaj trumpetoj
bronzaj, nek kaskoj, nek sabroj, ĉar oni ne konis militon,
sed sub protekto de l' Pac' kaj senzorge la homoj vivadis.
Tiam spontane la ter', kiun nek ŝirvundadis plugilo,
nek eĉ tuŝadis fosil', donacadis al ĉiuj la fruktojn.
Strangan[2] nutraĵon la hom' ne konante, kontenta manĝadis
kion li ajn de l' Natur' ricevadis sen ajna laboro,
kiel la fragon de l' mont', la sovaĝajn prunon kaj pomon,
frambon ruĝantan, de l' arb' Jupitera falintan glaneton.
Estis eterna printemp', kaj zefiroj per spiroj varmetaj
lud-karesadis la vangon de l' floroj, sen sem' naskiĝintaj.
Ankaŭ baldaŭe la ter' neplugita donadis la grenojn,
l' agro sen homa labor' estis plena je spikoj blankantaj.
Lakto en iuj, nektar' en aliaj riveroj fluadis;
verda ilekso per ŝvit' produktadis belflavan mielon.
Kiam Saturno de l' tron' estis jam forpelita Hadeson,
reĝo de l' mond', Jupiter', el arĝento homaron estigis.
Malpli valoras ol or' tiu ŝtofo, sed pli ol la bronzo.
Mallongigante la di' la printempon antaŭan, aldonis
vintron malvarman, ardantan someron, ŝanĝeman aŭtunon:
tiel sezonojn kvar produktante dum spaco de jaro.
Fojon unuan l' aer', bruligita per seka bolado,
ardis, kaj pendis glaci', kuntirita per ventoj premantaj.
Domon eniris la hom', kaj ĝi estis aŭ simpla kaverno,
densa arbar', aŭ la vergoj, ligitaj per ŝeloj de arboj.
Fojon unuan la gren' estis tiam metita en sulkojn;
fojon unuan sub jug' sopirĝemis premataj la bovoj.
Post la arĝenta homar' ekaperis la tria, la bronza,

2 *Fremdan* (*estranho* en la portugala)

pli kolerema kaj pli militema, sed ne krimegoza.
Fine formiĝis homar' el malmola metalo, el fero;
tuj plej malbona maljust' ĉiuspeca invadis la mondon;
tiam forfuĝis pudor', fideleco kaj fido kaj vero;
malplenigite, la lok' okupiĝis de trompo, mensogo,
ruza insido, perfort' kaj la krima posed-avideco.
Fortajn velojn nun navigist' etendante al ventoj
ilin konlernis; la ligno, starinta sur altaj montaroj,
transformiĝinte je kil', nekonatan ondaron atakas.
Dum l' antaŭtempo la ter', kiel lumo de l' sun' kaj l' aero,
estis komuna, sed nun mezuristo asignas la limojn.
Pli ol nur plantan nutraĵon, de l' grund' oni jam postuladas:
serĉi riĉecojn, multaj eniris l' internon de l' tero.
Riĉaj kostaĵoj sub hum', apud l' ombro infera kaŝitaj,
kaŭzo de multa malbon', kun fervor' estas nun elfosataj.
Jam ekaperis la fer' malbonaga, kaj l' oro krimnaska;
ĉie en tuta la mond' la milito semadas detruon;
sangon verŝante la man' sangadanta svingadas l' armilon.
Floras rabado; la gast' je l' amiko ne estas sekura,
nek je bofil' la bopatro, kaj eĉ la fratam' malaperas.
L' edzon minacas l' edzin' pereigi, kaj li la edzinon;
miksas venenojn mortajn duonpatrinoj teruraj;
filo sen amo en kor' vivofinon de l' patro deziras.

Fotokopio de tajpaĵo, fine de la tajposkripto de Brazila Antologio Poezia (ekzemplero el Biblioteko Ary Zamora)

El la latva

Orfoj
(popolkanto)

Kiu kantas korŝirante
dum krepusko de l' vesper'?
Estas l' orfoj, lacigitaj
per laboro kaj sufer'.

Ili ankaŭ frumatene
kantas kun amara ve',
kaj eĉ nokte kant' ilia
kortuŝanta tremas tre.

Ili sidas ĉirkaŭ fajro,
kontraŭ frost' varmigas sin,
manĝas panon tre malmolan,
nur en akvon trempas ĝin.

Ili paŝtas ĉe l' arbaro
la ĉevalojn de l' sinjor',
siajn larmojn kaj ĉagrenon
per la kanto pelas for.

Pernambuco Esperantista, n-ro 55–56 (feb–mar/1944)
O Brasil Esperantista, n-ro 377–379 (jul–sep/1945)
Du tajpaĵoj el la arkivo de Jandira Lorenz

El la nederlanda

Isaäc da Costa
(1798–1860)

La Erao de l' Vaporo

°Komencis nova viv-epoko por la tero
post kiam iĝis karbo kaj la min' de fero
de povo, rapidec' kaj lumo font'. La graso
kaj vakso forpuŝiĝas per lumiga gaso.
La ŝipoj sian vivon en l' interno sentas
kaj marveturas sen la timo ke ne ventas.
La mar' libera, kie vaporŝipoj naĝas,
kaj la terkrusto firma, kie nun vojaĝas
la homoj en fervojo, kun viglec' defia
konkuras en rapido unu kun l' alia.
Sputante la lokomotivo fajreraron,
transportas multaloken homojn kaj la varon.
Metaloj de l' fervoj' fulmante kaj tintante
ajn ion rezistantan tretas arogante;
ĝi kuras, flugas, mallarĝigas horizontojn,
formovas de la vid' l' abismojn kaj la montojn,
kaj lasas malfermitan spacon. Proksimiĝas
la urboj unuj al aliaj, kaj miksiĝas
popoloj kaj nacioj en ĉiuj linioj.

Pernambuco Esperantista, n-ro 50–52 (sep–nov/1943)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la norvega

Bjørnstjerne Bjørnson
(1832–1910)

Norvega Nacia Himno[1] [2]

Jes, ni amas landon nian
de belega bril';
hardis mar' sulkaron ĝian
ĉe la hejmoj mil.
Pri l' gepatroj vekas penson
tiu nia am',
reve ĉarmas nian menson
la mitnokta fam'.

Danku ĉiuj, ho Norvegoj,
al la granda Di':
gardis eĉ dum malhelegoj
nian landon Li.
Pro la rajt' la patroj luktis,
ĝemis panja plor';
ke l' bataloj venke fruktis,
helpis la Sinjor'.

---

1 La originala teksto estas verkita de Bjørnstjerne Bjørnson, en la jaro 1859a; la muziko de Rikard Nordraak; la tekston esperantigis, kun helpo de sr° Eugene Grøndahl, Francisco Valdomiro Lorenz. [noto de Lorenz]

2 Du aliaj tradukoj, de H. Bonnevie kaj de E. A. Haugen, troveblas en *Norda Kantaro*, tria kajero (M. Strid, 2015).

Jes, ni amas landon nian
de progresa bril';
hardis mar' sulkaron ĝian
ĉe la hejmoj mil.
Niaj patroj ja sen laco
luktis pro l' patruj';
se ĝi vokos, ni pro l' paco
ekbatalos tuj.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la palia

La Propra Memo
(el la 12-a ĉapitro de “Dhammapadam”[1])

Se vi amas vian memon, gardu ĉiam ĝin tre bone;
pensu pri la vera savo dum la tago, dum la nokto.
Nur se mem vi estas firma, saĝa hom' sur ĝusta vojo,
povos vi instrui homojn kaj dissemi bonajn semojn.
Mastru vian propran memon, se aliajn vi instruas;
ne sufiĉas la parolo, donu ĉiam mem-ekzemplon.
Gardu bone vian memon, ĉar ĝi estas via mastro;
se vi vian memon mastras, havas vi plej grandan povon.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Ekzistas du plenaj tradukoj de tiu verko en Esperanto: de T. T. Anuruddha (1-a eld.: Bô-tát-Csoma-Instituto por Budhologio, 1973; 2-a eld.: Budhana Ligo Esperantista, 1996) kaj de G. Gällmo (Eldona Societo Esperanto, 2002).

Vera Propraĵo
(el "Samjúta-nikájo")

Kiu sin amas, ne ligu la amon kun ago malbona;
kiu ja faras kaj amas malbonon, feliĉa ne estos.
Vivo homara, premate per reto de l' morto, ĝemadas.
Kian propraĵon la homo konservas eĉ kiam li mortis?
Kio lin nepre sekvadas, simile al ombro la propra?
Bon' kaj malbono; el ambaŭ la hom' kion faris surtere,
tion nur vere posedas li, kaj el la vivo kunportas;
tio ja lin akompanas, samkiel la propra korpombro.
Tial do ĉiu faradu bonagojn por sia estonto;
bono farita de vi, ne perdiĝos en spaco kaj tempo.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la persa

Ferîd-ud-dîn 'Attâr[1]
(ĉ. 1145 – ĉ. 1221)

Honesteco

Se regas honestec' en via psiko,
fariĝos tuta mond' al vi amiko,
kaj ĉiam ŝatos vin prudenta homo.
Sen honestec' ne daŭras fama nomo;
sen honestec' pereas sentimento
kaj la projektojn blovas for la vento.

La honesteco estas kiel bela
virino, ĉiam kunulin' fidela;
ĝi savas el mallumo kaj danĝero
kaj gvidas al la lumo kaj libero.
Sur dorna rozarbedo rozo tronas,
honestaj agoj nur bonfruktojn donas.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 فریدالدین عطار

El la pola

Adam Asnyk
(1838–1897)

La Feliĉo

Jen sur l' arbo birdeto
pri la homoj tre miras,
kiuj ja kun impeto
la feliĉon deziras.

Ili serĉas ĝin fore,
kie ĝi ne troviĝas;
frunto ŝvitas dolore,
la piedo vundiĝas.

Tag' post tago pasadas
en zorgado, laboro;
ĉiuj, jen, ĝin serĉadas,
tamen ne en la koro.

En malamo, kverelo,
hom' al hom' ĝin fortiras,
ĝis en tomba malhelo
li la vivon elspiras.

Miras tiun malsperton
la birdeto kaj penas
doni bonan averton;
sed neniu komprenas.

Rio Esperantista, n-ro 17 (aŭg/1948)

El la portugala

Djalma Andrade[1]
(1892–1975)

Ago de Karito

Mi volas fari bonon, sen aperi
kaj sen min tiam vidi iu ajn.[2]
Patrino, do permesu min esperi
ja vere bona esti, ne nur °ŝajn'.

Al mi sufiĉas, kion mi ricevis;
kaj se postrestas eble iu grajn',
mi portos ĝin kie ĝi esti devis;
mankante tie ĝi, estus malgajn'.

Patrino, nia Sinjorin' amata,
sur mia tablo manĝilaron plian
mi havos por la alvenont' malsata,

ke eĉ transpasante malfacilecojn
mi ja ne manĝos sola panon mian
se povas fari mi de ĝi du pecojn.

Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Poemoj el la libro *Versos Escolhidos e Epigramas*. [noto de Lorenz]
2 *kaj sen ke min tiam vidu iu ajn.*

Humileco

Fiero mia iĝu humileco;
povante esti pli, mi malpli estu;
pereu en mi stulta la vanteco;
mi de l' negrandaj plej malgranda restu.

Mi faru bonon, kun modesta deco,
kornoblo ĉiam plu sin manifestu,
ŝanĝiĝu ja en rozojn de boneco
la dornoj, kaj pri l' nobla ŝanĝ' atestu.

Dolorojn homajn mia mano bridu,
humilaj pli ol mi min ne enviu;
al mi venanta lum' l' aliajn gvidu.

Patrin', mi l' malriĉulojn amas, sciu,
en[1] io se ankoraŭ mi fieras:
ke plej humila mi min konsideras.

Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 *pri*

Mater Admirabilis

En la preĝejon kiam mi eniris,
estis la Sinjorin' apud Jesuo
kaj min rigardis; eble ŝi deziris
vidi kia sur min ŝia influo.

— Ĉu vi ne konas, Panjo, min? — mi diris —
Mi venis vidi vin, mi sur genuo.
Malbelaj pekoj kontraŭ mi konspiris
kaj agis kontraŭ via mi instruo.

En sankta la okul' mi vidas brilon;
mi kisas de l' mantel' la sanktan franĝon:
ĉu l' Panjo nun rekonas sian filon?

Ĉu eble nur iluzi' min °malkvietis?
Denove mi rigardis grandan ŝanĝon:
la Sinjorino al mi nun ridetis.

Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Rezigno

Akcepti la suferon kun silento,
ricevi malbonsorton eĉ sen plendi,
al Dio levi la penson de pento,
per martirec' animpuriĝon °mendi…

Sen vorto de protesto, sen lamento
sufoki eĉ la volon sin defendi,
fermi en si l' akrecon de l' turmento
…[1]

Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Lorenz ne finis la tradukon.

Virino Glora

Virinoj iuj per la ĉarm' konkeras,
venkante tiel de la vir' la koron
ke veran amon sian li liveras
al la virino kaj sian adoron.

Kareso en aliaj ekaperas:
de pura am' ili montras trezoron
kaj tie koro sin al kor' oferas,
pagante ĝoje per favor' favoron.

Mi scias ke ekzistas ja virinoj
de tiuj klasoj veraj de nobleco;
sed por mi ili ne estas destinoj.

Neniu ja egalas, per graco dia,[1]
en ĉarmo, en kares' kaj en boneco
al la naskiĝinta por esti mia.

Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Variaĵo: *neniu ja egalas, eĉ genia,*

Olavo Bilac
(1865–1918)

Maljunaj Arboj

Rigardu: l' aĝaj arboj eĉ pli belaj
kaj pli amikaj estas ol la junaj;
pli belaj tiom kiom pli maljunaj,
de l' aĝ' venkintoj kaj de l' ŝtormoj pelaj.

La hom', la bestoj kuras al fidelaj
iliaj ombroj, for de l' sagoj sunaj;
la branĉoj estas ŝirmoj oportunaj
al amo de l' kantistoj subĉielaj.

Amik', ni ne priploru la junecon;
ni maljuniĝu kun kontentridetoj
kaj kiel maljuniĝas l' arb-gigantoj:

En kor' ni portu ĝojon kaj bonecon,
donante branĉoŝirmon al birdetoj,
konsolon, ombron al la suferantoj.

Pernambuco Esperantista, n-ro 73 (aŭg/1945)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

La Rivero

En la ombra sin' arbara,
en la monta verda sino
estas de l' rivero klara
providenca l' origino.

Tre humila ĉe l' deveno
ĝi, senbrua maldikulo,
eta akva nur fadeno,
fuĝas for de l' suna brulo.

Ĝi penetras inter ŝtonojn,
plikreskadas, gaje kuras,
elparolas flustrajn sonojn,
jen ĝi kantas, jen susuras.

Al la sun' ĝi, ridetante
nun sentime sin liveras,
fluas, rokojn flankumante,
°kuŝas sin kaj reaperas.

Trinkas akvon de najbaroj,
tra l' deklivoj subenglitas,
saltas trans la rokaj baroj,
levas l' ondojn, ŝaŭmvomitas.[1]

Nun ĝi venkas, kun fiero,
de l' abismo la teruron;

1 *ŝaŭmvomas* (en la portugala, “vomi” estas *vomitar*)

en kaskad' kaj sub la tero
grandan sentas ĝi plezuron.

Forta, kuras ĝi, galopas,
plilarĝiĝas, fosas grundon,
per ondar' la valon ŝtopas,
portas al la kamp' inundon...

Tra cent mejloj la fortulo
etendiĝas, kun kantaro,
ĝis je l' fin', en sia rulo
ĉirkaŭbrakas ĝin la maro...

Sed en la triumfmajesto
de la marŝ' kaj venkkonkero,
kion de l' bonec' atesto
diras al ni pri l' rivero?!

Ke ĉe ĉiu paŝ' farata
de l' rivero fluopova
estis viv' de ĝi donata
per radik' al arbo nova.

Kiom ĝi da bon' faradis
kaj donacoj al petantoj!
La soifon estingadis
ĝi de l' birdoj kaj de l' plantoj.

Fonto de fortec' kaj sano,
distribuis ĝi abundon,

donis freŝon al l' urbano,
al la kampoj la fekundon...

Jen ekzemplo, sen mistero,
por la homoj kaj scienco:
estu kiel la rivero,
de la ter' la konscienco:

Ben' al hom', havanta forton,
ne nutranta kolerflamon,
se li servas ne la morton,
sed la vivon kaj la amon.

Pernambuco Esperantista, n-ro 73 (aŭg/1945)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Didi Câmara Cardoso

Muziko

Mi aŭdas la muzikon,
venantan el tre malproksime…
kaj mi en ĝi min sentas esti.
Ĝi estas dolĉa, ho, tre dolĉa
kaj mireginda,
ciklopa, nemezurebla,
ĉar ĝi estas la muziko de l' Kosmo,
kie ĉiu noto estas mondo,
kaj la notlinioj estas
la orbitoj de l' planedoj.
Mi aŭdas la muzikon gigantan,
la harmonion de l' astroj,
skribitan kaj ludatan en la lazuro.
Kiom milda kaj grandioza estas
la orkestro de la Universo.
Estas necese morti por aŭdi
la muzikon, venantan el malproksime…
la muzikon de la mondoj.
Estas necese morti,
ĉar ĝi estas la muziko de la Morto.

Pernambuco Esperantista, n-ro 77 (dec/1945)

Vicente de Carvalho
(1866–1924)

Lasu min, ho rivereto!

“Lasu min, ho rivereto”,
petis timema la flor'.
L' akvo, je spito de l' peto,
kantis kaj portis ĝin for.

“Lasu min, filo de l' fonto”,
ĝemis la flor', kun amar';
“mi, naskiĝinta sur monto,
timas glutiĝi de l' mar'.”

Vane la flor' petmurmuris;
l' akvo mokridis ja nur
kaj tra l' sablaro flukuris;
tremis la flor' pro terur'.

“Ve, miaj brančbalanciloj!
Ve, mia kara lulil'!
Ve, rosogutaj helbriloj,
miaj saŭdadoj vi mil!”

Ĝemis la floro, paliĝis,
ploris kun tim-konvulsi';
la rivereto ruliĝis,
ĝin forportante kun si.

“Vin adiaŭas mi, benaj
ombroj, kaj cin, najtingal';
vin, ho festetoj matenaj;
cin, dolĉa hor' de sunfal'.

Cin, karesema mildvento;
vin, lunolum' kaj stelar'.
Min ne forportu, torento,
cia fluad' al la mar'!”...

En vivofluoj mi tiel
kun la amrestoj de l' kor'
glitas malsupren, ja kiel
tiuj rivero kaj flor'.

Rio Esperantista, n-ro 6 (sep/1947)

Antônio Frederico de Castro Alves (1847–1871)

La Negrista Ŝipo[1]

Jen ni sur plena mar'... kun luna brilo,
orŝajna papilio, ludas l' ondoj,
volante ĝin atingi, kaj laciĝas
kaj kuras, kvazaŭ viglaj infanrondoj.

Jen ni sur plena mar'... de l' firmamento
la astroj saltas kiel ŝaŭm' de oro;
la maro ekbruligas fosforeskojn,
stelarojn de la fluidaĵ-trezoro.

Jen ni sur plena mar'... du infinitoj
brakumas sin, intima en spontano,
orflavaj, bluaj, grandaj. Kiu estas
ja la ĉielo? Kiu l' oceano?

Jen ni sur plena mar'... kaj brig' la velojn
malfermas al la varma ventoblovo,
kaj kuras kiel hirundeto, l' ondojn
pretertuŝante en la fluga movo.

1 Traduko de Leopoldo Knoedt troveblas en *Elektitaj Poemoj* (Universitato de Bahia, 1959) kaj en *La Negrista Ŝipo* (Fonto, 2016); tradukoj de Euleax Pereira kaj Joop Kiefte troveblas rete, ĉe https://hackmd.io/-iUruN5-RXyfVkPQuoK82w kaj https://eulenjejo.wordpress.com/2020/12/03/la-sklavisma-sipo-adaptita-traduko/.

De kie venas ĝi? Kaj kien iras
vaganta tiu ŝipo? Kiu scias?
En tiu ĉi Saharo multaj kuras,
galopas, sen postsignoj flugdevias!

Feliĉa estas kiu povas senti
de tiu sceno la majestan belon,
en la senlima spaco rigardante
senlimajn l' oceanon kaj ĉielon!

La mildventeto portas harmonion;
el malproksim' muziko dolĉa sonas.
Ho, kia ĝoj', sur mar' laŭvole naĝi!
Admiron tiu ĉarm' al mi °imponas.

Maristoj, vi kuraĝaj ŝiploĝantoj,
brunbruligitaj de la varma suno!
Infanoj vi, lulitaj de l' ventego
sur la lulil' de vaporŝip', aŭ skuno!

Atendu kaj permesu ke mi trinku
liberan tiun sovaĝpoezion,
en kiu l' ondoj tra la pruo muĝas
kaj vent' per kordoj siblas ampasion!

Ho, kial fuĝas ci, rapida ŝipo,
for de timema, paca la poeto?
Mi volus akompani la poststrion
similan, sur la maro, je kometo.

Ho albatros', dormanta inter gazoj
de l' nuboj, aglo de la oceano,
la plumojn skuu, donu al mi viajn
flugilojn, de la spaco levjatano!

—

Terura sonĝo!... sur ferdek-altano,
de la lumegoj en la ruĝa bano,
orgio de demon'...
ĉe skurĝokrakoj, fer-tintado gutas
sangeroj, kaj negraro ĝembalbutas,
dancaĉas laŭ ordon'...

Negrinoj kun malgrasaj maminfanoj,
en kies buŝojn el la suĉorganoj
patrina fluas sang';
timemaj junulinoj nudigitaj,
de spektroj en tumulton altrenitaj,
jen, kun angor' sur vang'!

Ridaĉas la orkestro ironia;
de l' rondo la serpento fantazia
moviĝas en spiral'.
Se laca maljunul' surplanken glitas,
skurĝado kaj ekkrioj lin ekscitas,
kaj daŭras la fi-bal'!

Hungrante, homa la amas' deliras;
per unu ĉen' ligata, ŝanceliras,
en danc' removas sin.

Frenezaj iĝas iuj, ekkoleras
aliaj, iuj ĝemas, malesperas,
kun rid' en halucin'...

Observas la ŝipestro la aeron:
promesas bonan tiu ĉi veteron,
kontenta estas li
kaj diras, inter densa tabakfumo:
“Ŝipanoj, faru pli da vipozumo
ke l' negroj dancu pli!”

Ridaĉas la orkestro ironia:
de l' rondo la serpento fantazia
removas sin, sen brid'.
Kiel en sonĝ' terura, pasas scenoj;
aŭdiĝas ĝemoj, preĝoj kaj malbenoj
kaj de Satan' ĝojrid'!

—

Ho Dio de l' malfeliĉuloj,
ĉu vere, mia bona Di',
okazi tiom da teruroj
senpune povas antaŭ Vi?!
Ci kial ne forviŝas, maro,
de cia vesto, per ondaro,
makulon tiun de Satan'?
Ho astroj, noktoj kaj tempestoj
ruliĝu maren, kiel pestoj!
Balau l' akvojn, uragan'!

Ne gravas scii de l' maristo
la patron aŭ patrujon, ĉar
maristo ĉiu, kun persisto,
la ritmon amas de la mar'.
Lin ne timigas mort-mieno.
La brig', tenata de l' buleno,
rapidas kiel la delfen'.
La flag', al la frontmast' ligita,
al la ondar' post si lasita
adiaŭdiras kun ĉagren'.

De la hispano la kantetoj
de ĝojo kaj melankoli'
memoras pri l' brunulinetoj
kaj andaluza am-ebri'.
Kantetas kun kor-emocio
pri la dormanta Venecio
l' ital', aŭ pri amor-ĉikan';
deklamas versojn li de Tasso
aŭ, en proksimo de lafmaso,
memoras spiron de l' vulkan'.

Vir' flegma, la maristo brita
naskiĝis ja surmare, ĉar
Anglujo estas ŝip', ankrita
de Di', de Manĉo en l' ondar'.
Li kantas de l' patruj' la gloron,
fiermemoras la venkhoron
de Nelson apud Abukir...
De la pasint' la laŭrojn kantas

kaj por estont' esperojn plantas
la franca kuraĝega vir'.

Maristoj de la ras' helena,
flegataj de l' jonmara kis',
la brunular' piratdevena,
sur mar' krozita de Ulis',
de Fidias' modeloj belaj,
deklamas, en la noktoj helaj,
kortuŝajn versojn de Homer'.
Maristoj vi, de ĉiuj maroj
vi scias trovi en l' ondaroj
la melodiojn de l' eter'.

Maristoj, kiel ne kompatas
vi je l' malĝoja nigra gent',
sed ridas, kiam ĝin skurĝbatas
la turmentanto sen homsent'?
Pri ili se la stel' silentas,
pri ili l' ondoj ne lamentas,
kunkulpaj eĉ, sen propra vol',
de l' nokto antaŭ la konfuzo,
parolu ci, severa Muzo,
libera estu la parol'!

De varma la dezert' gefiloj,
gvidataj simple de l' Natur',
la tribo vivas ĉe l' sunbriloj
sen la postuloj de l' kultur'.
La nigraj viroj, tre kuraĝaj,

ĉasluktas kun tigroj sovaĝaj
en vivdanĝera pozici'!
Hieraŭ ili fortaj, bravaj,
hodiaŭ, ve! estuloj sklavaj
sen lum', aer', raci'!

Jen malfeliĉaj la virinoj
el hejm' rabitaj de l' korsar',
malfortaj, lacaj, kun destinoj
similaj parte al Hagar',
portantaj filojn kaj katenojn
surbrake, kaj en kor' malbenojn,
survange larmojn kun anhel'.
Kiel Hagar' suferas ili,
ĉar eĉ ne povas ja utili
senlakta mam' al Iŝmael'.

Naskiĝis belaj infanetoj
ĉe l' palmoj de la hejma land';
knabinoj sen fatmalkvietoj,
kontentaj vivis kaj sen vant'.
Sed pasis tie karavano:
nun, junulino de l' kabano,
sklaveco venas, aŭ pere'!
Adiaŭ, ho kaban' de l' monto!
Adiaŭ, palmo de la fonto!
Adiaŭ, amosonĝoj, ve!

Sablejon pasas band', la krima,
la negrojn traktas per terur';

kaj ĉie horizont' senlima
dezerton, polvon montras nur.
La negrojn plagas, sen modifo:
laciĝo, hungro kaj soifo,
subita eĉ mortiga fal'.
Mortinton oni nur forpuŝas
kaj lasas, kie ajn li kuŝas;
lin trovos certe la ŝakal'.

Hieraŭ, nigra vir', vi ĉasis
leonon kun batalpasi';
la lukto vin ne embarasis,
kaj post la venko dormis vi.
Kaj nun, jen la ŝipkel' profunda,
mallarĝa, malsanĝerm-abunda,
kun pest' anstataŭ jaguar'...
kaj dormo ĉiam rerompata,
kadavron kiam mort' malsata
oferas novan al la mar'!

Hieraŭ, plena homlibero
kaj povo vivi laŭ dezir'.
Hodiaŭ, tiom da sufero,
kruela pli ol mort-elspir'!
Per sama ĉen' la tuta gento
ligita de l' viroj sen sento,
la morton mokas en malsaĝ',
kaj dancas en frenezaj rondoj
ĉe l' son' de l' vipo kaj ĝemondoj.
Ho, kia honta vidaĵaĉ'!

Ho Dio de l' malfeliĉuloj,
ĉu vere, mia bona Di',
okazi tiom da teruroj
senpune povas antaŭ Vi?!
Ci kial ne forviŝas, maro,
de cia vesto, per ondaro,
makulon tiun de Satan'?
Ho astroj, noktoj kaj tempestoj!
Ruliĝu maren, kiel pestoj!
Balau l' akvojn, uragan'!

Esperantista Bahiano, n-ro 4/7 (apr/1947)
La Negrista Ŝipo: Esperanto-Grupo de Bahia, 1947.
Almanako Lorenz 1986

Manuel Batista Cepelos
(1872–1915)

En Grekujo

Malfrue venis mi al la malgaja loko:
terura la silent' gravigas tempon krizan.
En pasint' mergiĝas longe jam l' epoko
en kiu la homaro aŭskultadis Pitonizan.

Pereis jam Helad' kun la antikvaj dioj
sub senrespekta vent' fatala de insulto.
Mutiĝis en Eleŭzi' la famaj liturgioj,
ne adoriĝas Ceres plu per templa kulto.

Ĉu pensos iu tie ĉi pri Maratono,
aŭ diros ke mi nun paŝadas sur Parnaso?
Aŭ ĉu rekonos li en ĉi la regiono
patrujon de la glora Odisea raso?

Senhonte la Sultan' invadis tiun landon,
tra kiu paŝis iam Marso, la ĉiela;
hordar' profanis ĝin kaj ĝian kulturgrandon,
kaj falis kun brueg' l' epok' de l' arto bela.

Trezoroj, kult', armeoj kaj saĝulaj revoj,
Korinta bronz', de Paros, pasis ĉio
samkiel fluge pasas la malpezaj mevoj
tra l' blua atmosfer' dum tag' de sunradio.

Studado de l' pasint' dolorojn multajn trovas:
detruas Tempo kaj de l' homoj la perversoj;
feliĉa estas do nacio, kiu povas
revivi en kolekto de antikvaj versoj.

Ne mortis ja Grekuj'; por reveko sia
el nuna dekadenc' kaj malfortec' ĝi havas
Homeron, Sapfon kaj Sofoklon, kun gracia
Anakreono: ili ĝin de morto savas.

Pernambuco Esperantista, n-ro 61 (aŭg/1944)

João da Cruz e Sousa
(1861–1898)

Karcero de l' Animoj[1]

Animo ĉiu ĝemas en karcero,
metita en mallumon inter kradoj,
tra kiuj ĝi rigardas kun saŭdadoj
al maroj, steloj, la natur' kaj tero.

Dum ĉio ĝoje floras en l' ekstero,
l' animo katenita al revadoj
rifuĝas kaj en siaj rev-invadoj
vizitas senmortecojn de l' etero.

Ho, vi animoj mutaj, arestitaj
kaj en karceroj egaj forlasitaj
malgaje al dolor' de l' mallibero:

En la silent' ermita ĉu vi trovos
ĉiel-pordiston, kiu al vi povos
malfermi la pordegojn de l' mistero?!

Pernambuco Esperantista, n-ro 43–45 (feb–apr/1943)
O Brasil Esperantista, n-ro 346–348 (apr–jun/1943)
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Vidu ankaŭ la mediuman poemon *Astralaj Karceroj*.

Rido

Ne ŝajnas ke en tiu ĉi jarcento
la rido estas ĉiam ĝoja krio.
Ni ridu, sed ne kiel sen talento
simpluloj ridas, sen filozofio.

En nia rid' impet' kaj sentimento
parolu, kiel montras la genio,
kun rid' detrua, sed kun varma sento
de profunda, tragika ironio.

Plivole ploru! Pli facile ploro
lumigas, varmon donas al la koro
en la glacia nokto de l' ekzisto.

Preferu plori ol ridi malĝoje.
Por bone ridi, ridu ĉiufoje
nur kiel Heine, de la rid' artisto.

Pernambuco Esperantista, n-ro 43–45 (feb–apr/1943)
O Brasil Esperantista, n-ro 346–348 (apr–jun/1943)
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

La Steloj

En regionoj de l' ĉiel' gigantaj,
en la melankolia fon' de l' sfero,
sur vojoj de la amo kaj espero
eternaj, jen la steloj pulsadantaj.

Ho, kiom da animoj, dezirantaj
la solvon de l' mister', aŭ de l' kimero,
ĝin serĉas en la paco de l' etero
ĉiela, ĉe la steloj radiantaj!

De perloj kaj arĝento floroj belaj,
emanas de l' ĉielaj steloj helaj
torente ĉiaj revaj iluzioj.

Kaj — kiu scias? — eble la lumglitaj
steletoj estas la veoj perditaj
de l' suferantaj praaj homlegioj?!

Pernambuco Esperantista, n-ro 43–45 (feb–apr/1943)
O Brasil Esperantista, n-ro 346–348 (apr–jun/1943)
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Joaquim Osório Duque-Estrada (1870–1927)

Brazila Nacia Himno[1]

De Ipirang' la mildaj bordoj aŭdis, jen,
eĥantan[2] krion de heroa gento,
kaj de l' liber' la sunradioj brilis tuj
de la Patrujo sur la firmamento.

Do se ni[3] de l' egaleco
garantion konkeris per brako forta,
en la sin' de l' libereco
nia brust' defias eĉ je frapo morta.

Patruj' amata,
adorata,
vivu! vivu!

1 Traduko de Sylla Chaves troveblas en *Brazila Esperanta Parnaso* (memeldono, 2007).

2 El letero de Lorenz al Ismael Gomes Braga (29/06/1942): "Legante pri la *Kanto de l' Ekzilo* mi ekmemoris ke jam kelkafoje mi estis decidinta skribi pri unu erarita vorto en mia traduko de la brazila himno, sed ĉiam mi forgesadis pri tiu decido: nun, fine, mi ĝin efektivigos, kaj estas jena: en la dua linio mi skribis, kaj la revuo B.E. presis, *eĥoan*, kiel se ekzistus en Esp° radiko *eĥo*, sed devus esti *eĥozan* aŭ *eĥantan*. La eraro estis mia, ĉar mi ne ekmemoris ke la radiko estas *eĥ*. Tial mi petas, ke Vi *okaze* korektu ĝin." [el *Komunikoj*, n-ro 140 (okt–dec/2010)]

3 *ni*, kanti en du °notoj. [noto de Lorenz]

Brazil', intensa sonĝo kaj radi' de am'
kaj de esper' descendas al la tero,
se brilas de la Suda Kruc' la bela bild'
en via milda purĉiel-etero.

Giganta per la propra naturfonto,
koloso forta estas vi, sentima,
grandecon vian montras ja l' estonto.

Land' adorata,
ĉe l' landoj mil,
estas Brazil'
Patruj' amata!
Vin servi volas ĉiu via fil',
land' amata,
Brazil'!

Eterne en riĉega lit' kuŝante, vi
ĉe l' son' de l' mar' kaj alta lum' ĉiela,
Brazil', sub sunradioj de la Nova Mond'
brilegas, Amerika perlo bela!

Ol bellandoj ajn aliaj
havas viaj plaĉaj kampoj pli da floroj,
pli da viv' arbaroj niaj,
nia vivo pli da amo en la koroj.

Patruj' amata,
adorata,
vivu! vivu!

Brazil', simbolo estu de eterna am'
steloza via flago kvarkolora;[4]
la verdo-flavo de l' standardo diru ja:
Pac' en estonto, la pasinto glora!

Sed se per justa glav' vi diros vorton,
ne fuĝos viaj filoj for de l' lukto
kaj vin amante, ne timos la morton.

Land' adorata,
ĉe l' landoj mil,
estas Brazil'
Patruj' amata!
Vin servi volas ĉiu via fil',
land' amata,
Brazil'!

O Brasil Esperantista, n-ro 302–303 (jul–aŭg/1941)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

4 Kvarkolora, °kalkulante ankaŭ la blankon. [noto de Lorenz]

Odegar Dy

Maria

Mi Vin salutas, de Jesu' Patrino,
Dia Virin', kaj preĝas mi laŭ Vi,
Gracplena, kun esper' ke Am' de Di'
nin benos pro la Am-konjugaci'.

Plorigis Vin de l' Fil' sur kruc' doloro,
Morttukon al Li teksis manoj Viaj,
Maria, karna kruc' de l' mensoj piaj,
Patrina krucumita, pura koro!

15/06/1951

Esperanto-Aldono, n-ro 115 (feb–apr/1977)
Komunikoj, n-ro 139 (jul–sep/2010)

Afonso Celso de Assis Figueiredo Júnior (1860–1938)

Ĝojoj

Ĉe la fenestro de la dom', loĝata
de malĝojema maljunul', ermito,
aperas ofte idilio flata:
de birdetpar' trilanta la vizito.

Gracie ĉarmas de la delikata
pareto saltetada la ekscito!
Sed ĉe l' unua ekbruet' aŭdata
la paro tuj forflugas, sen hezito.

Ha! miaj ĝojoj, al la birdvizitoj
similaj estas vi en la kvalitoj:
malfortaj, de fuĝema, tima mor'.

Vi per kuraĝ' ornamas min en provo;
mi volas teni vin, sed ĉe l' manmovo
vi min forlasas, tuj fuĝante for!

Du tajpaĵoj el la arkivo de Jandira Lorenz

Abel Gomes
(1876–1934)

Hirundetoj[1]

Hirundetoj! Mi rigardas
vian flugon kun envi'.
Se mi ankaŭ flugi povus,
mi ne restus sola ĉi.

En malgaja la soleco
mi kontente flugus for,
flugus mi viziti iun,
kaj ekĝojus mia kor'.

Se mi havus la feliĉon,
el l' altaĵoj de l' aer',
kiel vi, birdetoj, vidi
mirindaĵojn de la ter'!

Mi dezirus flugtrakuri
nun la spacojn, ho, sen fin'...
Hirundetoj, hirundetoj,
kiom mi envias vin!

Pernambuco Esperantista, n-ro 62 (sep/1944)

1 Vidu ankaŭ la samtitolan mediuman poemon.

La Kredo

Bonec' kaj Amo estas Di'. Fandiĝis plena
en grandan feliĉecon malfeliĉo mia
ĉe l' lumo de la kredo; ĉar kun kredo pia
naskiĝas al la afliktit' konsolo bena.

Mi suferadis; mia menso tre ĉagrena
pro la dolor', kreita de la dub' mania,
senĉese ĝemis, sub la nekredem' pasia
kaj malfeliĉa senkuraĝigado splena.

Nun mi feliĉa estas. En la suferitaj
doloroj vidas mi la partojn de l' venkitaj
antikvaj kulpoj, kaj deliktojn de l' iamo.

Alportas novan ĉiu tag' al mi esperon;
doloroj suferitaj memorigas veron,
dirantan: Dio estas ja Bonec' kaj Amo.

Pernambuco Esperantista, n-ro 61 (aŭg/1944) kaj n-ro 69 (apr/1945)

Ni havas Jesuon

La malnovan mondon mallumeg' faligas;
la milito kiel lup' viandogluta
veron minacante, kredon humiligas
en torturoj novaj de sklaveco bruta.

Sed en la vortico de l' ombreg' sin ligas,
fratoj, al vi la Amiko absoluta,
kiun ne la rekompenc', sed Am' instigas
servlabori por la Bon' de l' mondo tuta.

Jen, la Tero havas krimojn kaj tiranojn,
ambiciojn, deliraĵojn, vanajn planojn,
kaj krudecojn multajn de l' homar' kaverna:

Sed Jesuon havas vi je ĉiu horo.
Ni laboru do, en ĝojo aŭ doloro,
por konkeri lumon de la Viv' Eterna.

Pernambuco Esperantista, n-ro 69 (apr/1945)

Ricardo Gonçalves
(1883–1916)

Malnova Bieno

La longajn tagojn pasas mi ĉi tie,
en izolej', sen ĝojoj, sen angoroj,
vidante birdojn flugi kruclinie
kaj la pajnujojn[1] vesti sin per floroj.

Mi loĝas sola ĉi, sen akompanoj,
en ombra, stranga dom' kun ĉambregaro;
ĉirkaŭe estas de l' bien' kabanoj;
ĉe l' fon' la blu-figuro de l' montaro.

Ĉe l' orlo de l' virga arbar' mistera
ĝemas la turb', al la nid'[2] revenante
en la pensema silento vespera,
kaj patativoj[3] trilas dolĉakante.

Mi vidas, ĉe l' fenestro kliniĝante,
ke inter l' arbetaroj ne tro belaj,
flavbrunĉaj ipeoj[4] kreskas gigante,
kaj perobujoj[5] kurbaj kaj malhelaj.

---

1 *Pajnujo* (port. *paineira*), vegetalo kiu produktas "pajno"-n, specon de kotono. [noto de Lorenz]

2 *nest'* (*nido* en la hispana kaj en la itala, el la latina *nīdus*)

3 *Patativo*, speco de brazila birdo. [noto de Lorenz]

4 *ipeo*: komunuza nomo de diversaj arboj el la familio *Bignoniaceae*, belfloraj kaj oftaj en Brazilo, precipe el la genroj *Handroanthus* kaj *Tabebuia*.

5 *Perobujo*, brazila arbo bignoniaca. [noto de Lorenz]

La lun' malgaja poste sin enmetas
sur la opalĉielon; kaj tra l' kampoj,
super la akvoj de l' lago dancetas
lampiroj kaj lumetas kvazaŭ lampoj.

Susuras strange nun la densarbaro;
la nokt' somera havas tian brilon
ke, kvazaŭ en malhelarĝent', ĵusaro[6]
sur montkulmino pentras la profilon.

Eniras mi, lignetojn ekbruligas
kaj, ĉe l' aŭdad' de fora bru' kaj krakoj,
tragikajn negro-dancojn memorigas
kaj sonojn de tambur' kaj atabakoj.[7]

O Brasil Esperantista, n-ro 308-310 (jan–mar/1942)

6 *Ĵusaro*, speco de palmo. [noto de Lorenz]

7 *Atabako*, muzika instrumento, de origino hinduja; simila al la cimbalo. [noto de Lorenz] (ĉi tie ŝajne Lorenz plene konfuziĝis, ĉar la atabako estas tamburo de afrika deveno!)

Antônio Gonçalves Dias
(1823–1864)

La Tempesto

Radio
ekflagras
sur faco
de l' spaco
de hel';
ĝi ĉarme
tremetas,
briletas,
brilegas
ĉe l' pura
ĉiel'.

Jen, l' aŭroro
urĝiĝanta,
ridetanta
kun koloro
de karmin',
nun alvenas,
kaj la belaj
lumoj stelaj
ĉiuj svenas
jam je l' fin'.

La sun' lumigas
la horizonton,
oras la fonton,
kampon kaj monton,
bordon de l' mar';
jen, bela vesto
de hel-koloroj,
ornam' de l' floroj,
kiuj briladas
inter verdar'.

Nun sur la ĉielo
punkto de malhelo
vastiĝas per ŝvelo
en nigra malĝoj';
tempesto ribela,
senbrida, sed bela,
leviĝas anhela,
preta por bru-boj'.

Ne kantas je ĉi horo
l' arbara bard' flugila,
kies saluto trila
aŭdiĝas ĉe l' aŭroro.
Mutiĝas en tervasto
eĉ ĝia kantsopir'.
Ekbrilas plumoj ĝiaj,
kaj malrapide fluas
la sonoj melodiaj

el ĝia brust', premita
per tiom da inspir'.

La orneĝaj nuboj fuĝas
antaŭ la siblanta vento,
kiel ŝaf' antaŭ la dento
de l' malic-kruela lup'.
Ili dispeciĝas, kiel
dum la marvetur' kuraĝa,
sub la uragan' sovaĝa
fortaj veloj de ŝalup'.

Similaj al serpent', per frosto
ennodigita, l' ondoj salaj
sin ligas kun krioj batalaj
kaj batas la sablon de l' plaĝ'.
Demonajn fantasmaĉojn[1] el la
ĉiel-kavernoj oscedantaj
pafadi ŝajnas la gigantaj
akvondoj dum sia alnaĝ'.

Nun ekbrilis dum moment' ekflamo
inter cindroj de la firmamento;
ĝi aperis ĉe la okcidento,
tamen ne ekbrulis la nubar';
tuj trembrilas fulmo, dua, tria,
kaj aliaj sorĉe en l' aero,

1 *fantomaĉojn* (en la portugala, “fantomo” estas *fantasma*). En la tajpaĵo el Biblioteko Carlos Domingues iu(j) (ĉu Lorenz mem?) korektis per *ja fantomojn*.

rapidege, kiel se fajrero
jam fariĝas da brulegoj mar'.

Son' malproksima, raŭka peze bruas
kaj baldaŭ en la spac' vastega mortas;
alia, pli proksima, krude skuas
la montajn pintojn, ilin ĝi perfortas,
eksplodas, tondras, branĉojn ĝi detruas,
de Nord' al Sudo fluge sin transportas;
glutema fajro en l' aer' manovras,
dum peza nokt-mantel' la marojn kovras.

Sur lastaj la pintoj de l' montoj altegaj
jam siblas bruege de l' vento inund';
la branĉoj de l' verda palmar' en l' aero
kurbiĝas, turniĝas en salt' de kolero
kaj fine, splitite defalas al grund'.
Agite moviĝas la verto de l' trunkoj,
deliras kaj ankaŭ defalas al ter';
la vento, skuanta la rokojn, fiera
ekprenas la trunkon per mano, la fera,
kaj teren forĵetas ĝin ĝia koler'.

Ŝiriĝas de la nubo alt-ondanta
la nigra ventro, multe jam ŝarĝita,
ĉe l' fulmolum', la sunon ruĝiganta,
kaj de la pluvo forta pezo ŝvita
surteren falas, kaj la troe-kvanta
likvaĵo, en vorticon transformita,

alportas grandan, ruinigan plagon,
ŝajnante ŝanĝi teron ja en lagon.

Kaj ankoraŭ tondro eĥe gruntas,
kaj la fulmo pafas en la spaco,
kaj fajrero ĝia brilon pruntas
por moment' al ter', kaj fuĝas for.
Tamen se ĝi al la ter' descendis,
mortsekigas ĝi l' arbaran trunkon,
kaj la fortan rokon, kvazaŭ junkon
fendas ĝia blinda malfavor'.

Lasante la simplan kabanon,
propraĵon de l' hom-malriĉeco,
de nia vantema grandeco
kuradas ĝi al la kulmin',
kaj baldaŭ la temploj, kasteloj,
moskeoj, palacoj granitaj,
de l' tempofalĉilo ŝparitaj,
fariĝas nur polvo, ruin'.

Kreskas pluvo, kreskas fulmoj,
riveretoj tropleniĝas,
kaj en l' akva flu' ruliĝas
dikaj trunkoj el l' arbar'.
Marĉ', hieraŭ preskaŭ seka,
en la nuna ĉi momento
ŝajnas esti jam torento
kaj simili al la mar'.

Sed ve! se hom' vidinta
l' inundan pluvofalon,
descendas, kvazaŭ blinda,
en akvoriĉan valon,
en kiu ambaŭflanke
danĝeroj kaŭras mil!
La trunkoj eltiritaj,
naĝantaj sen direkto,
tegmentoj forportitaj
ne servas por protekto,
kaj estas voj' al morto
pli certe, ol azil'!

Sed en okcidento
venas por kontento
lum' de pia sento:
l' arko de l' ĉiel';
de belaj koloroj,
similaj al floroj,
de l' diaj trezoroj
estas ja juvel'.

L' arko sur akvo
kaj lum' baziĝas,
kaj ĝia verto
alten leviĝas
en l' atmosfer'.
Ankoraŭ dua,
sed iom pala,
aperas kvazaŭ

sub tol' vuala
el la eter'.

Tiel pluvo,
kiam falas,
sin vualas,
se aperas
suna rid';
tiel ankaŭ
knabineto
jen ĝemetas,
jen ridetas
kun konfid'.

Folio
brilanta
altiras,
ĝojanta,
rosguton
kun prem';
kaj ĝi sin
agitas
kaj kreskas,
kaj glitas,
falante
kun trem'.

Pernambuco Esperantista, n-ro 54 (jan/1944)
Brazila Esperantisto, n-ro 568–571 (jul–okt/1961)
Tajpaĵo el la kolekto de Biblioteko Carlos Domingues

Sebastião Gonçalves Leite
(1881–1952)

Al Martins Fontes

Ju pli forflugas tiu tag', genio,
el vivo kiam pasis vi al morto,
de via nom' pli kreskas la brilforto
kaj pli radias via poezio.

Ĉar vivis vi en plena harmonio,
donante l' am-belecon al la sorto,
kaj, siavice ĝi, por la rikolto
vin segis dum majesta lum-vizio.

Mi vin imagas en la rememoro,
kaj ke belkantas dum suntago nia
en la ĉielo, via granda koro.

Kaj vin benante, kvankam sen stilbrilo,
la lumon kisas mi de nomo via
— ĉar de l' patruj' vi estis granda filo.

Pernambuco Esperantista, n-ro 55–56 (feb–mar/1944)

La Sola Floro

Kiam mortis l' iluzio lasta,
mi de l' kor' en la ĝardeno vasta
plantis florojn de la amikeco,
kiujn akvumadis mi per ploro;
sed elkreskis nur malgaja floro
de *saŭdad'*, la sola daŭra speco.[1]

Pernambuco Esperantista, n-ro 53 (dec/1943)

1 En la portugala lingvo "saudade" = *rememoro, resopiro,* estas ankaŭ la nomo de la floro skabiozo; tial la poeto faras belan alegorion: li plantis florojn en la ĝardeno de sia koro, sed nur resopiroj tie kreskas. [noto de la redakcio de *Pernambuco Esperantista*]

Carlos de Laet
(1847–1927)

Malĝoja Filozofio

Rozinjo vestas sin kaj, jen, amara,
mirinda voĉo el la vest' eliras:
“Multegaj mortas ni”, la voĉo diras,
“ke kovru vin la silka ŝtofo kara.”

Kaj poste el kombilo la porhara,
l' ost' elefanta al Rozin' sopiras:
“Ke mi vin servu, mortis — ĉu vi miras? —
korpego mia en densej' arbara.”

Kaj diras de l' kolringo perlo bela:
“Por kapti min, ha! kiom da parioj
en mar' pereis, en afliktaj sortoj!”

Kaj ploras la knabin': “Ha! fat' kruela!
Naskiĝas la ridet' el mil vekrioj,
teksiĝas tuta vivo el mil mortoj!”

Rio Esperantista, n-ro 15 (jun/1948)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Antônio Eliezer Leal de Souza[1] (1880–1948)

Kristo

Ekflugis mia penso for de l' tero,
tra songĝ kaj nuboj; nun al mia vido
ĉe l' sun' aperas Krist' kiel fluido
ŝvebanta tra l' bluruĝo de l' vespero.

En mikso de aflikto kaj espero
vid' Lia pasas de l' ĉiel', kun fido,
al kampoj, montoj, val', kaj kun bril-gvido
malfermas tabernaklojn de l' etero.

Glav-boras Lian koron la doloraj
malnovaj kaj l' amaraj novaj krioj,
nun kunvokitaj el distancoj foraj.

Kaj Liaj puraj manoj al nacioj
pasintaj donas pardonon, amploraj,
kaj benon al la nov-generacioj.

Pernambuco Esperantista, n-ro 53 (dec/1943)
O Brasil Esperantista, n-ro 358–360 (jan–mar/1944)

1 Poemoj el la libro de versoj *Bosque Sagrado* = Sankta Arbareto. [noto de Lorenz]

Pluva Tago

La nokta ombro kun la pluv' abundas,
l' aeran spacon la malgaj' inundas.

Kiel reflektoj de mortinta stelo
tra l' urbo krakas flavaj lumoj ĉarmaj,
dismetaditaj kun trembrila helo.

Al l' ombroj for de la lumoj malvarmaj
moviĝas formoj, pasas homfiguroj;
sopiroj longaj, veoj kvazaŭ larmaj
eliras el la brust', aŭ ĝem-murmuroj.

Tre alte, inter nuboj, minacantaj,
flamantaj ruĝaj fulmoj, jen, koleras,
kaj sube vagas personoj revantaj;
sed kie florojn trovi ja esperas,
renkontas ili dornojn tre pikantajn.

Malgajaj kaj seniluziigitaj,
surstrate tretas kotan malornamon
maljunaj homoj, herooj venkitaj,
perdantaj preskaŭ de la viv' la flamon;
kaj vagas junuloj neprotektitaj,
sed destinitaj havi gloran famon.

Pernambuco Esperantista, n-ro 57–58 (apr–maj/1944)

Arlindo Castor de Lima
(1917–2007)

Demandoj

Ho panjo, kial, tiu je beltago,
de ni foriris nia patro kara,
ĉe l' akompan' de vico junulara,
al l' urbo, kaj kun tiu stranga flago?

Ni ne plu sentis, eĉ ja en imago,
kareson lian, kaj saŭdad' amara
la koron premas ĉe l' memor' ekstara
ke li forlasis min per tiu ago.

Hieraŭ ĉe la pordo, panjo, vi
leteron ricevinte, tuj ekploris;
ho, kial? Ĉu la kor' vin ekdoloris?

Kaj kion ja signifas tiu ĉi
vestaĵo nigra? Kial vi sopiris?
Kaj kien mia paĉjo do foriris?

Pernambuco Esperantista, n-ro 77 (dec/1945)

Joaquim Maria Machado de Assis (1839–1908)

La Floroj kaj Pinoj

Mi vidis la pinarbojn sur la monto,
maljunajn kaj malglatajn;
ĵus en la val' malfermis ruĝkalikoj
la florojn delikatajn.

De l' mont' la pinojn moke rigardante
malsaĝaj la floretoj
la ĉirkaŭantan spacon plenigadis
per gajaj rid-elĵetoj.

L' aŭtuno venis: la surmontaj pinoj
vivadas, jen, senĝemaj,
kaj neĝoblankaj, en la vent' moviĝas
la branĉoj meditemaj.

La lokon mi rigardas, kie mokis
la ridoj de l' koloroj;
mi vane ilin serĉas, ĉar jam mortis
la mokridemaj floroj.

Rio Esperantista, n-ro 18 (sep/1948)

José Martins Fontes
(1884–1937)

Al mia Patro

Vivi signifas kompati kun am', rezignante;
en la ĉiel' kaj muziko resumi l' esperon,
kaj adorante la belon, la bonon servante,
revi l' animan liberon!

Ami signifas la memon al Tuto oferi,
renaskiĝante daŭrigi de l' kor' la turmenton,
en l' efemera brilad' de l' homvivo konkeri
de l' senfinec' l' antaŭsenton!

Morti ne estas nur °ĉesi l' ekzisto, sed iel
esti estinta, postlasi de l' am' iun floron,
reekaperi en formo diversa kaj tiel
doni al Vivo la gloron.

Pernambuco Esperantista, n-ro 49 (aŭg/1943)
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Arabesko

Mirante pri l' ĉielo,
parolis Roz' al Stelo:
“Al ci
neniu bel' egalas;
la glor' cin malvualas,
hela lumil' de Di'!”

“Ci, Roz'”, la Stelo diras,
“kial min larme miras?
Dolor'
eterna min turmentas;
ci tagon nur °ĝin sentas,
feliĉa, bela Flor'!”

Pernambuco Esperantista, n-ro 38–40 (sep–nov/1942)
O Brasil Esperantista, n-ro 317–319 (okt–dec/1942)

En la Ĝardeno de l' Poetoj

Al la senzorgaj, mildaj birdetoj
kaj al la floroj,
estu similaj vi, ho poetoj,
revantaj koroj.

Ĉio forpasas ĉi en la mondo
jam post momento;
tuj estingiĝas vento kaj ondo
en la silento.

Serĉu nenion; estas la gloro
nur iluzio,
kvazaŭ ne daŭra, trompa vaporo,
kiel ja ĉio.

Kantu, la vivon dolĉe parfumu,
ke ĝi sentema,
bona estante, bele eklumu,
gemo poema.

Kion l' aminda birdo deziras
havi pro l' kanto?
Kion la floro, ke ĝi elspiras
ambron en kvanto?

Pagon neniun. — Floro de dubo,
kolorfiktivo,
ombro, nebulo, ŝaŭmo kaj nubo
estas la vivo.

Kiel la birdoj, kiel la floroj
faru, poetoj,
ke plimildiĝu niaj doloroj
kaj malkvietoj.

Pernambuco Esperantista, n-ro 53 (dec/1943)

Parolado de Sankta Francisko de Assisi al la Hirundoj

Gefratoj miaj, karaj hirundetoj,
en nomo de l' simpleco laŭnatura,
beniĝu ĉio, de l' timaj herbetoj
ĝis frato Suno en la spac' senmura.

Kaj estu miaj viaj humilpetoj,
kaj estu mia via ĝoj' plezura.
Liberaj vivas vi en societoj,
en kristanisma komuneco pura.

Am-kiso l' universo tuta estas,
kaj ĝian senfinecon Am' atestas.
Nin unuigu am' kaj preĝ' al Di'!

Laboro estas preĝo. Di' favoras
l' estulojn bonajn, kiuj ja laboras
kantante gaje. Do laboru ni!

Pernambuco Esperantista, n-ro 38–40 (sep–nov/1942)
O Brasil Esperantista, n-ro 317–319 (okt–dec/1942)
Brazila Esperantisto, n-ro 474–475 (sep–okt/1953)

Penso de Floro

Tre firme fermu vin, se vi suferas
kaj tiel se la kaŭz' afliktas vin,
ke kiel vian devon konsideras
nek[1] al amiko vi rakonti ĝin.

Lin ne ĉagrenu. Kaj se vi preferas
per amo vivi, nur por am-inklin',
vi ĝojos, ke vi eblon ne oferas
ke iu ajn pro vi afliktu sin.

Vi kion diros, estu konsolanta;
ne paroladu pri via dolor',
eĉ se ĝi estas nigra, kortranĉanta;

ĉar siajn plendojn disvastigas for
nek la anĝeloj, nek virin' amanta,
nek la purec' de ajna granda kor'.

Pernambuco Esperantista, n-ro 53 (dec/1943)

1 *eĉ ne*

Saŭdado — Floro de l' Foreco

Saŭdado — de saŭdad' alia,
malaperinta de la sceno,
saŭdado de juneco mia,
ĝin kaŝas de la viv' ĝardeno.

Ĝi kaŭzis, ke per larmo sankta,
kiun eltiris la dolor',
per lumo en la viv' kreskanta
duonmalfermis sin la flor'.

Flor', maljunecon parfumanta,
veninta el junaĝo mia
kaj, sen paroli mi,[1] diranta:
Saŭdado — de saŭdad' alia.

Saŭdado — floro de l' foreco,
parolas pri l' gepatra am',
pri l' rozkolora infaneco,
kiu plu ne revenas jam.

Pri vir', estinta esperplena
dum sia floraĝa vivado,
nuntempe maljunul' ĉagrena,
iĝanta knabo en saŭdado.

1 *sen ke mi parolu*

Kaj pri virin', estinta flor',
sed nun vivanta kun penado,
kun la saŭdado kaj dolor',
kaj kiu mortos kun saŭdado.

Saŭdado! dolĉa ci parfumo,
pli dolĉa ol miel' por brusto;
sed ci forflugas kiel fumo,
kaj poste restas gala gusto.[2]

Pernambuco Esperantista, n-ro 53 (dec/1943)

2 En la originala lingvo, la vorto *saŭdado* estas la nomo de l' floro skabiozo kaj de la sento de soleco pro foresto de amata persono (=resopiro, rememoro); tial la poeto vortludas per la vortoj: saŭdado estas floro, saŭdado estas sento. [noto de la redakcio de *Pernambuco Esperantista*]

Sonĝo pri Donado

Nenio estas mi, ne havas ion;
tagnokte tamen pentras mia pens'
la belan, tre konsolan sugestion:
se mi donadi povus kun intens'.

Dormante, mi prisonĝas ĝoje tion
kaj havas ĝuon de interna sens':
radii, kiel Suno, harmonion
al ĉiu hejmo, ĉiu kor' kaj mens'.

Posedi nur por ĉion ja disdoni!
Al ĉiuj doni frate, kun fervor',
mirakle pri la stel-trezor' disponi…

Donadi, sen eĉ pensi pri esplor';
de l' Sun' kaj patrin-am' sekreton koni:
kiel multiĝas ĝi en bona kor'.

Pernambuco Esperantista, n-ro 38–40 (sep–nov/1942)
O Brasil Esperantista, n-ro 317–319 (okt–dec/1942)
Poŝtkarto eldonita de F. V. Lorenz Esperanta Grupo (Santos, Brazilo)

La Vizaĝo de Mia Filo

La vangoj de tiu infano,
skulptitaj en mian memoron,
similas, en brilo de l' sano,
de bela rozet' la koloron.
Rideto anĝelan la koron
konigis per evidenteco.
Pli ŝatas mi virton ol oron,
sed adoras je l' senkulpeco.

L' okuloj de tiu infano,
skulptitaj en mian memoron,
superas, de l' lumo fontano,
de blua fajenc' la valoron;
°hortenson similas, aŭ floron
siringan ilia mildeco.
Pli ŝatas mi virton ol oron,
sed adoras je l' senkulpeco.

La buŝo de tiu infano,
skulptita en mian memoron,
sugestas, per sia spontano,
de l' ama fidel' rememoron,
ol viraĝ' pli puran trezoron,
pli belan eĉ ol la juneco.
Pli ŝatas mi virton ol oron,
sed adoras je l' senkulpeco.

Mi vidas ĉielan la gloron
en tiu vizaĝ', en klareco.
Pli ŝatas mi virton ol oron,
sed adoras je l' senkulpeco.

Pernambuco Esperantista, n-ro 49 (aŭg/1943)
O Brasil Esperantista, n-ro 349–351 (jul–sep/1943)

Gregório de Matos
(1636–1696)

La belulin', ke Dio[1]

Moto: La belulin', ke Dio.

Gloso:
De kampfesto venis mi
hieraŭ kun du virinoj:
unu malbelegulino,
la alia belgraci'.
Ĉar ni estis ja nur tri,
mi demandis, sen pasio,
sed kun granda emocio:
“Kia kaŭz' de tiu stato?”
Diris unu ke pekfato,
kaj la belulin', ke Dio.

Tajposkripto de Brazila Antologio Poezia (ekzemplero el Biblioteko Ary Zamora)
Tajpaĵo el Biblioteko Carlos Domingues

1 Ĉi tiu poemo troviĝas ne en la eldonita *Brazila Antologio Poezia* (Lorenz, 1994), sed nur en la tajposkripto. Eble oni intence preterlasis ĝin: efektive ne temas pri tute sukcesa traduko, ĉar la originalo dependas de la reinterpreto de la moto *A mais formosa que Deus* (*La virino pli bela ol Dio* / *La virino pli bela, ke Dio*).

Othoniel Menezes
(1895–1969)

Per Angusta
(Per Klopodoj)

Ĉe l' asketec' de l' morta hor', marvento
de l' ŝiprompuloj kiam portas krion,
tradukas en la mondo la silento
de l' suferantoj la rezignacion.

Sin en solec' malfermas pens' kaj sento
samkiel orlotus'. Ululas ion
pekar'; sed Dio zorgas kun atento
pri Nero kaj Platon', kaj vidas ĉion.

Eden' benita, tuta la ĉielo
lumardas kaj malfermas al Doloroj
la bluan neston de sonĝad' kaj belo.

L' anim' vundita flugas preĝofere;
kantante, serĉas ĝi ĉe l' stelaj Ĥoroj
la bonon, nekonatan ĉi surtere.

Pernambuco Esperantista, n-ro 90–95 (jan–jun/1947)

La Plej Granda Ordono

En iuj noktoj de sankt-emocioj,
je la liliparfum' de Kristo plenaj,
de lum' kaj ombro miksaĵoj ĉagrenaj
sur stratoj ŝajnas al mi kolizioj.

Tromultetaĝaj domoj fenomenaj
rigardas nubojn preskaŭ kun defioj;
pli fore, jen domaĉoj! Jen orgioj
kaj larmoj! Kiaj maloj abomenaj!

Ho, kial la Riĉul' el la palaco
ne iras, kun kristamo kaj donaco,
al la domaĉ' de l' suferanta frato?

Per amo, nur per amo multobligas
Jesuo panojn, la Krucon diigas
kaj levas eĉ Lazaron el mortstato.

Pernambuco Esperantista, n-ro 74–76 (sep–nov/1945)
Brazila Esperantisto, n-ro 454–455 (jan–feb/1952)

Poeto

Li for de l' vivo pasas sur la tero,
farante versojn, ŝanĝante en florojn
eĉ plej mallumajn faktojn kaj kolorojn,
viditajn ja de Dante en l' infero.

Frunt' lia memorigas la dolorojn
pasintajn post l' unua ĝoj-apero,
kaj la pasia marko de l' sufero,
melankoli', forglutas liajn horojn.

Ĉu li suferas? Kantu li la belon.
Li, arbo-sfinks' ĉe l' kruda homarbaro,
el marĉ' leviĝas, tuŝas la ĉielon.

Li al malfeliĉuloj florojn donas,
sed de la fruktoj en la pulp-amaro
venenon de l' radikoj li deponas.

Brazila Esperantisto, n-ro 418–420 (jan–mar/1949) kaj n-ro 745–747 (apr–jun/1976)

Alberto de Oliveira
(1857–1937)

Al la Foririntino[1]

"La malsanulin' bezonas",
diris klare, kun insisto,
la rigora kuracisto,
"loĝi en klimat' pli bona".

Post la adiaŭ' malĝoja
forveturis do je l' fino
malgraseta la fraŭlino;
iĝis la domet' senhoma.

Pri l' malsan' de l' fianĉino
la fianĉo ne sciante,
ŝin brakumi ĝojrevante
venas, jen, el malproksimo.

Aŭdas pri l' malĝoja fakto
li larmante; tamen oni
tentas[2] korkonsolon doni:
"Ŝin sanigos mont-klimato."

Li al la montaro iras,
pri l' knabino en la menso

1 En ĉiuj strofoj de ĉi tiu poemeto la rimoj de la unua kaj kvara versoj estas asonancaj ankaŭ en la originalo. [noto de Lorenz]

2 *provas* (*tentar* en la portugala)

ĉiam kun la sama penso:
“Ĉu ŝi mortis? Ĉu ŝi vivas?”

Post dubhoroj sen respondo,
post marŝado lacoplena,
vidas en aer' serena
li la malproksimajn montojn.

La demandon li sopiras[3]
al la palmoj, emocie,
kiuj susuradas tie:
“Ĉu ŝi mortis? Ĉu ŝi vivas?”

Kaj la palmoj sur montalto
alĉiele montrogestas
respondante: “Nun ŝi estas
en pli bona jam klimato.”

O Brasil Esperantista, n-ro 399–402 (maj–aŭg/1947)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

3 *suspiras* (ŝajne ankaŭ en aliaj okazoj Lorenz intermiksis tiujn vortojn)

La Batado de l' Kradopordo

La kradopord' ĉe l' vojtrairo
batadas konstante, konstante.
Rajdanto pasas en deliro,
ĉevalon ardan kurigante;
kaj paŝas sen atent-altiro
alia, urĝon ne sentante.
Leviĝas polvo ĉe l' tretŝiro,
l' aerĉirkaŭon ondumante.
La kradopord' ĉe l' vojtrairo,
jen, batas konstante.

Kolere, vana en konspiro,
ĝi plendas krie aŭ plorante;
(aŭdebla estas la sopiro
nur al la vojo, ne eĥante):
“Ha! malfeliĉa mi martiro,
vivadas sen ripoz', devante
ĉi tie ĉe la vojtrairo
batadi konstante.”

Gejunular', kun ĝojinspiro,
de bela festo revenante,
kun bru' kaj multa ŝercodiro
nun pasas gaje kaj ridante.
La kradopord' ĉe l' vojtrairo,
jen, batas konstante.

El preĝejeto post eliro
kronita fianĉin' venante,
nun paŝas kun l' amata viro
kaj l' atestantoj, elegante.
Funebra venas nun spaliro
kun kruco, pro l' mortint' preĝante.
La kradopord' ĉe l' vojtrairo,
jen, batas konstante.

Ĝi batas ĉe l' aŭror-zefiro,
eĉ nokte bati ne ĉesante;
(la bato ĉe l' ombrar-drapiro
fortiĝas pli, pli dolorante).
Ĝi batas, se l' ĉielsafiro
brilas, aŭ dormas, sin kaŝante.
La kradopord' ĉe l' vojtrairo,
jen, batas konstante.

Homvivo estas la vojiro;
ni pasas ĉi, sur ter' spirante;
kaj ni foriras, de akiro
nur polvon ĉiu ĉi lasante.
Ho kor', kun la ripoz-deziro,
kiel la kradopord' ĝemante,
ci batas konstante.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Antônio Sales
(1868–1940)

La Rivereto kaj la Inundo

De riveret' humila sur la klaran
vejneton la sezon' pluvoza ŝtormis
kaj baldaŭ en torenton bruegaran,
kun akvo makulita, ĝin transformis.

Fiera, ĝojbruante ĝi ekkuris
rapide, kaj ŝaŭmante kunprenadis
arbustojn, kaj bordarbojn eĉ teruris,
kaj multjaran trunkegon saltinvadis.

El la kuŝej' eliris ĝi impete,
sieĝis forte pacan murunguon,[1]
moligis ĝin, faligis, kaj disĵete
etendis tra l' arbaro sian fluon.

Kaj al kampan', volanta, laŭkutime,
transpasi ĝin, ĝi kriis, kun deliro
de ulo minacanta bravanime:
“Estas malpermesata la transiro!”

Ĝi perdis la purecon alitempan
kaj ĉarmon, kiu kanti ĝin stimulis
dolĉe, kiam l' aŭroron belprintempan
kaj la ĉielon puran ĝi spegulis.

1 *Murunguo*, vegetalo el familio de legumenacoj. [noto de Lorenz]

Glorplenaj tagoj estis tiuj, kiam
de la inundo vivis ĝi ebria;
la brutoj for de ĝi fuĝadis tiam,
haltadis homoj apud bordo ĝia.

Ŝvelinte per malsana vanfiero,
la riveret' murmuris al l' akvaro:
“Mi estas ja rivero! jes, rivero!
Triumfe mi vojaĝos al la maro!”

Kaj oni diras eĉ ke, la racion
perdante, ĝi deklaris: “Timi devos
la maro mian forton kaj defion,
kaj la Neptunan sceptron mi ricevos.”

La pluvoj ĉesis, ĉesis la inundo;
la riveret' mutiĝis, malplezuris,
perdadis pli kaj pli de l' akvabundo,
kaj en kuŝejon sian fine kuris.

Kaj venis la somer'; la ter' kamplanda
ĉe la brulanta tag-varmeg' ardadis;
la riveret', iĝinte tre malgranda,
nur la piedojn de l' vadant' banadis.

Birdeto, ĝin laŭdinta dum la horoj
de ĝia povo, tiam mokparolis:
“Ĉu tiu rivereto ĉi, sinjoroj,
estas kiu rivero esti volis?!”

Ke l' rivereto estis vantulspeco,
ni vidas en ĉi tiu historio;
sed ĉe l' inund' de gloro aŭ riĉeco
perdiĝas same multa hom-racio.

O Brasil Esperantista, n-ro 311–313 (apr–jun/1942)

Guaracy Silveira
(1893–1953)

Himno de la Granberjanoj[1]

Granberjanoj, de tiu ĉi domo
histori' al ni estu proviz'
de la fortoj do kara la nomo,
estu nia ĝi vivo-deviz'.

Ho, antaŭen, Granberjanoj,
kun firmeco, forto, bril',
Dio kaj Patruj'! Ni agu
por la gloro de Brazil'!

Granberjanoj, l' estonton preparu
per laboro kaj per disciplin';
ni al lukto kuraĝe ekstaru,
la Patruj' kiam vokos ja nin.
Ho, antaŭen…

Granberjanoj, la menson fidantan,
korpon sanan kun pura konsci'
kaj laboron utilan, konstantan
ni oferu al nia Naci'.
Ho, antaŭen…

1 *Granbery* estis privata lernejo en la urbo Juiz de Fora (Brazilo). Siatempe ĝi havis aktivan Esperanto-grupon.

Granberjanoj, je tago tre ŝata,
post studad' nia, post la labor'
por honor' de Granbery amata
certe montros sin nia valor'.
Ho, antaŭen…

Kaj senlace luktante, laŭ planoj,
en fabriko, sur kamp', kun fier',
kaj en hejm', bonaj ni brazilanoj
servos al la justeco kaj ver'.
Ho, antaŭen…

Brazila Esperantisto, n-ro 516 (mar/1957)

Auta de Souza
(1876–1901)

Agonio de l' Koro

Je l' noktomezo brilas la steloj
kvazaŭ kandela milda la flam'...
Mian animon kovras malheloj.
Astroj! kaŝiĝu; mortos mi jam!

Kantas knabinoj en malproksimo,
°antaŭ ekdormi, pura pri am'...
L' eĥo forflugas l' alton sen limo...
Ĉesu la kanto! Mortos mi jam!

Filojn patrinoj lulas konsole,
dolĉan esperon de l' vivodram'...
Mian kuŝejon iros mi sole...
Ploru, infanoj; mortos mi jam!

El siaj nestoj, de la aŭroro
venon salutas birda aklam'...
dum mi foriras, akra kun ploro...
Birdoj! sopiru; mortos mi jam!

Jen, de la kampo, plena je floroj,
venas parfuma narkotbalzam'...
Dio! min premas pezaj doloroj...
Floroj! fermiĝu; mortos mi jam.

Pernambuco Esperantista, n-ro 90–95 (jan–jun/1947)

Pedro Velho
(1879–1919)

Águas Passadas[1]

Sur paperoj malnovaj, sub polvo kuŝantaj
de tineo truitaj, hodiaŭ mi legis
versojn, en kiuj viajn mi ĉarmojn laŭdegis
de l' okuloj kaj haroj kaj vestoj brilantaj.

Mi ekridis. Ho, tempo, de l' revoj galantaj,
vi forpasis, kaj multaj sin pensoj ŝanĝegis.
Nun mi vidas ke silko neniam vin tegis,
nek l' okuloj en vi estis sunoj lumantaj…

Nek la har' estis longa, mi kiun adoris,
nek similas la floron ja via vizaĝo;
nek pro via foresto mi iam ekploris.

Mi bruligis la versojn de l' ama sekreto
kaj demandas vin: Ĉu ja ne estas malsaĝo
kredi kion asertas freneza poeto?

Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 *Pasintaj Akvoj*. Lorenz ne tradukis la titolon.

El la provenca

Arnaut de Mareuil
(fl. fine de la 12-a jarcento)

Printempa Kanto

Plaĉe blovas la ventetoj
en Aprilo kaj en Maj',
kiam kantas la birdetoj
tre kontente kaj kun gaj'.

Ili kantas dum serena,
varma nokto en l' arbar',
kantas dum la freŝ' matena,
ĉiuj en amanta par'.

Ĝojas ĉio sur la tero,
gaje ĝermas la foli';
renovigas bonvetero
forton al la kor' en mi.

Per kutimo kaj naturo
mi °inklinas min al ĝoj',
rememoras pri l' plezuro
ama el iama foj'.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la rumana

Vasile Alecsandri
(1821–1890)

Rodika[1]

Kruĉon kun akvo la juna Rodika
sur la belŝultroj rondetaj, jen, portas;
pasas laŭlonge de l' kampo tritika,
kie junuloj la grenon rikoltas.

Ili survoje al ŝi saltrapidas.
“Akvon donacu, ho flor' de lilio”,
diras, kaj trinkas elkruĉe, kaj ridas:
“Dankon; prosperu de bon' al vi ĉio!

Baldaŭ alvenu al vi la korĝojo
de fianĉino, kaj estu feliĉa!
Estu florplena, knabin', via vojo,
via estonta loĝej' estu riĉa!”

Ili eltrinkis la akvon kaj ĵetas
sur ŝian kapon spiketojn de greno;
tiujn ŝutante ŝi teren, ridetas
for-rapidante, kun gaja mieno.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Traduko de Antoni Grabowski troveblas en *El Parnaso de Popoloj* (Pola Esperantisto, 1913; represo ĉe Iltis, 1983).

El la rusa

Gavríl Derĵavin[1]
(1743–1816)

Odo pri la morto de la princo Meŝĉerski

De l' tempoj vort', metala son'!
Voĉ' via vokas, malĝojigas
min per terura, ĝema ton'
kaj al la tombo proksimigas.
Apenaŭ mi la mondon ĉi
ekvidis, Morto dentoklakas
kaj tagojn miajn frap-atakas
per falĉil' fulmanta ĝi.

Forfuĝas neniu estul'
l' ungegojn, kiuj brakumaĉas;
de l' reĝ' kaj de l' malliberul'
en tomb' la korpojn vermoj maĉas.
Ekstermas gloron temp' kaj sort'.
Riveroj kuras al la maroj;
l' eternon fluas tagoj, jaroj;
malsata, regnojn glutas Mort'.

Sur rando de abismo ni
glitadas, kaj ni tien falos;
kunportas morton viv' en si,

1 Гаврии́л Держа́вин

ni vane kontraŭ ĝi batalos.
La morto ĉion, sen kompat',
detruas, eĉ la brilajn stelojn,
minacas mondojn kaj ĉielojn
estingi ĝia peza bat'.

La hom' mortema pensas ke
eterne vivos li, sed venas
la Mort' subite kaj, ho ve!
ĝi lian vivon tuj forprenas.
Eĉ kiam ni ne timas ĝin,
alveni povas ĝi inside;
la Morto flugas pli rapide
ol tondroj al la montkulmin'.

Meŝĉerski, kie estas vi,
de riĉa sorto favorito?
Forlasis vi la mondon ĉi,
forlasis via nin spirito.

Nur via polvo restas nun;
vi mem do kie? Ni ne scias,
ni ploras nur kaj plendekkrias:
Ho ve al ĉiuj sub la sun'!

Kie plezuro, amo, ĝoj'
kaj sano brilis, rigidiĝas
de ĉiuj sango je ĉi foj'
kaj mens' aflikte perturbiĝas.
Anstataŭ festentablo jen

la ĉerko, kaj kandeloj ardas,
kaj ĉiujn pala Mort' rigardas
sopir-ĝemantajn pro ĉagren'.

Rigardas ĝi al reĝa mens',
avida je milita gloro;
rigardas al riĉula pens',
avida je la mon' kaj oro;
rigardas al aŭdaca fort',
al la belec' kaj simpatio,
kaj al sublima la racio:
kaj falĉi iras tuj la Mort'.

La Mort', angoro de l' Natur'!
Ni miks' de brilo kun mizero;
nun dio, morgaŭ polvo nur;
hodiaŭ flatas nin espero,
sed morgaŭ kie vi, ho hom'?!
Ekbrilis de la viv' la prismo,
kaj jam ĝin la Ĥaos-abismo
englutis, kun la ĝojfantom'.

Kiel songĝdolĉo pasis for
jam ankaŭ mia juna aĝo;
jam malpli revas mia kor'
pri ĝojo, pri belec', kuraĝo.
La menso pli laciĝas jam;
ol la feliĉo pli honoro
min interesas, kaj la gloro;
ni aŭdas vokon de la fam'.

Sed pasos ankaŭ la viraĝ',
kun ĝi la amo de la gloro,
kaj ĉesos pensoj pri riĉaĵ'
kaj la pasioj en la koro.
Feliĉo-revoj, for de mi!
Ĉe l' sojl' de l' Eternec' mi staras,
en ĝin eniri min preparas.

Ĉu nun, ĉu morgaŭ morto nin
kun si forprenos senkonsterne;
do kial plori ke l' destin'
ne lasas vivi ĉi eterne?
Estas la viv' donac' de Di';
ni vivu tiel ke l' animo
ricevu Morton sen ektimo,
kun pura kor', sen veokri'!

Pernambuco Esperantista, n-ro 61 (aŭg/1944)

Alekséj Kolcóv[1]
(1809–1842)

Cerbumo de Malriĉa Kamparano

Ĉe la tablo mi
sidas, kun susur':
Kiel vivu mi
ĉiam sola nur?

Mankas virinet'
al mia junec'.
Mankas kamarad'
al mia solec'.

Mankas montrezor',
varma hejm' kaj seĝ',
kaj erpil', plugil',
plugĉevalo eĉ.

Kun la malriĉec'
ja heredis mi
donon de la san'
kun korp-energi'.

Sed pro l' peza bat'
de l' mizer', je l' fin'
en fremdulservad'
mi disperdis ĝin.

1 Алексе́й Кольцо́в

Ĉe la tablo mi
sidas, kun susur':
Kiel vivu mi
ĉiam sola nur?

Pernambuco Esperantista, n-ro 69 (apr/1945)

Kanto de l' Plugisto[1]

Venu, ni laboros,
mia ĉevaleto;
ni blankigos feron
per la tero kruda.

Jam l' aŭroro bela
ĉe l' ĉielo ardas,
el l' arbaro granda
jam la sun' eliras.

Estas ĝoj' sur l' agro,
venu, ĉevaleto.
Kun ci iras mi nur,
mastro kaj servisto.

Gaje mi enmetas
l' erpilon, plugilon,
jungas mian ĉaron
kaj enŝutas grajnojn.

1 Traduko de S. Obruĉev troveblas en *Germana Esperantisto*, maj/1914 (5B).

Fojnon kaj draŝejon
gaje mi rigardas,
draŝos kaj ventolos;
iru, ĉevaleto!

Mi kaj ci matene
plugos nian agron,
kaj lulilon sanktan
faros al la greno.

Ĝin la panjo tero
nutros kaj trinkigos:
l' agro naskos tigon;
iru, ĉevaleto!

L' agro naskos tigon,
poste spiko kreskos,
maturiĝos grajnoj
kun orumaj fibroj.

Brilos falĉileto,
la falĉil' sonoros;
dolĉe ni ripozos
sur la pezaj garboj.

Plugu, ĉevaleto;
mi cin satmanĝigos,
donos trinki akvon,
akvon el la fonto.

Pernambuco Esperantista, n-ro 69 (apr/1945)

Iván Krylóv[1]
(1769–1844)

La Simio kaj la Okulvitroj[2]

Simi' maljuna malfortiĝis je la vido,
sed ekmemoris, kun konfido,
ke uz' de okulvitroj — laŭ la homaj vortoj —
utilas ĉe l' okulmalfortoj.
Ses okulvitrojn li havigis kun rapido;
li turnas ilin iel, ĉiel,
kaj al la kaposupro, al la vosto metas,
jen ilin flaras, jen leketas:
kaj tamen la efik' aperas ja neniel!

Ekkriis la simio: "Fi! jen la rezulto
de l' kredo je la homa stulto!
La okulvitrojn oni laŭdis multafoje,
sed ili al mi ne utilis."
Kaj la simio, kolerante kaj malĝoje,
ŝtonbatis ilin tuj, survoje,
ke nur pecetoj ektrembrilis.

1 Ива́н Крыло́в
2 Traduko de S. Rublov troveblas en *Elektitaj Fabloj* (TK, 1979).

Ĉe l' homoj oni ankaŭ trovas tian moron:
de aĵ' utila se ne konas la valoron
la nesciulo, traktas ĝin kun malinklin';
kaj se li ĝuas ja honoron,
li eĉ ekpersekutas ĝin.

Rio Esperantista, n-ro 8 (nov/1947)

Aleksándr Puŝkin[1]
(1799–1837)

La EĤo[2]

Se muĝas besto en arbar',
se sonas kanto aŭ fanfar',
aŭ tondro, aŭ fortega knar',
al ĉiu ton'
respondas l' eĥ', sen malklar'.

Respondas ĝi, eĉ per susur',
al ŝtorma, tondra bru-terur',
kaj al paŝtista kantplezur';
laŭ Di-dekret',
respondon ĝi ne havas nur
kaj la poet'.

Rio Esperantista, n-ro 20–21 (nov–dec/1948)

1 Александр Пушкин

2 Traduko de Kálmán Kalocsay troveblas en *Tutmonda Sonoro*, vol. II (HEA, 1981).

Fjodor Tjutĉev[1]
(1803–1873)

Noktaj Voĉoj

Dormetas dolĉe verda la ĝardeno,
la blua nokto ĝin brakumas nun.
Tra l' blankaj pomaj floroj, kun sereno,
al ĝi ridetas milde l' ora lun'.

Mistero, kiel je l' kretago, brulas
sur la ĉiel' senfunda, la stelar';
mi aŭdas kiel font' najbara rulas,
de l' balmuziko sonas la fanfar'.

Sur la tagmondon metis sin vualo,
ekdormis la movado kaj labor';
super dormantaj urboj, montoj, valo
vekiĝis de mirindaj sonoj ĥor'.

El kie tiuj noktaj voĉoj venas?
Ĉu estas homaj pensoj en ripoz',
senkorpaj, nevidataj kaj promenas,
liberiĝinte, en la nokt**ĥ**aos'?

Almanako Lorenz 1987[2]

1 Фёдор Тютчев

2 Mi ne trovis pli fruan fonton: eble Waldomiro Lorenz (filo de F. V. Lorenz) retrovis tiun poemon en la paperaĵoj de sia patro kaj sendis ĝin al la redakcio de *Almanako Lorenz*.

Fjodor Tumanskij[1]
(ĉ. 1800 – 1853)

Birdeto[2]

Mi, malferminte la karceron
hieraŭ al birdet' kaptita,
al ĝi redonis la liberon,
kaj kantiston al forst' invita.

Ĝi °mergis en l' aer' bluhela
tuj kun videbla ĝojebri'
kantante per voĉeto bela
kaj kvazaŭ ĝi preĝus[3] pro mi.

Pernambuco Esperantista, n-ro 69 (apr/1945)

1 Фёдор Туманский
2 Traduko de V. Zamjatin troveblas en *La Ondo de Esperanto*, apr/1913.
3 Mi mem aldonis la vorton *preĝus*, kiu ial mankas en *Pernambuco Esperantista*.

El Sanskrito

Kiel Nalo svatis Damajantin (el “Mahâbhârata”)

Estis reĝ', nomata Nalo, forta fil' de Vîrasêno;
vir' de l' deziratoj virtoj, bela kaj ĉevalkonanto;
je la popolfronto staris li, simila al diulo,
superante ĉiujn homojn, kiel per la bril' la suno;
pia, Vêd-konanto,[1] princ' heroa en Niŝadho,
kubludema, veramanto, granda arme-komandanto,
dezirata de fraŭlinoj, nobla, mastro de la sensoj,
la plej bona pafarkisto, protektant', Manu-simila.[2]

——

Iam la braman' Damano kun l' edzino, tre ŝatinda,
lin vizitis kaj parolis pri l' princino el Vidarbho,
Damajanti, tre bonmora bela, ĉarma junulino,
plendotita per bonvirtoj kaj kapabloj admirindaj.
Ŝi — Damano diris — brilas per beleco senrivala,
inter siaj amikinoj, en la aĝo de florado,
kaj ŝi vere feliĉigas tutan sian ĉirkaŭaĵon,
dissemante en la mondo grandan ĝojon al la koroj.
Ŝia patro, reĝo Bhîmo, donis al ŝi servantinojn
pli ol cent, kaj ili zorge ornamadas ŝin belege.

1 *Vedoj*, la sanktaj libroj de la bramanoj. [noto de Lorenz]

2 *Manuo*, la primitiva prapatro de la homaro, laŭ la hinda kredo de duondia origino. [noto de Lorenz]

Multafoje Nalo aŭdis tiajn laŭdojn, kaj eksentis
en la kor' ekflami amon, ĉiutage pliiĝantan.
Iuhore, kun la pensoj pri l' amata Damajanti,
li eniris arbareton tre proksiman de l' palaco;
tie li ekvidis cignojn, kies plumoj estis oraj.
Kiam ili proksimiĝis, Nal' el ili kaptis unu;
sed la bird' en liaj manoj ekparolis homavoĉe:
“Ne mortigu min, ho reĝo! Mi al vi alportas ĝojon.
Mi pri via am' parolos al fraŭlino la plej bela,
kaj neniam Damajanti pri alia vir' ekpensos.”
Nalo, tion ĉi aŭdinte, tiun birdon tuj malprenis,
kaj la cignoj forekflugis en direkto al Vidarbho.
Tiun urbon atinginte, la birdgrupo terenflugis
tre proksime de l' palaco de l' princino Damajanti.
Ŝi ekmiris de la cignoj la plumaron orkoloran,
proksimiĝis kun deziro kapti unu per la manoj.
Sed la cignoj tuj forflugis al l' arbaro plej proksima;
unu nur restante, kuris al la juna reĝidino
kaj al la miranta diris, parolante homavoĉe:
“Damajanti, aŭdu kion mi al vi rakonti venas.
Estas en Niŝadho reĝo, kun la glora nomo Nalo,
la plej bela el la viroj, eĉ simila al Aŝvinoj.[3]
Li vin amas kaj deziras iĝi via edz' amata,
se vi, ĉarma virgulino, volas kun li unuiĝi.
Nek la homoj, nek diuloj vidis paron da geedzoj

3 *Aŝvinoj*, ĝemeloj diulaj. (Diulo = sanskrite *deva*, dio en la senco pagana, t.e. estulo spirita, supera al la homoj.) [noto de Lorenz]

tiel belperfektan kiel estus vi kaj reĝo Nalo:
vi — la perlo de l' virinoj, li — plej forta bela viro;
feliĉeco por geedzoj estus, kaj por la gefiloj."
Damajanti al la cigno nur respondas: "Mi akceptas;
flugu kaj al Nalo diru, kion mi al vi nun diris."
Tion promesis la cigno, al Niŝadho ĝi reflugis
kaj al Nalo tie ĉion laŭpromese plenrakontis.

Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la slovaka

Svetozár Hurban-Vajanský
(1847–1916)

Kanto de l' Horloĝo

La tempo flugas kun rapid' de l' vento,
por ĝi jarmiloj estas nur minuto;
homara historio nur momento,
kread-epoko — fal' de akvoguto,
de l' mondoj morto — kvazaŭ paf' de sag':
tiki-tak, tiki-tak.

De l' kreitaro unu est-atomo
el Di-okulo falis sur la teron
kaj pensas, ĉar ĝi sin titolas "homo",
ke donas l' univers' al li superon
kaj rajton regi kun fortega brak';
tiki-tak, tiki-tak.

Min ankaŭ kreis Di', kaj Lin mi servas
kaj obeante, tagojn mi mezuras
kaj vokas... sed la voĉon ĉu observas
la homoj, kiuj en danĝeron kuras?
Jen pezaj nuboj, ŝtormo, fulmoj, krak'!
Tiki-tak, tiki-tak.

Frat' fraton persekutas, pro terbulo
li verŝas sangriverojn, malkontenta,
avidas fremdan havon, enviulo,
riĉaĵojn serĉas, pekas, senekpenta,
ĝis malaperos lia voj' kaj ag';
tiki-tak, tiki-tak.

Pernambuco Esperantista, n-ro 55–56 (feb–mar/1944)
Tajpaĵo el Biblioteko Carlos Domingues

El la sveda

Esaias Tegnér
(1782–1846)

La Eterno
(kio estas eterna)

Per glavo la mondon ja formas la fort',
kun fam' kiel aglo fluganta;
sed fine la glavon disrompos la sort',
pafmortos la aglo giganta.
Perfort-kreitaĵo tre baldaŭ forpasas,
nek[1] signon de sia tempesto postlasas.

La vero persistas. De sango en rond'
trankvile, brilfrunte ĝi staras;
ĝi gvidas la homojn tra l' nokto de l' mond',
la vojon ĝi montras, preparas.
Eterna la ver' estas, pasas de loko
al lok', de epoko al nova epoko.

Eterne persistas la just'; sur la ter'
nenio ĝin povas aboli;
ĉar eĉ se regadas malbon' kun koler',
la juston vi povas ja voli.
Se ĝin persekutos ruzeco, teroro,
kaŝejon ĝi havos en via bonkoro.

1 *eĉ ne*

La volo de l' koro brulanta en brust'
preparas virecan brav-agon;
la vero per vort', per armiloj la just'
venigas de l' ŝanĝo ĝojtagon.
La penoj faritaj, venkita danĝero
fariĝas la steloj de l' nova libero.

Ne mortas de l' bel' poezia parfum',
la ŝanĝo de l' hor' ĝin ne ligas;
la °bele kreit' estas ento de lum',
la jaroj ĝin nur rejunigas.
Eterne persistas la belo, kaj ĝian
orsablon tempondoj liveras genian.

Aŭdacu la juston kaj fidu al ver',
kaj kreu la belon kun ĝojo;
neniam pereos la tri sur la ter',
al Di' estas ili la vojo!
Pro perdo de tempodonacoj ne ploru;
nur kio eterne persistas, valoru!

Pernambuco Esperantista, n-ro 46–48 (maj–jul/1943)
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la tupia

Kanto ĉe Plenluno

Patrino Luno, mi al vi
malkovras miajn pensojn,
kaj petas: sendu ilin for,
ho regantin' de l' noktoj,
kun mia varma rememor'
al l' amatin' de mia kor'.

Pernambuco Esperantista, n-ro 57–58 (apr–maj/1944)
O Brasil Esperantista, n-ro 367–369 (okt–dec/1944)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

El la ukraina

Iván Kotljarevskyj[1] (1769–1838)

La Sonĝo

L' afliktojn, sonĝo, ni forgesas
ĉe l' tuŝ' de cia milda sin';
feliĉon novan ci promesas
kaj per espero lulas nin.

Sen ŝuld' puniton ci konsolas,
pri l' ŝuld' al la krimul' parolas
per bildoj kaj per emoci';
ci la °lacitojn refortigas,
l' amantojn verajn ci kunigas;
veindas, kiun fuĝas ci!

Rio Esperantista, n-ro 8 (nov/1947)

1 Іван Котляревський

Mediumaj Poemoj en Esperanto

Poemoj atribuitaj al la spirito de

João da Cruz e Sousa

Pri la Preĝoj

Leviĝas ĉiutage al la sferoj
ĉielaj multaj preĝoj de l' teranoj:
kun ĝem' interplektiĝas piaj manoj,
plorantaj voĉoj plendas pri l' suferoj.

Leviĝas plendaj preĝoj el karceroj,
petante helpon kontraŭ la tiranoj;
leviĝas plendaj preĝoj pri l' malsanoj,
pri l' malfeliĉ' kaj pezaj pri l' mizeroj.

La preĝojn, direktitajn al ĉieloj,
ricevas sur la vojo la anĝeloj
kaj ilin pri la pravo ekzamenas;

Maljustaj plendoj restas sen respondo;
nur kie pruvis juston l' anĝelsondo,
helpado Dia al preĝintoj venas.

Reformador, jan/1950
Komunikoj, n-ro 169 (jan–mar/2018)

Malĝoja Gloro[1]

Vi, homoj, kiuj ja admiras gloron
de la venkintoj en batal' milita,
en kiu sango estis elverŝita
kaj la furioj semis malhonoron;

Kaj kie plantis hombestec' teroron,
kaj kie detruadis senhezita
furor' per fer' kaj fajro daŭrigita
homvivojn kaj kulturan la laboron:

Malĝoja estas ĉiu tia gloro!
Eĉ de l' herooj la sentema koro
pripensas tiun venkon kun doloro.

Admiru, homoj, vera kun estimo,
la paclaboron nobla de l' animo,
luktanta por la vera bon', sen timo!

Reformador, feb/1950
Komunikoj, n-ro 178 (apr–jun/2020)

1 Vidu ankaŭ la tradukitan poemon *Vojo de la gloro*, en *Brazila Antologio Poezia* (Lorenz, 1994).

Ĉu ĉio pasas?

Ofte donas bonaj homoj la konsolon,
kiam ies koron la dolor' frakasas:
“Ne malĝoju; ĉio pasos; ĉio pasas!”
Ni pripensu klare tiun ĉi parolon.

Ne atendu de natura leĝo abolon,
se ĝi iun homdeziron embarasas;
tion la racio sana ne allasas;
en naturaj leĝoj vidu Dian volon.

Pasas la juneco, pasas la viraĝo,
pasas surtervivo, pasas la sufero;
do eltenu la dolorojn kun kuraĝo!

Pasas karnaj ĝuoj kiel vanĥimero;
sed eterne daŭras ja spirito via,
ĉar eterna vivo estas leĝo Dia.

Reformador, aŭg/1950

Du Testamentoj

Du testamentojn la Bibli' enhavas:
l' unua estas de Mose' instruo,
donita por komenca l' evoluo
kultura, kie civilleĝo gravas.

La dua, kiu la kristanojn savas,
pli alta estas de moral' konstruo:
de l' egoismo estas ĝi detruo;
nur vere noblajn ĝi animojn ravas.

"Okulon pro okul'" la leĝo volas,
sed tiun leĝon vera am' abolas.
La leĝ' ne punas de la hom' koleron,

por la krimuloj havas ĝi karceron.
Koleron ne konsilas Krist-admono,
sed donas la doktrinon de l' pardono.

Reformador, sep/1950

Astralaj Karceroj[1]

Nekono de spiritaj bon' kaj vero
al homoj kaŭzas staton de sufero
ne sole dum la vivo sur la tero,
sed ankaŭ ĉi en la astrala sfero.

L' animo fermas mem sin en karcero,
de l' memo konstruita per fiero,
malamo, egoismo, malsincero,
la ŝtofoj ĉi pli firmaj ol la fero.

Fiero estas karcerist' kruela,
malam' — spirita nokto tre malhela,
kaj egoismo — firmament' senstela.

L' animo restas sia en karcero
ĝis °kiam amo, humilec', tolero
al ĝi malfermas pordojn de l' libero.

Reformador, okt/1950
Komunikoj, n-ro 182 (apr–jun/2021)

1 Vidu ankaŭ la tradukitan poemon *Karcero de l' Animoj*.

En Kaĝo

En iu tre malalta regiono
astrala iam mi spiriton vidis
en kaĝ' kuŝantan, kaj mi tuj decidis
la kaŭzon koni tiu de malbono.

Ornamis lin — mi vidis — iam krono;
la sorton de popolo li prezidis,
sed nur al la milita glor' li fidis
kaj kontraŭulojn tretis sen pardono.

Li suferigis peze la nacion,
pro l' planoj kaj pro l' agoj trofieraj,
malŝatis vortojn de l' amikoj veraj.

Dum lia menso nutros ambicion
kaj venĝideojn, pento lin ne tuŝos,
fermite sola en la kaĝ', li kuŝos.

Reformador, nov/1950

Voko de l' Spiritoj

Ankoraŭ nun Jesuo Kristo sendas
disĉiplojn siajn al la mond' homara,
disdoni perlojn de la Vero klara
al homoj, kiuj pri sufero plendas.

Ankoraŭ sur la ter' Perfort' etendas
la manon kun °vipilo multmiljara,
ankoraŭ regas la kutim' barbara
kaj kontraŭ Krista leĝo sin defendas.

Sed tiu mano, per °vipil' armita,
jam malfortiĝas, ĉar la vok' spirita
de l' amdisĉiploj al la mond' proklamas:

“Nun ne subpremu plu naci' alian,
sed ĉiuj formu tuton harmonian!
Kulturon veran homfratec' ornamas.”

Reformador, jan/1951

Eterna Nutraĵo

“Ne nur per pano nutras sin la homoj,
sed ankaŭ ĉiu per parol' de Dio”:
instruas tiel la Evangelio,
nutranta de la Ver' per vivatomoj.

Kaj tiuj ĉi ne estas ŝajnfantomoj,
sed pli realaj ol la materio;
per ili en la mond' kreiĝas ĉio,
per fortoj pli subtilaj ol aromoj.

Eterna estas Dia la Ideo,
ĝi estas l' origino de la kreo...
L' ideo per la Vort' sin manifestas.

L' Evangelio estas Dia Vorto,
nutranta en tervivo kaj post morto:
en ĝi la Perfektec' sin manifestas.

Reformador, feb/1951

La Evolua Ŝtuparo

De l' tero levas sin al la plej altaj sferoj
ŝtuparo senmezura de viv-evoluo,
sur kiu supreniras, laŭ la vol-influo,
l' animoj al pli altaj de l' progres' konkeroj.

Kaj de l' ĉiel', en amoplenaj kooperoj,
en nerompita ĉeno de l' estont-konstruo,
anĝeloj subeniras, laŭ Diec-instruo,
portante lumon kaj helpante en danĝeroj.

El la ĉieloj subeniras lumo varma,
la vojon heligante de l' ŝtuparo ĉarma;
pli klara iĝas de l' progreso la mistero.

De ĉiu progres-ŝtupo vidas la spirito
la celon pli proksime kaj, jam sen hezito
ĝi pli kaj pli malproksimiĝas de la tero.

Reformador, mar/1951

Poemoj atribuitaj al la spirito de

Teodoro A. Dolejŝ

Fortenhavaj Vortoj

En la homa lingvo estas vortoj,
kies sonoj estas grandaj fortoj:
unuj donas helpon en laboro,
kaj aliaj timon al la koro.
Gravaj estas ĉiu por afero
jenaj: malespero kaj espero.
Malespero ĉiam malutilas,
sed esper' fortigas, bonkonsilas.
La animon la esper' edukas,
al pereo malesper' kondukas.
Per kuraĝ' fortiĝas la animo,
sed tre malfortigas ĝin la timo.
Amo estas de l' sufer' balzamo,
vundojn plilarĝigas la malamo.
Do evitu ĉiam malesperon,
kun kuraĝ' eltenu la suferon;
pro aflikt' aŭ perdo ne tro ĝemu,
de esper' kaj amo fortojn semu:
tiel vi feliĉe vivi povos
kaj la mondon eĉ pli bona trovos.

16/05/1945
Reformador, jun/1949

Grava Leciono

Post la pezaj jaroj de milito,
kiam la furioj ĉe l' zenito
de l' turment' vipadis la popolojn,
diktis la fatalo la parolojn:
“Ĉesu fine jam la hekatomboj!
Sur la ter' jam estas tro da tomboj;
venu al Eŭropo pac-printempo,
jam sufiĉas de detru' l' ekzemplo.”

Post la jaroj de milit-teroro
sonas horo de la pac-laboro:
tiu horo estas fat-admono
ke lerniĝu nun la leciono:
La ideo estas krea forto,
per ideoj formas sin la sorto;
semu pacajn pensojn homaj mensoj,
pacon volu viaj kor' kaj sensoj!

Homoj, ekkonstruu novan ordon,
obeante amon kaj konkordon!

20/05/1945

Reformador, jun/1948

Homara Progreso

Antaŭ multaj centoj da miljaroj
vivis homoj kiel la bestaroj,
atakante unuj la aliajn
por satigi ja stomakojn siajn.

Homoj vivis kiel animaloj,
estis senkompataj kanibaloj;
nur pli poste formis familiojn,
grupojn, tribojn, fine la naciojn.

Sangsoifon ili iom ŝanĝis,
homan karnon ili plu ne manĝis,
sed longtempe juĝis esti pravo
ke venkito estu nura sklavo.

La sklaveco nun jam ne ekzistas;
sed ankoraŭ militem' persistas;
tamen baldaŭ jam ĝi malaperos
kaj la mondon homfratec' konkeros.

20/05/1945

Reformador, jul/1948

Pri Malamikoj

Ĉu l' malamikojn devas ni malami?
Tuj “Jes”, respondas multaj, multaj homoj,
kaj penas patriote vin °inflami
per versoj kaj per historiaj nomoj.

Malamis Izrael' fieran Romon,
malamis Rom' Grekujon kaj Kartagon;
ne lasis ĝi el tiu ĉi eĉ domon,
sed ankaŭ perdis sian gloran tagon.

Malamis Francoj Anglojn dum jarcentoj,
sed unuiĝis fine en milito
kontraŭ aliaj; tiel homaj sentoj
ŝanĝiĝas laŭ memama agincito.

De Kristo sekvu ĉiuj la instruon:
eĉ malamikojn amu ni, kaj tiam
neniu timos propran havdetruon,
amikoj estos ĉiuj kaj por ĉiam.

22/05/1945

Reformador, jan/1949

Ne juĝu!

Ho, ne juĝu tiun kiu, frato,
en la brakojn de la peko falis;
eble kontraŭ tentoj de la fato,
antaŭ l' falo forte li batalis.

Ĉu vi scias kial lin surprizis
la atak' decida de la tentoj?
Ĉu vi la motivojn analizis
de l' batal' inter raci' kaj sentoj?

Ofte ja sufiĉus ama vorto,
ke li kontraŭ falo sin protektu;
ofte de kristana pens' la forto
farus ke malbon' lin ne infektu.

“Ni ne juĝu!” Diris la Mesio,
kiu multajn pekojn ja pardonis:
“La pentantojn ne kondamnas Dio!”
Vivu ni do, kiel Li ordonis.

23/05/1945

Reformador, feb/1949

Ne semu malkonkordojn

Ne semu malkonkordojn en defio,
malsama kie estas opinio;
sed ĉiam penu vivi kun tolero:
nur tiel pliklariĝos dub-afero.

La homa mens' facile ja eraras,
se en ĝi malamike dub' ekstaras;
rezonu, sed toleru ke aliaj
klarigu dubojn per rezonoj siaj.

Ne taŭgas la muzik' kun malagordoj;
do agordiĝu viaj sentokordoj,
en la konstru' evitu ĉian skismon,
malamon, maltoleron, egoismon.

Konkordo donas en l' afer' sukceson,
sed malakordo baras la progreson;
se oni aŭdos ĉies opinion,
konkorde oni povos fari ĉion.

28/05/1945

Reformador, aŭg/1949

Venku la tentojn!

Vi preĝas, ho gefratoj, ke de tentoj
vin malproksime Dio kondukadu;
sed ofte volas ilin viaj sentoj
kaj pensoj, kun dezir' ke vi ĝuadu.

Vin tentas bela formo, kiel Evan,
kaj tre facile cedas via volo;
tuj vi forgesas la reflekton[1] devan
kaj venkas vin de l' tento falskonsolo.

Malbona tent' se logas vian menson,
forpelu ĝin jam ĉe l' unua paŝo;
ne lasu ke okupu ĝi la penson,
nek manifeste, nek en ruza kaŝo.

Kun ĝi neniam interparoladu,
okupu vin per pens' aŭ ag' utila,
ĉar se vi lasos ke vin tent' invadu,
ĝin venki estos lukto malfacila.

Ne lasu venki vin de l' sentimento,
nek de avid', nek troa de fiero;
ne cedu menson, koron al la tento,
kaj vian vivon benos la libero.

05/06/1945
Reformador, sep/1949

1 *mediton, pripenson* (*reflexão* en la portugala)

Dispelu la nubojn!

Multaj homoj seriozaj, veramantaj
dubas pri justeco dia en la mondo,
kiam ili vidas ke, sub nomoj sanktaj,
regas sur la tero de l' malbon' la ondo.

Ili dubas pri l' ekzisto eĉ de Dio
kaj demandas: “Se Li vere ja ekzistas,
kial Li permesas preskaŭ ĉi en ĉio
krimojn, kaj ke l' peza maljustec' persistas?”

Homoj, sciu ke la duboj, kiel nuboj
kovras la vizaĝon de la suno klara,
kovras Veron, kiun glavoj de l' keruboj
gardas kontraŭ egoisma mens' erara.

Kiam nubojn vent' dispelas, tuj aperas
la kun rideto bela radioj sunaj;
kiam la animo kredas kaj esperas,
pace ĝin lumigas saĝo elĉiela.

06/06/1945

Reformador, nov/1949

Tentoj en la Astrala Mondo

Ankaŭ en l' astralaj sferoj estas tentoj
en l' ankoraŭ pli malaltaj regionoj,
kie ofte blovas de pasi' la ventoj
kaj senfruktaj estas de la Bon' l' admonoj.

Mi ekkonis ja spiriton de amiko,
kiu estis drinkemulo sur la tero
kaj konservis en astrala sia psiko
la inklinon por la brando kaj biero.

Sian, sur la ter' vivantan kamaradon
li igadis drinki, kaj la brandvaporon
ĝuis, sed li baldaŭ pagis l' obsedadon,
kiu al li mem alportis nur doloron.

Ekpentinte, sian pekon li komprenis
kaj, helpate de spiritoj kompatemaj,
la surteran drinkemulon savi penis
de l' malvirt' kaj ĝiaj fruktoj jam ekstremaj.

Ajnalia ĉi spirit', de mi konata,
kiun malamik' surtere tre ofendis,
ofte de venĝemo estis tre tentata,
sed rekonis ke malbonon li pretendis.

Ĉar spiritoj bonaj fine lin persvadis
ke, farante malbonaĵon al l' alia,

li suferus pli; li poste ne pensadis
plu je venĝo, sed je amo harmonia.

Ankaŭ ofte en tieaj ĉi rilatoj
iuj el spiritoj ne tre progresintaj,
iĝis de fiero kaj memam' tentatoj
kaj suferis ofte, agoj pro instinktaj.

Sed, eĉ kiam longatempe la spirito
eraradis, venas fine la momento
kiam venkas li, ĉar li jam sen hezito
faras bonon, laŭ racio kaj prudento.

Reformador, mar/1950

Gardu vin!

Gardu vin dum via vivo sur la tero
kontraŭ memvolita risko de l' fatalo;
altan supreniron minacadas falo,
troĝuadon emas sekvi la sufero.

Laboremo gardas kontraŭ la mizero;
kontraŭ peko gardas alta idealo
kaj fidela ŝato de l' spirit-moralo
kaj l' obeo al la voĉo de la vero.

Gardu vian menson kontraŭ la eniro
de malpura kaj alloga pekdeziro:
fermu ĉiam firme kontraŭ ĝin la koron.

Kontraŭ la insidoj de l' memam' vin gardu,
en suferaj provoj viajn nervojn hardu;
kaj vi trovos de la bona sort' favoron.

Reformador, apr/1951

Ne koleru!

Eĉ se iu vin ofendis, ne koleru;
ĉiujn homojn kiel fratojn konsideru!
La koler' blindigas la raci-reflekton,[1]
de l' spiritoj bonaj perdas ĝi protekton.

Koleranto la justecon ekforgesas,
eĉ se fidon al Jesuo li konfesas.
Sago de koler' eniras korprofundon,
kie ja ĝi lasas tre danĝeran vundon.

Ofte ĝi mortigas amikecon belan,
kaj malfermas pordon de l' sufer' malhelan.
Unu vort' kolera neniigas amon
kaj de malestimo ekbruligas flamon.

Eĉ se iu vin ofendis, ne koleru!
De la frat' erarojn via kor' toleru!
Al kolervenkantoj venas Dia graco,
en ilia koro brilas ben' de l' paco.

Reformador, maj/1951

1 *reflekto →medito, pripenso* (*reflexão* en la portugala)

Ideoj kaj Pensoj

Kiel korpo estas komplekseg' de ĉeloj,
menso estas kompleksego de ideoj;
per la ĉeloj la spirit' la korpon formas,
el ideoj ĝojoj formas sin kaj veoj.

Noblajn nur ideojn nutras nobla menso,
ĉu surtere, aŭ ĉu en la mond' spirita;
kaj l' animon homan benas aŭ kondamnas,
laŭkvalite, ĉiu penso konceptita.

Fruktoj kreskas laŭ kvalito de la semoj:
tiel bonaj pensoj portas bonajn agojn,
kaj el bonaj agoj kreskas sort' feliĉa,
sed malbona pens' kaj ago semas plagojn.

Zorgu do, gefratoj, ke en viaj mensoj
nur naskiĝu pensoj vere bonproduktaj;
kaj evitu la ideojn de malbono,
ke ja ne naskiĝu agoj malbonfruktaj!

Reformador, aŭg/1951

Nescio de Saĝulo

Diris iam reĝo Salomono:
“Sur la tero regas la malbono,
kaj vantaĵo vana estas ĉio;
nur valoras la saĝec' de Dio.”
Vere la saĝeco de la homo
estas da saĝeco nur atomo
kaj, se ĝi miksiĝas kun eraro,
al la Vero estas ĝi nur baro.

La citita reĝo ankaŭ diris
ke la veran konon li aspiris
kaj homfarojn tial li observis,
sed ke post la mort' neniu servis;
ke li vidis en la homlaboro
ĉiam nur vantaĵon sen valoro.

Tamen Salomon' ne estas prava
pri afero homa la plej grava:
ĉar li opinias ke la morto
estas fino de la homa sorto;
ke la morto neniigas ĉion,
la mortintoj ke ne scias ion;
ke en morto plenfiniĝas l' esto
de la homo kiel de la besto.

Laŭ erara tiu opinio
virto ja utilas al nenio,

ne valoras de l' justul' la faroj
pli ol iuj forputrintaj varoj.
“Manĝu”, diras li, “kaj trinku vinon,
vestu bele vin kaj la edzinon;
post la morto eĉ memor' ne restas.”
Kontraŭ li la mortintar' protestas:

“Sciu ĉiuj homoj, ke la morto
ne estas la fin' de l' homa sorto;
post la mort' valoras la memoro
de la virtaj faroj, bonlaboro;
ĉar erara estas l' opinio
ke ekzistas nur la materio.
Homoj, vivu saĝe sur la tero;
post la mort' vi vivos en l' etero.”

Reformador, sep/1951

Ŝatu ĉian vivon

Iam en la mond' astrala mi renkontis
eks-amikon el pasinta la ekzisto
sur la ter'; li estis simpla instruisto.
Ĝoje li brakumis min kaj tuj rakontis:

“Preskaŭ tri monatojn mi post vi forlasis
la tervivon; mi promenis en arbaro
kiam kuglo trafis min, ja pro eraro,
de junulo, kiu cervojn tie ĉasis.

Kiam vidis tiu hom' de l' fat' la baton,
malesperis, al river' profunda kuris;
— nun ne povas mi plu vivi — li murmuris
kaj dronigis sin, pruvante vivmalŝaton.

Kiam poste li eksciis ke li mortis,
sed ke l' morto estas vivo nur alia,
petis li pardonon de l' justeco Dia,
konscienco lia lin al mi alportis.

Mi al li deklaris ke mi lin pardonas,
kaj li nun batalas kontraŭ ĉaspasio,
predikante ŝaton de l' vivenergio
eĉ en bestoj, kiel kornoblec' admonas.”

Reformador, okt/1952
Komunikoj, n-ro 170 (apr–jun/2018)

El Miaj Surteraj Rememoroj

I

—

Pri l' Anĝeloj

Kiam estis mi knabeto,
panjo preĝi min instruis,
kaj mi grandan ĝojon ĝuis
ĉe la son' de l' pia peto.

Kaj mi pensis pri l' anĝeloj
kun belegaj orflugiloj,
ke da ili multaj miloj
nokte venis el ĉieloj.

Sed la panjo min informis:
“Kio ŝajnas orflugiloj,
estas de la virt' la briloj
kiujn la anĝeloj formis.

El la vort' kaj ag' emanas
tre subtila fort' spirita
kaj, laŭ la valor' merita,
la aginton akompanas,

lin defendas kaj fortigas,
lin de l' bon' sur vojoj gvidas,

kaj se ni al ĝi konfidas,
tiu forto nin lumigas."

15/03/1952

Reformador, jan/1953
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

II
—
Pri Dio

Diru, panjo, kiu estas Dio,
kaj ĉu mi Lin iam ie vidos?
La patrin' respondis: "Mi vin gvidos
al Li sur la vojo de l' Racio.

Diru: kiu faris ja la teron,
sunon, lunon, ĉiujn brilajn stelojn,
ornamantajn altajn la ĉielojn?
Ĉu pripensis tiun vi misteron?"

— Ne, patrino, — diris mi kaj hontis
ke ne povis doni mi respondon.
Kaj ŝi: "Dio kreis ja la mondon."
— Kial mi neniam Lin renkontis?

"Ĉar vi pensas ke Li estas homo,
sed Li estas multe pli sublima;

estas Li plej saĝa kaj senlima
Estro de la mondoj kaj atomo.[1]

Ĉie estas Li, Spirit' plej pura:
ĉie kie estas bono, belo,
sur la tero kaj en la ĉielo,
en l' arbaro, en la urb' kultura.

Sed ne loĝas Di' en malboneco,[2]
en malvirt', malamo, en malvero,[3]
egoismo, kruelec', fiero.
Serĉu Dion en la korpureco!"

15/03/1952

Reformador, feb/1953
Tri manskribaĵoj el la arkivo de Jandira Lorenz

1 Variaĵo: *Estro de l' mondar' kaj de l' atomo.*

2 Variaĵo: *Sed ne estas Dio malboneco, / nek malvirt', malamo nek malvero, / egoismo, kruelec', fiero; / serĉu Dion en la korpureco!*

3 Variaĵo: *en malvirt', malamo nek malvero,*

III

—

Dio helpas la kredantojn

En mia jar' dekdua mortis tre malriĉa
najbaro nia post malsano kelkmonata,
estinte de doktoro bona kuracata;
kaj ploris tre la familio malfeliĉa.

“Ho Dio”, ĝemis la vidvin', “kial Vi prenis
la edzon for de mi kaj de la ses infanoj?!
Mi nutri ilin devas nun per miaj manoj
kaj mia ŝvit', ĉar mankas kiu nin subtenis.”

Mi ankaŭ en la kor' malĝojon grandan sentis;
l' estonto nigra de l' senpatra familio,
malsat' georfa kaj patrina agonio
en mia timigata menso sin prezentis.

Sed jen, konsolis la vidvinon genajbaroj,
kaj poste multaj helpis ŝin en la laboroj
kaj forfuĝigis densajn nubojn de doloroj
per don' de mono, vesto kaj utilaj varoj.

Kaj la gefilojn bone la vidvin' edukis,
per servoj la donacojn ŝi dankeme pagis;
rekonis mi ke justa Dio saĝe agis
kaj la kredantojn al ĉiela voj' kondukis.

Reformador, mar/1953
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

IV

—

Resanigo[1]

Doktor' Bonvolo estis kuracisto
humana, klera, sed je Di' ne kredis
kaj ofte per prediko li nin tedis
de fervorega materialisto.

"Ĉeestis multajn mortojn mi" — li ridis —
"kadavrojn mi tre multajn °dissekciis,
(komence min ja tio emociis)
sed la 'spiriton' mi neniam vidis.

Spirit', animo estas fantazio;
nenio estas ekster la naturo,
el ĝi sufer' devenas kaj plezuro
kaj el ĝi abomen' kaj simpatio."

Ekmalsaniĝis de l' doktor' l' edzino.
Tagnokte li ĉe ŝia lito sidis,
ke l' drogoj ŝin sanigos, li konfidis,
ĝis ŝajnis ke alvenas jam la fino.

En sia mens' li luktis kun doloro
kaj li ekkriis: "Di', sanigu ŝin,
aŭ kune kun ŝi do mortigu min!"
Kaj aŭdis lian peton la Sinjoro.

1 En la manuskriptoj, *Resanigo* estas la kvina parto, kaj *Saĝa Postulo* la kvara.

Ne scias mi, miraklo ĉu fariĝis,
sed la okulvidintoj min informis
ke la malsanulino tuj ekdormis
kaj poste tute sana °ekvekiĝis.

Kaj l' edzo ŝanĝis sian opinion:
li filantropa esti ja ne ĉesis,
sed tiun resanigon ne forgesis;
kredante, laŭdas li la bonan Dion.

Reformador, jun/1953
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

V
—
Saĝa Postulo

Je l' komenco de l' unua mondmilito
soldatiĝis multaj, multaj junaj viroj;
iuj iris lukti propraj pro deziroj
kaj aliaj pro regnestra leĝinvito:

“Obeante, viroj, de la reĝ' l' ordonon,
venu lukti kontraŭ malamik-invado;
venkos nia kuraĝega batalado,
defendante la patrujon kaj la tronon.”

Daŭris la milit' kun mortarmila bruo;
benis la kanonojn, en la nom' de Dio,

kontraŭ anoj de la sama religio;
floris homa sangverŝado kaj detruo.

Fine ĉesis de l' milit' la frenezdanco
kaj la postvivantoj, kiel °ekvekitaj
el terura sonĝo, lacaj kaj hezitaj,
ekrigardis de la perd' al la bilanco.

El urbeto nia tridek junaj viroj
estis foririntaj, pro l' patruj' batalis;
dudek ses el ili, scias mi, mortfalis;
du el la mortintaj estis oficiroj.

Pri la kvar restantaj la informo venis:
tri kaptitaj estas, unu tre malsana;
tiu estis l' edzo de “belega Ana”,
kiun tiu ĉi sciigo tre ĉagrenis.

Kaj sciigo posta diris: “Karlo mortis.”
Tio tamen estis ja eraro fata,
kiu al la freŝvidvino supozata
malagrablajn trompojn de la sort' alportis.

Dek monatojn poste riĉa vir' proponis
geedziĝon al la “bela vidvineto”;
ĉar agrable sonis al ŝi tiu peto,
sen heziti jesan ŝi respondon donis,

kun rimarko ke ankoraŭ ili devos
du monatojn pli atendi, laŭ kutimo,

ambaŭ preparante sin, kun plenestimo,
°ol ŝi kiel leĝan edzon lin ricevos.

La postulo de l' virin' alportis benon:
du semajnojn poste telegrafsciigo,
kiu ja ne estis trompo nek intrigo,
jen, anoncis de Karloĉjo la alvenon.

Ana do ne edziniĝis kun riĉulo;
ne vidvino estis ŝi, sed, dank' al Dio,
la edzin' de Karlo, laŭ la religio
kaj laŭleĝe, dank' al saĝa la postulo.

Reformador, jul/1953
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Pri Iu Edza[1] Paro

Konis mi geedzojn du, dum mia viv' surtera,
kiuj ŝajnis vivi ĉiam pace, harmonie;
mortis li unue, kaj ŝi ploris, preĝis pie;
pensis mi ke estis tiu malĝojplor' sincera.

Poste mortis ankaŭ ŝi, post longa korpsufero,
kaj mi sekvis ŝin; la bona viro min atendis;
kiam pri l' edzino mi demandis, li tuj plendis:
"Aliloke loĝas ŝi, proksime je la tero.

En tervivo ofte, kiam estis ni du solaj,
ŝi parolis al mi akre kaj kun malestimo,
min nomante malriĉulo kaj sin mem viktimo,
kiun ja delogis miaj planoj malbonvolaj.

Ke ŝi povis edziniĝi kun pli riĉa viro,
nu, kaj tiel plu, kaj fine ĝemis ŝi kaj ploris,
ĝis mi mem ektremis kaj en mia kor' angoris,
kaj ni ambaŭ nin brakumis kvazaŭ en deliro.

Poste unu al l' alia ni pardonon petis,
kaj revenis paco kaj laboro ordinara.
Pri atakoj tiaj ne sciis la dom' najbara,
kvankam ili ja de temp' al tempo sin ripetis.

Amis mi l' edzinon, malgraŭ ŝia koleremo;
petis ke ŝi venku malbonegan la kutimon;

1 *Geedza*

preĝis mi ke Dio savu tiun ĉi animon;
post la morto tia estas mia ofta temo.

Ŝi mortinte, tien ĉi alportis la difekton,
kiu ŝin kondamnis loĝi de mi disigite,
ĉar ne ŝanĝas la kutimon la spirit' subite;
mi esperas ŝian pliboniĝon kaj korekton."

22/03/1952

Reformador, aŭg/1953
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Paskaj Pripensoj

La Pasko, granda festo de l' popol' hebrea,
rakontas gravan fakton de la historio:
el triboj sklavigitaj formis sin nacio
libera, sub la saĝa, firma gvid' Mosea.

Al la kristanoj Pasko-festo memorigas
sur kruco de Jesu' la morton tre doloran
kaj Lian tuj sekvantan reviviĝon gloran:
la mort' al viv' alia la animojn ligas.

La liberecon perdis la Izraelidoj,
ĉar ili pli konfidis al fieraj reĝoj
ol al plenum' ekzakta de la diaj leĝoj;
alportis malliberon pekoj kaj perfidoj.

Kristanoj, ne forgesu, vera ke libero
respektas ĉiam la plej grandan Di-ordonon:
“Por ĉiuj homoj havu amon kaj pardonon,
kaj tiel plantu Dian Regnon sur la tero!”

Pripensu ĉiuj de Jesu' la grandan amon,
ke Li al siaj mortigantoj ja pardonis,
kaj per ekzemplo sia ĉiujn Li admonis
ke ili malmateriigu la vivdramon.

11/04/1952

Reformador, apr/1953
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Profitita Konsilo

Dum mia viv' en la fizika korpo
vizitis ofte min astral-spiritoj,
kaj inter ili estis ankaŭ multaj
kredantaj je diversaj piaj mitoj.

Ekzemple, iu de virin' spirito
ĝemadis: “Ha, mi estas en infero,
ĉar estis mi pro pekoj kondamnita
al neĉesanta tie ĉi sufero.”

Mi tiam al ŝi klare kaj kunfrate
eksplikis ke ne estas pun' eterna,
kaj ke la feliĉeco de l' animo
dependas de la vera pent' interna.

Konsilis mi pardoni al l' aliaj,
erarojn proprajn en kondut' ripari,
estulojn homajn ĉiujn vere ami,
penante multajn bonajn agojn fari.

Post mia elkarniĝo ekmemoris
mi iam tiun suferegantinon
kaj trovis ŝin kontentan kaj tre ĝojan,
ĉar plibonigis sian ŝi destinon.

Ŝi diris: “Kiel vi al mi konsilis,
per amo mi purigis mian koron,

mi penis fari vere bonajn agojn,
kaj Dio donis al mi la favoron."

22/05/1952

Reformador, dec/1952
Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

Poemoj atribuitaj al la spirito de

Abel Gomes

La Celo de la Surtera Vivo

Kial vivas sur la ter' la homo?
Ĉu por ĝuoj korpaj, materiaj?
Ĉu por ĝuoj mensaj, ĝuoj artaj
aŭ sciencaj, aŭ por la pasiaj?

Ne por tia celo enkarniĝas
la animo homa sur la tero,
sed por venki tentojn, iĝi saĝa
kaj amik' de l' amo kaj de l' vero.

Homoj, sekvu de Jesu' l' ekzemplon;
ne perdiĝu en ĝuad' pasia,
sed plenumu la moralajn devojn,
vivu ĉiam laŭ l' ordono dia.

Reformador, feb/1945

Diversaj Oferoj

Tre diversaj povas esti
de la homa kor' oferoj:
humileco ĉe bonsorto,
pezelteno ĉe suferoj;

ĝojaspekto por ĝojigi
iun, ĉe malĝoj' interna;
rezignado je libero
tera pro la viv' eterna;

rezignad' je sia propra
amo kaj feliĉ' persona
pro spirita lum' kaj leĝo
karma, konscienc-impona.

Kaj al Dio plej agrabla
estas de ofer' valoro:
vera am' al suferantoj
kaj por la homar' laboro.

04/01/1945

Reformador, jul/1945

Ne malbenu la suferon!

Ne malbenu la suferon;
ĝi similas al la vento,
purigante la esperon
eĉ en forta korturmento.

Jen ĝi karman ŝuldon pagas,
jen estingas ageraron,
por estonto ĝi bonagas:
ni do benu ĝian faron.

La sufero pacienca
donas benon al l' animo,
kies forto konscienca
ĝin eltenas sen kortimo.

Ĉiu sian krucon portu,
ne ektimu Kalvarion;
materia ŝajno mortu,
vera Est' ekkonu Dion!

21/01/1945

Reformador, aŭg/1945 kaj feb/1985

Ne forpelu verajn ĝojojn!

Ne forpelu ĝojojn verajn,
kiujn vivo al vi donas,
nek malbenu la severajn
provojn, se ĝi vin admonas.

Vera ĝojo estas sano,
kaj malsan' — severa provo;
ĝoju se ne mankas pano,
nek por gajni ĝin la povo.

Ĝojon donas la laboro,
se vi amas ĝin sincere;
ĝojon sentu via koro,
se vin iu amas vere.

La feliĉo de aliaj,
eĉ de l' fremdaj, vin ĝojigu;
bonaj sentoj familiaj
vian ĝojon pligrandigu.

Vera de l' homar' progreso
estu por vi dolĉa ĝojo,
kiel de malamoj ĉeso
kiel al Dio luma vojo!

21/01/1945

Reformador, sep/1945

Kiam mi ne kredis

Kiam mi ne kredis je postmorta vivo,
pesimismo estis mia pens-motivo;
ĉie mi nur vidis vanon en Naturo,
finan neniigon ĉiu de plezuro.

“De l' junec' beleco ja perdiĝas frue,
pri ĝi maljunulo pensas kor-enue;
de l' perdita sano portas rememoro
nur malĝojajn, pezajn larmojn de doloro.

Amo de du koroj estas bela sorto;
sed ho ve! ĝin rompas bato de la morto.
Estas bele flegi lumon de ver-scio,
sed post mort' el tio restas ja nenio.”

Tiel mi pensadis granda kun malĝojo,
kiam mi vivadis sur nekreda vojo.
Sed de l' Dia mano la kompata Bono
gvidis min al fonto de la vera Kono.

Kred' je l' Saĝa Dio kaj la Viv' senmorta
estas ja de nia sav' la ankro forta.
Lum' de l' Spiritismo estas lum' de l' Vero,
ĝi la homojn savas de la malespero.

24/01/1945

Reformador, okt/1945

Kiam mi ekkredis

Kiam mi ekkredis je postmorta vivo,
malfermiĝis al mi de Saĝec' l' arkivo;
ĉie en la mondo vidis mi la celon,
ekkoninte ĉie bonon mi kaj belon.

Se l' belec' perdiĝas frue sur la tero,
daŭras ĝi eterne en l' astral-etero;
se malsan' la korpon ĵetas sur la liton,
sano akompanas ĉiam la spiriton.

Amo de du koroj estas bela sorto;
ĝin, se ĝi fidela, ne disbatos morto.
Estas bele studi veron sur la tero,
kaj l' anim' postmorte vivos en la vero.

Tiel mi ekkonis kun agrabla ĝojo,
kiam min kondukis de la kred' la vojo.
Mi ekvidis l' altan fonton de la Bono,
kiu lavas pekojn per la Am' kaj Kono.

Vera kred' dispelas de nekred' la nubojn,
ĝi racie solvas de la mens' la dubojn;
per la faktoj montras ĝi spirit-realon,
kaj ĝi priklarigas sorton kaj fatalon.

24/01/1945

Reformador, nov/1945
Informilo de Esperanto-Rondeto de Torquato Severo, jan/1946

Pri la Dia Justeco

Ĉiam la kompato Dia justa estas,
kaj justecon Sian Dio manifestas,
ĉu en nuna vivo, ĉu en viv' alia;
ĝin agnoski povas ĉiu menso pia.

Se ni bonon faris en pasinta vivo,
de l' feliĉo nuna estas ĝi motivo;
se nin malfeliĉo punas kaj sufero,
iam ni malbonon faris sur la tero.

Unu vivo estas kvazaŭ unu tago,
kaj la fruktojn donas ĉiu homa ago,
laŭ kvalito sia: bona aŭ malbona;
tion oni nomas “la merit' persona”.

Se ni iam amis nian nur profiton,
ni nur tre malgrandan havas nun meriton;
se ni por aliaj faris bonoferon,
juste Dio donas nun al ni prosperon.

Lia justa mano la justulon benas,
dum al la krimulo justa puno venas.
Do se vi suferas, havu paciencon,
kaj konservu ĉiam puran konsciencon.

24/01/1945

Reformador, dec/1945

Atentu la finon!

Kion ajn vi faras, pri la fin' atentu!
La komenco bona estas paŝ' unua
al sukces' de l' verko; sed espero frua
al maldiligento vin neniam tentu!

Pro malfacilaĵ' la menson ne turmentu,
la kuraĝo estas ĉiam tre influa
kaj precipe en la laborad' konstrua;
ĉiam do kuraĝon en l' animo sentu.

Koncentradu viajn pensojn pri l' laboro,
de l' komenco al la mezo kaj la fino,
kiel pri plej granda via ortrezoro.

Laborem' racia estas ora mino;
ago atentema, diligent' sufiĉa
estas vojo certa al sukces' feliĉa.

25/01/1945

Reformador, jan/1946
Komunikoj, n-ro 171 (jul–sep/2018)

La pensoj estas fortoj

La pensoj, eĉ sen vortoj
tre grandaj estas fortoj,
kaj povas bonon krei
aŭ al malbon' obei.

Se iu pensas ŝteli,
mortigi aŭ ribeli,
spirite li jam faras
ja kion li preparas.

Se pensas li pri krimo,
li iĝas tuj viktimo
de krima la ideo,
gvidanta al pereo.

Nu, pensu ĉiam bonon,
— mi donas ĉi admonon, —
pensadu pri la sano
kaj pac', kaj ne pri vano!

Ne pensu pri milito
nek pri mirakla mito,
nek pri malsan', danĝero:
protektos vin l' espero.

26/01/1945
Reformador, feb/1946
Komunikoj, n-ro 170 (apr–jun/2018), n-ro 173 (jan–mar/2019) kaj n-ro 188 (okt–dec/2022)

Rememoroj kaj la Nuno

Alvenas al mi rememoroj
pri tagoj, sur ter' pasintaj,
pri multaj tre amaraj horoj,
animon mian turmentintaj.

Briladis sur la firmamento
la hela suno ridetanta,
kisadis mian koron sento
de ĝoj', feliĉon promesanta.

Sed baldaŭ venis nigraj nuboj
kaj vualkovris la ĉielon;
atakis mian koron duboj,
kaj semis en la mens' malhelon.

Kaŝiĝis de l' esper' la suno
sub densaj nuboj de sufero;
sed hele brilas re la nuno
post kiam venis mi de l' tero.

La morto jam surtere timon
por mi ekperdis, min lumigis,
kaj kiam tien ĉi l' animon
transportis ĝi, min feliĉigis.

Nun ĉiam sur la firmamento
mi vidas de la sun' rideton,

kaj kun dankema amo-sento
de l' vera ĝojo la ripeton.

01/02/1945

Reformador, mar/1946

Hirundetoj[1]

Hirundetoj, mi rigardis
iam vin, ha, kun envi',
ke vi bone flugi povis,
kaj ne povis flugi mi.

Mi diradis sur la tero:
“Mi kontente flugus for,
flugus mi viziti iun,
kaj ekĝojus mia kor'.”

Mi deziris ke mi povu
en l' aero levi min,
kaj pro via flugebleco
tiam mi enviis vin.

Sed postmorte mi eklernis
flugi ĉien laŭ dezir',
pli rapide eĉ ol vi mem,
en leviĝ', en subenir'.

Hirundetoj, nun mi pensas
pri birdflugo sen envi';
nun mi ankaŭ povas flugi,
kaj pli bone eĉ ol vi.

01/02/1945
Reformador, apr/1946 kaj maj/1986
Komunikoj, n-ro 175 (jul–sep/2019)

1 Vidu ankaŭ la samtitolan tradukitan poemon.

Miaj Rememoroj

Iam rememoras mi la jarojn
de juneco mia, esperplena,
miajn ludojn kaj infanajn farojn
kaj la ĝojon de la viv' serena.

Tiam estas mia kor' kontenta,
tiun belan tempon revivante;
sed tre baldaŭ bildo malĝojsenta
ekaperas en la mens', tremante.

Ĉar post la juneca ĝoj' ekblovis
la fatala vento de suferoj,
kaj mi ne plu ĝuon dolĉan trovis,
kaj eĉ ekminacis malesperoj.

Tamen Di' neniam min forlasis,
Lia man' protektis min kaj gvidis:
kvankam en sufer' la jaroj pasis,
de konsol' la lumon mi ekvidis.

Jam surtere mi l' eternan vivon
en l' anim' eksentis, benon Dian,
kaj konservis tiun pensaktivon
tie ĉi, riĉecon vere mian.

02/02/1945

Reformador, maj/1946

Ne miru!

Ne miru, frato, ke mi ion
ellernis en la viv' astrala;
postmorte povas la spirito
progresi en la sci' reala.

Surtere el semet' malgranda
eĉ alta arbo kreski povas;
animo ĉiu en ĉi mondo
pliperfektiĝi eblon trovas.

Dependas ĉio de la volo
kaj de l' altec' de l' idealo;
l' animo povas progresadi
sur mont', sur ebenaĵ', en valo.

Se, tamen, ĝi ne volas lerni,
neniu lerni ĝin devigos;
libera estas ja l' animo,
nur ĝia propra vol' ĝin ligos.

La propra vol' al ago ligas,
per ag' atingas ĝi la celon;
volita ago naskas ĝojon
kiele la abel' mielon.

02/02/1945

Reformador, jun/1946
Komunikoj, n-ro 177 (jan–mar/2020) kaj n-ro 189 (jan–mar/2023)

Tri Grandaj Virtoj

Tri grandaj virtoj estas de l' kristano
ornam' tre bela, granda de valoro,
pli granda eĉ ol oro, eĉ ol sano;
en ĝojo ili brilas, en doloro.

Se en sufer' malĝojas via koro,
se mankas mon' al vi, aŭ eĉ la pano,
kuraĝe luktu kontraŭ la angoro,
per *kred'* fortiĝu la agema mano.

En tagoj de sufero, la *espero*
konduku vin kaj venkon al vi donu!
Kristanan *amon* eĉ de fat' severo

respektas, kaj neniam ĝin detruos.
Kristane ĉiujn amu kaj pardonu
la ŝuldojn, kaj ĉielon vi konstruos.

03/02/1945

Reformador, jul/1946
Komunikoj, n-ro 172 (okt–dec/2018) kaj n-ro 194 (apr–jun/2024)

Venku la pesimismon!

Ke la Natur' kruela estas, frato,
vi diras; ke por vivi ja bezonas
la hom' kaj best' mortigi, sen kompato,
viventojn, kiel la malsat' ordonas.

Ke en militbuĉad' la mondo dronas,
milmile detruiĝas viv' sen ŝato,
la malamikon neniu pardonas,
detrui lin ja devas la soldato.

Vi pravas; sed memoru ke surtere
ne povas reĝi pac', dum la homaro
ne vivos kiel bonaj fratoj vere;

la tera vivo estas nur preparo
por vivo en spiritaj altaj sferoj,
en kiuj realiĝas pacesperoj.

03/02/1945

Reformador, aŭg/1946
Komunikoj, n-ro 176 (okt–dec/2019) kaj n-ro 187 (jul–sep/2022)

Avarulo[1]

Promenante en la regiono
de Krepusko, ĉi en Astralujo,
mi renkontis kelkajn spirithomojn
alvenintajn mia el patrujo.

Inter ili estis komercisto,
kiu elkarniĝis antaŭ jaroj,
sed ankoraŭ ĉiam nur pensadis
pri la mono, gajno, kaj pri varoj.

Kiam mi ekvidis lin, li sidis
ĉe skribtablo, monon kalkulante;
oraj pecoj, papermono kuŝis
tie; li kalkulis ridetante.

Mi salutis. Tuj per tuk' li kovris,
tremante, sian montrezoron
kaj ekkriis: "For, aŭ mi la hundon
vokos!" — Li ekhavis palkoloron.

"Min ne timu", diris mi; "amiko,
ĉu vi min, Habelon, ne rekonas?"
Li respondis: "Ĉu aĉeti volas
vi? Kontante? Mi ne pruntedonas."

Varojn mi ne vidis, nek murdomon;
ilin havis li nur en l' imago.

1 Vidu ankaŭ la poemon *La avarulo pentas*.

Li demandis: “Kial do vi venis?
Ne hodiaŭ estas vizittago.”

Vent' ekblovis kaj la tukon levis;
kaj nek mon' nek oro reaperis,
sed nur sablo kaj folioj velkaj.
La spirit' avara ekkoleris:

“Tuj redonu al mi mian monon!”
kriis li, minacis per armilo.
Mi ridetis: “Via mon', amiko,
estis nura ŝajno sen utilo.

Vi ne vivas plu surtere, tial
oro, kupro estas sen valoro
ĉi por vi, sed ĉiam nur valoras
bonaj agoj, bonaj mens' kaj koro.”

Tamen ne komprenis l' avarulo,
ĉar subite li komencis kuri
ien kie io ŝajnis brili;
kaj mi aŭdis tie lin murmuri:

“Jen mi trovos mian oron tie!”
Sed veninte al la lok' brilanta,
vidis li lampiron kaj malĝojis
ke ne estis ora brilo vanta.

Mi deziris al li priklarigi
lian staton, sed li forkuradis,

ne volante aŭdi; retroiris
mi do kaj por li al Di' preĝadis.

04/02/1945

Reformador, sep/1946
Komunikoj, n-ro 191 (jul–sep/2023)

Mallaboremuloj

Kiu en surtera vivo sia
ne amadis vibrojn de l' laboro,
sed sin okupadis per ludado,
per amuzoj aŭ per ŝajna gloro:

Post la morto havos tre malĝojan
vivon kaj sin sentos malfeliĉa,
havos mankon de necesaj aĵoj,
eĉ se li surtere estis riĉa.

Ĉar se, kiam li surtere vivis,
por l' estonto li nenion faris
de utilo por animo sia,
nur dezerton li por si preparis.

Li ne semis ion fruktodonan,
lia vivo en vantagoj pasis;
por feliĉo de aliaj homoj
li nenion post la morto lasis.

Kiam vidis mi spiritojn tiajn,
mi bedaŭris ilin, sed ne povis
helpi, ĉar laŭ dia leĝo ĉiu
kion jam preparis li, ĉi trovis.

Unu estis sur la ter' botisto,
sed preferis baldaŭ kartojn ludi,

brandon drinki, pensi pri trompado
kaj la malhonestajn artojn studi.

Dum kverelo lia kamarado
lin mortigis, kaj nun li koleras,
pensas venĝi sin, minacas ĉiujn,
estas preskaŭ blinda, tre suferas.

Li eniras en drinkejojn, volas
drinki, sed nur sentas brandvaporon;
tio al li ne produktas ĝuon,
sed nur malagrablan kapdoloron.

Ankaŭ ofte sentas li malsaton;
kelkfoje ludas kun aliaj,
tamen preskaŭ ĉiam el la ludo
iĝas kverelad' kaj luktoj fiaj.

Ankaŭ vidis mi spiritojn, kiuj
loĝis, duonnudaj, en tertruoj,
ne posedis agron, nek ĝardenon,
vivis sen laboro, sen instruoj.

Mia instruist' al mi eksplikis
ke nur kiam iu suferanto
pentas, siajn kulpojn agnoskante,
portas al li helpon kompatanto.

Ĉar de multaj spirit-asocioj
tiaj kompatantoj alvenadas

al l' animoj, en mallum' vivantaj;
kaj volonte ili ja helpadas.

Reformador, okt/1946

Memmortiginto

Kiam estis li infan' surtere,
baldaŭ faris lin la sort' °orfano;
al fremduloj devis li servadi
pro la vesto kaj pro l' seka pano.

Kreskis lia korpo, fortiĝadis,
sed neniu zorgis pri l' animo;
kiam viriĝante, li ekamis,
trafis lin de l' mondo malestimo.

La knabin' amata lin ne amis,
preferante maljunulon riĉan;
la junulo vivis tre malĝoje
kaj malbenis sorton malfeliĉan.

Ne kredante je postmorta vivo,
per armila paf' li sin mortigis;
tre malfrue poste li ekkonis
ke li sin nur pli malfeliĉigis.

Tage, nokte en mallum', li sentis
la ĉeeston de kadavro sia,
ĝian putrodoron kaj la vermojn,
kaj pasadis temp', sen helpo ia.

Li ne vidis la spiritojn bonajn,
kiuj pri li zorgis kun atento,

atendante ke en lia menso
°nasku lumo de savanta pento.

Iutage lia konscienco
°ekvekiĝis, kaj li petis Dion
pri pardono, kaj patrino lia
venis, portante la savmision.

Li pli poste al la ter' revenos,
kie vizitados lin doloroj,
sed ke li eltenu, al li helpos
de la konscienc' la rememoroj.

Reformador, nov/1946
Komunikoj, n-ro 167 (jul–sep/2017) kaj n-ro 192 (okt–dec/2023)

Trompistoj

Apartenas al la mond' astrala
ankaŭ region' “Trompuj'” nomata,
kiu estas de trompad-amikoj
kaj perfiduloj priloĝata.

Mi ekvidis tie du trompistojn:
unu volis al l' alia vendi
agron, ŝajne bone kulturitan.
“Pri rikolto vi ne devos plendi”,

Diris li, montrante la plantaĵon;
sed l' alia vidis nur dezerton;
tamen la unuan li tromponte,
laŭdis lian kampon, lian sperton.

Sed la monon kiam li liveris,
ĝi tuj transformiĝis en sablerojn.
Li ekkriis: “Tiel mi pagas
bone viajn trompon kaj malverojn.”

La unua tuj lin pugnatakis
kaj subite ambaŭ jam komencis
lukti, kaj kriadis: “Ho, trompisto,
mi nun vidas, kion vi intencis.”

Unu batis la alian forte,
unu la alian faligadis;

tiu lukto daŭris longatempe,
fine ambaŭ, lacaj, ekdormadis.

Poste ili, vekiĝinte, ĉiu
aliloken iun trompi iris;
kiel ili, estis tie multaj
kiuj trompi ankaŭ min deziris.

Ankaŭ ĉar mi trompi min ne lasis,
ili volis min ataki, bati,
sed mi per volfort' forpelis ilin
kaj min ne permesis ekspluati.

Mi aliajn suferantojn tie
vidis: unu persekutis l' eks-edzinon,
pro perfido; ŝi sin kaŝis ie,
li ŝin serĉis, granda kun obstino.

Kiam ŝajnis ke li ŝin jam trovis,
jen virin' alia ekaperis;
ŝi, en sia am', de li trompite
estis forlasita, tre suferis.

Mi ekkonis ke ĉi tie ankaŭ
mi ankoraŭ helpi nun ne povas;
ĉar se ne surtere, la krimulo
post la morto sian punon trovas.

Reformador, dec/1946

Morto de Justulo

Dum tuta sia surtervivo
la diajn leĝojn li observis,
kun ĉiuj homoj vivis pace,
al multaj helpis li kaj servis.

Alvenis fine nun la horo
ke surtervivon li forlasu
kaj al aliaj vivosferoj
animo lia baldaŭ pasu.

Sur mortolito kuŝas lia
fizika korp' en agonio;
l' amikoj ĉeestantaj ploras,
sed lin konsolas fid' al Dio.

Jam fermis sin l' okuloj korpaj,
la buŝ' videbla estas muta;
sed antaŭ lia mens' aperas
en bildoj lia vivo tuta.

Al lia vid' spirita lumo
malfermas horizonton helan,
orelo lia ekperceptas
de ĝojo himnon elĉielan.

Parencoj kaj amikoj venas,
salutas lin, al si altiras;

feliĉa, ilin li brakumas
kaj regnon de la glor' eniras.

Reformador, jan/1947 kaj feb/1987

La avarulo pentas[1]

Kelkaj jaroj pasis post vizito
mia ĉe la avarul-spirito;
li daŭrigis pensi pri la oro
kaj pri l' mono, tiu ŝajn-valoro.

Ofte li malĝojis, malesperis,
kiam lia mono malaperis;
sed li ree ĝojis kiam povis
ĝin rehavi, aŭ alian trovis.

Iutage pri edzino sia
li ekpensis, iom nostalgia;
pli antaŭe ŝi ol li la teron
jam forlasis, kaj malsan-suferon.

“Kial mi ŝin ne renkontis?” diris
li kaj peze pro saŭdad' sopiris.
Li ne sciis ke l' edzin' amata
vizitadis lin, kun kor' kompata.

Ŝi por li preĝadis jam dum jaroj
kaj pro li pensadis pri riparoj
de malbonaj multaj kulpoj liaj,
kaj lin savis ŝiaj preĝoj piaj.

Ion strangan l' avarul' eksentis
en la kor', kaj fine li ekpentis

1 Vidu ankaŭ la poemon *Avarulo*.

ĝemkriante: “Dio, min pardonu,
la edzinon Vi al mi redonu!”

En minut' la sama li ŝin vidis
kaj forlasi pekojn li decidis:
“Kiel povis mi, pro l' falsa oro,
forgesadi vin en mia koro?!”

“Nun mi vidas ke, se Di' pardonas
miajn pekojn, Lia voĉ' admonas
min, edzino, ke mi tion devas[2]
nur al vi! Vi min al Dio levas.”

La edzino kisas lian vangon:
“Ke eniru vi pli altan rangon,
ne sufiĉas montri penton nuran,
sed vi devos sekvi amon puran.

Nun ni iru ambaŭ al la sferoj
kie vivas ankaŭ en suferoj
viaj malamikoj; ilin helpu,
el paciĝo novajn fortojn ĉerpu!

Nun ekkonu, ke feliĉo vera
emanadas el la am' sincera;
bonaj agoj estas ja trezoro
vere pli valora ol la oro.”

Reformador, feb/1947
Komunikoj, n-ro 196 (okt–dec/2024)

2 *ŝuldas* (*dever* en la portugala)

Kaŝitaj Perloj

Kiam mi vivadis sur la tero,
mi ekkonis homojn diversmensajn:
unujn akompanis la espero
eĉ en tagoj vere mallumdensaj;
kaj aliajn iu ajn sufero
enĵetadis veojn en intensajn.

Iuj emis fari bonan agon
nur se ĝi donadis bonan famon;
ili atendadis ja repagon
kaj neniam sentis veran amon;
por bonfari, elektadis tagon,
rekompencon, dankon kaj reklamon.

Sed aliaj pagon ne atendis
de l' bonfaroj, en sekret' faritaj;
pri la maldankemo ja ne plendis
nek pri donitaĵoj senprofitaj;
siajn manojn en sekret' etendis
eĉ al suferantoj senmeritaj.

Donacante, ili ne trumpetis;
ofendite, ili korpardonis;
ili nek oron nek famon petis,
tamen Dio ĉi al ili donis
Sian Gracon, kiel Krist' profetis
kiam sur la Mont' Li nin admonis.

16/03/1945

Reformador, apr/1947

Ni laboru!

Al mia kara nevo, Ismael Gomes Braga.

Ofte dum ripozaj miaj horoj,
de la mens' tra l' pordoj malfermitaj
ekaperas, bildoj subitaj,
pri l' surtera vivo rememoroj.

Mi revidas l' aron da laboroj,
por la Ideal' de ni faritaj;
multaj semoj estas ja perditaj,
sed ekĝermis iuj en homkoroj.

Sur la ter' rikolton mi ne vidis,
sed persistis, ĉar min Dio gvidis,
kaj mi ĝojas kore tie ĉi,

via ke laboro fruktojn donas,
kaj kun Zamenhof mi vin admonas:
ĉiam kun persist' laboru ni!

22/03/1945

Reformador, jul/1947
Komunikoj, n-ro 168 (okt–dec/2017)

Laŭdu ni Dion

Laŭdu ni Dion, la Fonton de l' Bono!
El Li ja ĉiu vivdono elfluas;
Li la atomojn kaj mondojn konstruas,
laŭdu Lin nia sento kaj sono!

Leĝo eterna, kun milda pardono,
Li la justecon kun am' distribuas,
veran la vivon neniam detruas,
sed ĝin ornamas ĉiela per krono.

Laŭdu Lin ĉiu racia persono;
ĉiu animo pensanta, sentanta,
ĉiam vivadu laŭ Lia ordono!

Lia ordon' estas Amo plej sankta;
nur se ni amas la homojn kaj Dion,
ĝuas la kor' la ĉiel-harmonion.

23/03/1945

Reformador, sep/1947

Poemoj atribuitaj al la spirito de

Antoni Grabowski

Rekonstruo

De la kampoj, urboj kaj vilaĝoj
de Eŭrop' forkuras, sen kuraĝoj,
la militfurioj post detruo
de l' kulturo kaj moralinfluo.

Kio restis, ha! el Varsovio?
Mi ĝemploras, kiel Jeremio
pro Jerusalem', pro l' Pola lando,
prirabita de barbara bando.

Mi ĝemploras pro l' Eŭropo tuta,
vekrianta en dolor' akuta
pro la perd' de l' civilizvaloroj,
de l' scienc' kaj arto la trezoroj.

Sed en tiuj ĉi malĝojaj horoj
neutilaj estas multaj ploroj;
pensu ĉiuj pri la rekonstruo
sur la saĝa leĝo de Jesuo!

Ĉiuj landoj iĝu bonnajbaroj,
reciproke helpu per bonfaroj
rekonstrui rondon familian
kaj meriti ĉiuj benon Dian!

15/05/1945

Reformador, jan/1948

Sonas sonoriloj

En la kampaniloj sonas sonoriloj;
ankaŭ en la koroj sonas sentvekiloj;
ploras la gepatroj pro l' amataj filoj,
kiuj sian vivon al Patruj' oferis;
en heroaj luktoj ili tre suferis,
sed liberon sanktan por la mond' konkeris.

Sonas en la koroj dolĉaj rememoroj
pri l' feliĉaj tempoj, de la sort' favoroj,
tamen ankaŭ pri la malĝojegaj horoj,
pri l' disiga voko de l' severa devo,
pri la neniigo de belega revo,
de fataleventoj — ve! — pri la ricevo.

Ploru kaj suferu, sed ne malesperu,
vi gepatroj, kaj pro l' filoj eĉ fieru;
ili mortis sur la ter', sed konsideru
ke la vera vivo estas ja eterna;
en la mond' spirita la dolor' konsterna
malaperas en la daŭra ĝoj' interna.

16/05/1945

Reformador, apr/1948
Almanako Lorenz — 2018 kaj 2020

Nobla Batalo

Al nobla batalo mi ĉiujn invitas,
al sankta luktado, ho samideanoj,
kaj kiel Arĝunon ja Krišno, ekscitas
mi ĉiujn vin kontraŭ danĝeraj tiranoj.

Sed sciu, farante necesajn preparojn:
la lukto ne estos sur kamp' materia;
ni venki penados la mensajn erarojn
per luma labor' kaj kuraĝ' energia.

Malamon detruos en niaj ni koroj,
ke ilin regadu kristana nur amo;
de l' bono kaj belo kaj ver' valoroj
posedos meriton de nia aklamo.

Anstataŭ memamon ni spiros kompaton,
humilaj ni estos kaj ne plu fieraj;
en ĉiu person' konsideros ni fraton,
kaj ĉiuokaze ni estos sinceraj.

Malvirtojn fuĝigos ni, virtojn estimos;
de l' pekoj ni fuĝos, aliajn pardonos;
en tia batalo nenion ni timos,
al niaj animoj la pacon ni donos.

25/05/1945

Reformador, apr/1949

La Celo de l' Evoluo

De l' tero dolorojn mi ĉiujn forgesas
en horoj benataj de l' dolĉa vizio
de l' Dia Saĝec', kiu en harmonio
de l' Tuto al ĉiuj kunvivi permesas.

Komprenas mi, ĉion ke koni °necesas
l' anim': ke volupte karesu pasio,
doloro ke poste miksiĝu en ĉio:
nur tiel la hom' sur la Vojo progresas.

Vizio sublima de l' cel' en l' estonto
prezentas la vivon de homoj-anĝeloj
en altaj, belegaj, eteraj ĉieloj.

Kaj tie eterne emanas, el fonto
de l' Bono kaj Amo spirita, la fluo
de ĝojo plej pura, sen ajna enuo.

Reformador, jul/1951

Poemoj atribuitaj al la spirito de

Stanislav Schulhof

Ni danku al Dio!

Ni danku al Dio pro Liaj donacoj:
pro l' lumo de l' Suno en stelaj la spacoj;
pro l' paco trankvila de l' nokta mallumo,
en kiu ĝojigas de l' sonĝ' la brakumo!

Ni danku al Dio pro l' amaj radioj
de Lia gepatra zorgem', harmonioj
de l' nemezureblaj orbitoj de l' mondoj,
sen ĉes', de l' eter' moviĝantaj en ondoj.

De Li al ni venas spirita verkono,
la beno de l' bono, de l' pekoj pardono;
Li montras la vojon de l' vera progreso,
de l' homoj erarojn korektas sen ĉeso.

Eĉ kiam afliktas malĝojo la koron,
mildigas pri Dio la pens' la doloron;
pro l' venko de l' bona afero en ĉio
post luktoj, gefratoj, ni danku al Dio!

15/05/1945

Reformador, nov/1948

Orfino

Al la tombejo knabino vojiras,
larmojn ŝi verŝas kaj viŝas, kaj diras:
“Kie vi, patro amata, nun estas?
Tombo malvarma sub ter' vin arestas.
Kie vi estas, ho kara patrino?
Ankaŭ vin tenas la tero ĉe l' sino.”

Ploras l' orfino kaj, en la malĝojo,
jen ŝi sidiĝas ĉe l' bordo de l' vojo;
iun ne vidas ŝi, tamen l' orelo
aŭdas parolojn de voĉ' el ĉielo:
“Mia filino, vi pense eraras;
apud vi, jen, mi, via patrino ĉi staras;
mian kadavron la tombo nur tenas,
mia spirito konsoli vin venas.
Vivas mi, kune kun paĉjo en sfero
kie ne estas malsan', nek sufero.
Vivu surtere kun virto kaj pi',
kiam vi mortos, vi venos al mi.”

18/05/1945

Reformador, maj/1948
Komunikoj, n-ro 193 (jan–mar/2024)

Kiam mi vidas

Kiam mi vidas kiel mokridas
la nekredantoj je la spiritoj,
konsiderante ilin nur mitoj,
kaj nur je l' karnaj ĝuoj konfidas:

Kiam mi vidas kiel insidas
ilin de l' tentoj dolĉaj invitoj
kaj de l' voluptaj bildoj incitoj
tiel ke l' homoj peki decidas;

Kiam mi vidas tion, mi sentas
grandan doloron, grandan kompaton,
ĉar mia vido mensa prezentas

tre malfeliĉan ag-rezultaton:
ilin atendas justa sufero
jam sur la tero, aŭ en l' etero.

20/05/1945

Reformador, aŭg/1948
Komunikoj, n-ro 186 (apr–jun/2022)

Ofte mi vidis

Ofte mi vidis: homoj mokridis
pri la kredantoj je la spiritoj,
sed la kredantoj, malgraŭ mokspritoj,
al la spiritaj voĉoj konfidis.

Kvankam la tentoj ilin insidis
per siaj ŝajne dolĉaj invitoj
kaj de l' voluptoj per la incitoj,
venki la tentojn ili decidis.

Ofte mi vidis tion, kaj sentis
ĝojon, kontenton en mia koro,
ĉar mia vido mensa prezentis

bildon de bela, granda valoro:
ilin atendas vera prospero,
se ne surtere, en la etero.

20/05/1945

Reformador, dec/1948

Akvo kaj Vino

En la mondkomenco, diras la Biblio,
super l' akvo ŝvebis la Spirit' de Dio;
estas do la akvo la pra-materio,
kaj el ĝi formiĝis sur la tero ĉio.
Nek la hom' nek bestoj sen ĝi vivi povas,
oni ĝin en ĉiuj organismoj trovas;
ĝi surtere ĉiujn vivoformojn kovas;
transformite ofte, ĝi progreson movas.
El Spirit' kaj akvo homoj renaskiĝas,
dum por Dia Regno ili prepariĝas.

Akvo servas ankaŭ por purig' kaj lavo,
tre necesa por la liberul' kaj sklavo,
kiel Dia Vorto por l' anima savo
estas la rimedo kaj plej bela ravo.
Krist' el akvo faris tre bongustan vinon,
kiam Li komencis semi la doktrinon;
vin' en akvo havas sian originon,
kaj ĝojigon puran kiel la destinon.
Kiel do Jesu' en Galilea Kana,
al malĝoj' konsolon donu kor' kristana!

23/05/1945

Reformador, mar/1949

Viva Akvo

Vivan akvon petis iam al Jesuo,
apud put' profunda, Samarianino,
kaj Li donis al ŝi akvon de l' instruo
de la savo per spirita la doktrino.

"Dio ja Spirito estas", al ŝi diris
Li, "kaj tial en Spirito Lin adoru!"
Dio best-oferojn neniam deziris,
sed ke pura mens' en Vero Lin honoru.

Vivon donas ne literoj de la rito,
sed la spiro de l' kreanta Dia Amo,
ĉar la vera Vivo estas en Spirito,
kaj senfina estas ties lum' kaj flamo.

Kaj neniam plu soifas la animo
per avido de l' riĉaĵoj materiaj,
se ĝi veran scion trinkis en l' intimo:
ĝi eterne vivas en loĝejoj Diaj.

Reformador, jul/1949

Trankviliĝu!

Kiu meritas nomiĝi kristano,
tiu evitas malamon, koleron,
faras bonagojn kaj nutras toleron,
estas amiko eĉ de l' publikano.

Ĉiam etendas sin lia helpmano
por mildigadi ajn ies suferon;
ĉiam sincere li amas la veron
kaj trankviliĝas eĉ dum uragano.

Do trankviliĝu, amataj gefratoj,
se por la mondo la luktoj ne ĉesas
inter la fortoj kontrastaj de l' fatoj.

Vi trankviliĝu, ĉar Kristo promesas
pacon kaj lumon al tiuj surtere
kaj en ĉiel', kiuj amas Lin vere.

Reformador, jun/1951

Kie estas Dio?

...[1]

kaj disradias en la materion,
en kiu ilin Tempo zorge flegas,
dum ilin evolua humo tegas;
la Tempo ne permesas celdevion.

Per lum' kaj ombro modlas ĝi objektojn,
montrante ĉiam al la cel' direktojn
dum la longega kosma Evoluo;
per bonapero, tiu en vojaĝo,
fortiĝas al la vojaĝant' kuraĝo
kaj forgesiĝas de l' sufer' la bruo.

Do serĉu Dion en la mond' spirita,
en Perfektideal' realigita,
sed ne en egoismaj brubataloj;
Li estas ĉie, sed nur en Perfekto,
Li en Si mem, Eterna, sen difekto,
plej alta Ideal' de l' Idealoj.

19/07/1945 (je la 9-a horo matene)

Manskribaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 La unua paĝo ne estis retrovita.

Poemoj atribuitaj al la spirito de

L. L. Zamenhof

La paco proksimiĝas

Heroldo de l' sankta, beninda mondpaco
anoncas de tempo pli bona l' alvenon
al ĉiuj popoloj de l' tera surfaco,
de nova progreso preparas la scenon.

Ni, kiuj laboris kaj ĵuris batali
por Vero kaj Amo sincera de l' koroj,
ho Dio, Vin petas: Ne lasu defali
la fortojn de l' menso, pro l' pezaj doloroj!

Kaj vi, sur la tero vivantaj gefratoj,
ne ĉesu labori por bon' de l' homaro,
neniam fariĝu de l' ĵur' renegatoj,
sed pace batalu, per vorto kaj faro.

La verdan standardon fidele subtenu,
sciante ke signas ĝi bonon kaj belon;
de Di' ĉiopova la mano vin benu,
ke l' Venko atingu subliman la celon.

09/05/1945
Reformador, okt/1947
Esperantista Bahiano, n-ro 5/8 (1948)

Ne forgesu!

La sanktan Idealon ne forgesu,
gefratoj, sekvi ĉiam tre fidele;
kaj ĉiutage al vi mem promesu
labori por homara bon' laŭcele!

Memoru pri la luktoj jam venkitaj
kaj ne forgesu ke, se sur la tero
viktimoj falis, jaroj dum militaj,
al la estonto servas la ofero.

En la spirita, mensa regiono
ankoraŭ daŭras la ide-batalo
por Vero, Belo kaj reala Bono;
al forta Volo cedos la Fatalo.

Do helpu ĉiuj vi, samideanoj,
disbati fine la restantajn barojn
de la malamo kaj, per puraj manoj,
de l' lasta venko faru la preparojn!

10/05/1945

Reformador, okt/1948

Estu optimistoj!

Se vi sentas dubojn en la koro
pri estonto paca de l' homaro,
se vi pensas ke sufer', doloro,
lukto regos ĉiam, kaj sen ŝparo;

Ke plimulto de l' hommensoj dormas
kaj nur sonĝas animalajn ĝuojn,
kiuj novajn malamikojn formas,
novajn fortatakojn kaj detruojn:

Prave vin brakumas pesimismo;
sed forpelu ĝin el viaj mensoj
kaj forkuru ĝia de abismo;
kredu, fidu de l' esper' al pensoj.

Ili semas de l' estont' la bonon;
pens' kaj volo la estonton kreas.
Sekvu do, gefratoj, la admonon,
de la bon' la semoj ne pereas.

12/05/1945

Reformador, dec/1947

Kredo Racia

Kompaton sentas mi al la dubantoj
pri Dio kaj pri l' vivo post la morto,
ĉar mi memoras kiel nekredantoj
ignoras veran kaŭzon de la sorto.

Mi ankaŭ, en junecaj miaj jaroj
la kredon perdis je amanta Dio;
sensencaj ŝajnis al mi la altaroj,
la preĝoj kaj la rit' de l' religio.

Racio mia dubis pri l' misteroj
de l' kredo, kontraŭanta la sciencon;
pri viv' eterna mortis la esperoj,
sed ĉiam ŝatis mi la konsciencon.

Kaj ĝi, morala la imperativo,
komencis demandadi la racion
pri la kial' de l' mondo kaj de l' vivo,
kaj laŭdis de l' natur' la harmonion.

Mi vidis ke Ĥemio kaj fiziko
posedas leĝojn saĝajn kaj eternajn,
kaj leĝojn havas vivo de la psiko,
regantajn fenomenojn la internajn.

Laŭ firmaj leĝoj movas sin la steloj;
saĝegajn leĝojn ĉiu korp' obeas;

en ĉio estas idealaj celoj:
ke Saĝ' ekzistas, ja neniu neas.

Ekzistas Saĝ' eterna, °senlimita;
ĝi estas Dio, plej potenca Forto,
Kreanto bona, viva lum' spirita,
kaj Vivo daŭras eĉ post karna morto.

Ĉi tiu kono venkis dubon mian,
ĝis iĝis mia konvinkanta kredo
kaj anstataŭis kredon eklezian
en tre feliĉiganta min procedo.

Psikismo, Spiritismo jam surtere
konvinkis min kaj helpis ĉe la morto;
mi tion jam konfesis[1] kaj sincere
utila volas esti mia vorto.

07/06/1945

Reformador, dec/1949

1 Temas pri la nefinita artikolo *Pri Dio kaj pri senmorteco*. Ismael Gomes Braga verkis pri ĝi en *Reformador* (feb/1938); Aleksander Korĵenkov donas kompletan superrigardon en *Homarano* (2-a eld.: Sezonoj/LEA, 2011).

Originalaj Poemoj en Esperanto

La vivo estas bela[1]

La vivo estas bela,
se lumas stelo hela:
dum tago varma suno,
dum nokto milda luno.

Kaj kio estas suno
kaj luno por la tero,
por nia koro estas
la amo kaj espero.

Esperanto sem Mestre (2-a eld.: FEB, 1944)[2]
Informilo de Esperanto-Rondeto de Torquato Severo, jan/1946

Ne ekzistas sur la tero...

Ne ekzistas sur la tero
pura bono sen malbono:
tial estas la sufero
de plezuro la aldono.

Granda estas tiu viro,
kiu nobla en deziro,
firma estas en laboro,
kaj ne vendas sin pro oro.

Esperanto sem Mestre (2-a eld.: FEB, 1944)

1 Vidu ankaŭ la Ido-poemon *Du Astri*.
2 La tri poemoj aperis ankaŭ en ĉiuj postaj eldonoj de *Esperanto sem Mestre*.

La nobla homo ĉiam…

La nobla homo ĉiam
estu bona, helpema![1]
Li estu pardonema,
sen deziro venĝema!

De l' patrujo bona filo
faras al ĝi la promeson:
labori por ĝia brilo,
kaj helpadi la progreson.

Esperanto sem Mestre (2-a eld.: FEB, 1944)
Esperanto-Aldono, n-ro 21 (feb/1966)

1 La poemo *Nobla estu la homo!*, de Goethe, en esperantigo de Lorenz, komenciĝas jene: *Nobla estu la homo, / bona, helpema!* (*Diverskolora Bukedeto*. FEB: 1941 (1-a eld.); 1987 (2-a eld.)).

Novjara Saluto 1943

Miaj dezirespримoj por la *nova jaro.*
Tre estimata Samideanaro:
Jen en l' abismon de la temp' falinte,
jam malaperis ree unu jaro,
kaj sin prezentas nova, alveninte.
Al la homaro kion ĝi alportas?
Ĉu l' justan, ĉie deziratan pacon?
Ĉu l' civilizacio, kiu mortas,
ricevos nun la reviviĝ-donacon?
Neniu homo tion povas diri,
ĉar ne ekzistas nun profeto vera;
ni povas tamen pensi kaj deziri:
La Nova Jaro estu pli prospera!
Deziras mi ke bonaj tagoj venu,
kaj al vi ĉiuj konservante sanon,
vin Dio feliĉigu, kaj Li benu
la noblan menson kaj l' agantan manon.

S. Feliciano, Rio G. do Sul, la 1-an de Januaro de 1943ª.

O Brasil Esperantista, n-ro 343–345 (jan–mar/1943)

Al la Novjaro 1944

Kiam ajn alvenas nova jaro
al la nuna, jam malnova mondo,
kun esperoj novaj la homaro
ekrigardas de la temp' al ondo.

Dek du jarmonatoj reforpasis,
detruinte multajn esperflorojn;
multajn ĝemojn ili ja postlasis
al la homoj, kaj vunditajn korojn.

Kreskas la mizero kaj la tomboj,
drinkas Mars' ankoraŭ homan sangon
de la neĉesantaj hekatomboj;
plorvualas Paco sian vangon.

Tamen ni ne malesperu, fratoj!
Post la vintro venos la printempo,
kaj post la kruelaj militbatoj
venos la aŭror' de nova tempo.

Ne perdiĝas sur l' Estont-altaro
la oferoj de l' heroaj manoj;
volu Di', ke en ĉi nova jaro
donu fruktojn la pripacaj planoj!

Pernambuco Esperantista, n-ro 54 (jan/1944)
Komunikoj, n-ro 32 (15/12/1983)
Fotokopio de poŝtkarto (?) el Municipa Biblioteko Francisco Valdomiro Lorenz

Al la Novjaro 1945a

En la skrib' de l' Temp' aperis komo
inter du jarspacaj periodoj,
kiel nuba viziul-fantomo
de teruraj, sangaj epizodoj.

Tiu komo finas la laboron
de l' monatoj dek du forpasintaj,
kvazaŭ haltigante la furoron
de l' militmovadoj labirintaj.

Multajn ŝanĝojn la pasinta jaro
faris en la landa kart' eŭropa;
sur la tero, en l' aer', sur maro
fluis sang' en batalad' ciklopa.

Tamen de l' viktimoj la suferoj
liberigis landojn kun popoloj;
brilas jam pli hele pac-esperoj,
detruiĝas la sklavec-idoloj.

Di' permesu, ke la nova frazo
de la Tempo, en la nova jaro
estu de prospera pac' la fazo
kaj de l' unuiĝo de l' homaro!

Pernambuco Esperantista, n-ro 62 (sep/1944)

Al la Deka Brazila Kongreso de Esperanto

Jam ses jarojn nigraj nuboj
de milit' super la tero
pendas, kun terur-inkuboj
de malam' kaj malespero;
kiom da ruinaj ruboj,
mortigado kaj mizero!

Turmentata la homaro
sur la tuta ter-surfaco,
en l' aero, sur la maro,
petas Dion pri l' kuraco
de l' vundar' kaj pri l' deklaro
de baldaŭa, justa paco.

Tamen ne mankis dum kvindek ok jaroj
homoj de noblaj ideoj kaj faroj,
kiuj neniam l' esperon perdadis
pri la estonto, kaj multajn persvadis
pri l' maniero transformi la mondon
en familian, kontentan homrondon.
Ĉar la nacioj sen interkompreno
vivas, aperas malama la sceno.
Veran fratamon ja ĉiuj forgesas,
eĉ Krist-instruojn se ili konfesas.
Lingvaj muregoj naciojn dividas:
tial popolo alian ne fidas.
Ĉiu l' aliajn kompreni se povus,

ili ĉi tiujn muregojn formovus.
Tio ja lingvon komunan postulas;
tamen la mondo obstaklon formulas:
Lingvon patrinan hom' ĉiu estimas;
perdi ĝin la patriotoj do timas.
Unu nacio se volus ke ĝia
lingvo fariĝu la internacia,
ĉiuj aliaj al tio oponus,
ĉiu potenco la sian proponus.
— Sed jam solviĝis la granda problemo
per Esperanto, plej bona sistemo,
artefarita kaj tial neŭtrala,
riĉa, facila, regula, lojala.

Jam vivas Esperanto, parolata
de multaj homoj kaj en ĉiuj landoj,
en korespondo estas ĝi uzata,
en libroj, en kongresoj, propagandoj!
Ĉi tiu lingvo, verko de genio,
ne celas de naciaj lingvoj morton;
per ĝi la tuta mond' en harmonio
atingi povos pli feliĉan sorton.
Naciaj lingvoj ĉiuj sin konservu,
uzate ĉiam inter samlandanoj,
kaj Esperanto kiel lingvo servu
en la rilatoj kun la fremdlingvanoj.
“Sur la neŭtrala lingva fundamento,
jam komprenante unu la alian,
popoloj ĉiuj faros en konsento

feliĉan, grandan rondon familian."
— Sufiĉos lingvoj du por l' edukitoj:
la mempatruja kaj l' internacia;
kaj ili servos por ĉiuj orbitoj
de nia vivo civilizacia.
De Esperanto la Ide' Interna
do estas mondfratecon realigi,
ĉar volas mense ĝi, "latin' moderna",
popolojn ĉiujn amikece ligi.
Internacian lingvon jam projektis
tre multaj el la klaso sciencista;
sed sole Zamenhof ĝin arkitektis
kaj ĝin konstruis kun fervor' persista.

Laŭdante ni Lian kreaĵon genian
kaj Lian amplenan, subliman bonkoron,
honoru sincere, sed noble-fiere
de l' Majstro amata l' eternan memoron!
Imitu ni Lian, tre filantropian
por venko de l' Bono senlacan laboron!
Leviĝu respekte kaj ni senescepte
de Zamenhof brilan proklamu la gloron!

Do vivu kun san' Lia verk', Esperanto,
kaj Dio favoru ke bele ĝi floru
en pacaj rilatoj, en prozo kaj kanto,
por Bon' laboru, kaj ĉiam valoru!
Kaj Dio plenbenu ĉi tiun Kongreson,
donante al ĝiaj laboroj sukceson,
servantan la pacon kaj veran progreson,

plej gravan de l' tuta homar' intereson!
De nia Kongres' al la alta Patrono[1]
respekte dankante, ni voku: “Li vivu!”
L' apogo bonvola de Lia Persono
de l' rond' Esperanta ĝojsentojn motivu!
Kaj vivu l' anaro de l' du Komitatoj,
kaj vivu la aro de l' Ge-Kongresanoj,
kaj ĉiuj pro l' pac' batalantaj soldatoj,
kaj tuta la nombro da Samideanoj!

Vivu! Vivu!

Al la Deka Brazila Kongreso de Esperanto: FEB, 1945.
Pernambuco Esperantista, n-ro 70 (maj/1945)
Anais do XV Congresso Brasileiro de Esperanto: Niterói-Esperanto-Klubo, 1957.
Almanako Lorenz 1981
Neforgeseblaj Skribaĵoj de Ismael Gomes Braga: BEL, 2012.

1 La “alta Patrono” de la Deka Brazila Kongreso de Esperanto estis Getúlio Vargas.

Al la Novjaro 1946a

Fine, post longa, sesjara, freneza regado
de la kruela, detrua milita megero,
falis la kontraŭhumana, barbara ĥimero
de Mussolini, de Hitler kaj moŝto Mikado.

Nova nun jaro alvenas, sen tinto de spado;
mildan rideton ĝi portas, de bona espero
pri l' malkreskado de l' peza homara sufero,
pri bonsukceso de paca labor' kaj persvado.

Petu ni Dion ke tiun laboron Li benu!
Ĉiuj nacioj fratece pro Bon' kunlaboru!
Ĉiuj justecon kaj amon kaj veron honoru!

De l' pasinteco erar' la progreson ne ĝenu!
Nova la jar' de feliĉo do estu portanto
al la homaro kaj ĝia servant', Esperanto!

Pernambuco Esperantista, n-ro 77 (dec/1945)
O Brasil Esperantista, n-ro 380–382 (okt–dec/1945)
Fotokopio de poŝtkarto (?) el Municipa Biblioteko Francisco Valdomiro Lorenz

Dum miaj sepdek kaj kvar jaroj...

Dum miaj sepdek kaj kvar jaroj
de vivo sur ĉi tiu tero,
mi ofte ĝemis pro sufero
kaj pro la malsukcesaj faroj.

°Enuis min de l' Fat' amaroj,
sed ĉiam gvidis min l' Espero
pri l' venko de l' justec-afero,
eĉ malgraŭ la perfortaj baroj.
De l' vivo venas la vespero,
jam ekgriziĝas miaj haroj;
amikoj multaj kaj najbaroj
jam estas en la land' de l' Vero.
Mi ankaŭ el la mond-mizero
foriros al postmorta afero.

El letero de Lorenz al Francisco Schaden (30/12/1946)
En *Leteroj de Niaj Pioniroj*, ĉapitro de *Esperanto – Baza Kurso*, de Marco Antônio Ferreira Teixeira (UFSC, 2005)

Al la Ĵurnaleto *Suda Stelo*

Sur la mensa firmamento
de la lumoj de Brazil'
distingiĝas Frata Sento
kaj Pacam' per sia bril'.

Tial menso la Brazila
Esperanton ŝatas tre,
ĉar ĝi estas tre utila
al progres' kaj pacide'.

Lingvo bela ĝi, neŭtrala,
kaj facila sen kompar',
komprenilo ideala
estas jam por la homar'.

Sub la flag' de l' Verda Stelo,
post la sanga katastrof'
devas gvidi el Babelo
nin la Verk' de Zamenhof.

Vivu, kresku, Verda Stelo,[1]
brilu sur ĵurnal-paper',
nin konduku al la celo,
sur la vojo de l' Esper'!

Suda Stelo, 1-a fazo, n-ro 3 (okt/1947)
Suda Stelo, 3-a fazo, n-ro 1 (maj–jun/1994)

1 Eble ĉi tie devus esti *Suda Stelo*, ĉu ne?

Al la Dekdua Brazila Kongreso de Esperanto[1] [2]

Printemp' revenis nun al la Naturo,
alportas belajn florojn, mildveteron;
viglecon ĝi enblovas en l' aeron,
de Novaj Agoj estas ĝi aŭguro.

Al Belo Horizonte, en flu-kuro,
la Temp' konfidis l' Esperant-aferon,
por peni realigi la Esperon
de helpa lingvo por homar-kulturo.

Kunvenas en Dekdua nun Kongreso
Brazilaj Geamikoj de l' laboroj
por monda Paco, por pli noblaj moroj,
por vera Libereco kaj Progreso.

Laboru, Esperantistar', sen ĉeso,
de l' Ideal' por riĉaj la trezoroj;
memoru pri iliaj altvaloroj,
konfidu firme pri l' labor-sukceso.

Mi kun respekto ĉiujn Vin salutas,
Organizintoj de l' Kongres' Dekdua.

1 Mi ne trovis poemon al la *Dekunua* Brazila Kongreso de Esperanto, kvankam ĝi ekzistas (aŭ ekzistis), laŭ letero de Lorenz al Francisco Schaden, sendita la 9-an de Novembro 1947: "La XIa Kongreso Esperantista havis bonan sukceson. El nia ŝtato ĉeestis tie sroj Ary Zamora kaj Boris Eston el P. Alegre. Mia versa saluto estis deklamita de fraŭlino Norma Guerrini." [letero el la kolekto de Instituto Egon Schaden]

2 Akompanas la originalon portugallingva versio de J. B. Mello e Souza, kiun mi ĉi tie ne reproduktas.

Benita estu la labor' konstrua!
Al Vi dankemon la anar' tributas.

La manojn de la Gesamideanoj
mi premas kaj konsilas: Ni laboru
kun fid', kaj tiel nian Majstron gloru,
ĉu komencantoj, ĉu jam veteranoj.

Vivu Brazilo! Vivu Esperanto!

Brazila Esperantisto, n-ro 430–431 (jan–feb/1950)
Fotokopio de faldfolio (?), fine de la tajposkripto de Brazila Antologio Poezia (ekzemplero el Biblioteko Ary Zamora)

Kristnaska Donaco
(Teatraĵeto)

Personoj: tri knaboj
Paŭlo (riĉa), Karlo (preskaŭ riĉa),
Johano (malriĉa).

Paŭlo (kantas; melodio de la
himno "La Espero"):
En la mondo venas ama sento,
proksimiĝas ja kristnaska tago;
bonaj homoj ĝoju, en konsento,
ĉe l' kristnaska arb', de l'
pac' la flago.

Karlo (alvenas kaj parolas):
Kial, Paŭlo, vin tia ĝojo estras?
Paŭlo (respondas):
La patrino al mi monon donis
por aĉeti, kiu taŭga estas
por l' arbeto, kiun mi proponis
(Li kantas):

La kristnaska arbo ore brilos,
havos nuksojn, pomojn, horloĝetojn;
veran arbararbon ĝi similos,
sed afektos de l' natur' sekretojn.
Johano (venas, rapidirante):

Bonan tagon!
Paŭlo: Kien vi rapidas?
Joh.: Al la apotek'.
Karlo: Ĉu malsano?
Joh.: Jes, recepton portas mi, vi vidas.
Paŭlo: Iru ni en via akompano.

Joh.: Dankon, sed mi devas urĝe kuri,
la patrinon vane ne teruri.
(Li forkuras; Paŭlo kaj Karlo
restas kaj interparolas.)
Paŭlo (al Karlo):
Ĉu vi konas panjon de Johano?
Karlo: Jes, vidvin', ŝi estas tre malriĉa;
ofte tie mankas eĉ la pano
por du filoj kaj ŝi, malfeliĉa.
Paŭlo: Karlo, nun, en tiu ĉi momento
mia kor' al mia mens' parolas,
kaj mi eĉ decidis jam, sen pento,
ke l' kristnaskan arbon mi ne volas.
Mon' ĉi tiu estu ja donaco
por la panjo de kolego nia;
servu ĝi al ŝi, por la kuraco!
Karlo (montrante monon):
Kune kun ĉi tiu mono mia!
(Ambaŭ kantas):
Nia arb' kristnaska jam ne brilos,
ĝi ne havos nuksojn nek misteron;

sed por ĝi donita mon' utilos
venki la malsanon kaj suferon.

Paŭlo (al Johano alkuranta):
Niaj panjoj donis al ni monon
por kristnaska arb', kutimo pia;
ni pli grandan volas fari bonon
kaj donacas ĝin al panjo via.
(Ili donas la monon al Johano,
ĉirkaŭbrakante lin.)

Johano:
Koran dankon, ho kolegoj karaj!
Dio pagu vin, ho noblaj koroj!
Nun forflugos la suferoj, la amaraj,
de l' patrin', silentos la doloroj.

FINO.

Brazila Esperantisto, n-ro 464–465 (nov–dec/1952)

Patro Nia

Patro nia, kiu estas
Vi en alta la ĉielo,
sed al ni Vin manifestas
en la Bono, Ver' kaj Belo:

Estu sankta Via Nomo;
Via Regno al ni venu:
Viajn Leĝojn ĉiu homo
kun fidel' obei penu.

Estu Via Vol' farata
de estuloj ĉiuj teraj,
kiel estas plenumata
ĝi en mondoj la eteraj.

Nian panon al ni donu,
Patro, nun kaj ĉiujn tagojn.
Niajn ŝuldojn Vi pardonu,
ĉiujn niajn malbonagojn.

Ĉar ni al ŝuldantoj niaj
ankaŭ el la kor' pardonas,
kiel al kredantoj piaj
ĉiam fari Vi ordonas.

Via Mano nin protektu,
kiam nin atakas tentoj.

Al la Bono nin direktu,
ke ne peku niaj sentoj.

Estu bonaj niaj pensoj,
niaj agoj, niaj vortoj;
ne delogu nin la sensoj,
gvidu nin Spiritaj Fortoj.

Reformador, jan/1948[1]

1 Ĉi tiu parafrazo de la fama preĝo mise aperas ankaŭ en *Mediuma Poemaro* (FEB, 1972), kvankam *Reformador* klare indikas, ke temas pri poemo ne mediume ricevita de Porto Carreiro Neto, sed mem verkita de vivanta Lorenz!

Laŭdo al Dio

(Parafrazo de “A Melodia Sublime”,
32-a ĉapitro de “Os Mensageiros”.)[1]

Plej Alta Sinjoro de ĉiuj vivmondoj,
de ĉiuj estuloj plej bona Sinjoro,
akceptu la dankon, sendatan sur l' ondoj
vibrantaj de nia humila adoro.
Akceptu la preĝon de Viaj gefiloj,
ĝin portu al Vi de l' spirit' la flugiloj!

Ni petas bonvolu patrame nin beni,
bonvolu firmigi en ni la esperon,
la puran de l' Viv' Idealon subteni,
ke l' bonon ni amu, la belon, la veron.
Ni pensu dankeme pri Vi je l' mateno,
ni pensu pri Vi ĉe la nokto-alveno.

Al Vi de la vivo ni dankas la ĝojon.
Ho Patro plej sankta de l' Amo, nin gvidu
tra l' tentoj, kaj montru al ĉiuj la vojon;
al via protekto ni ĉiam konfidu!
Ni estas ja Viaj kreitoj, ho Dio,
radioj de Via saĝec' kaj racio.

1 *Os Mensageiros* estas libro de la mediumo Francisco Cândido Xavier (Chico Xavier), atribuita al la spirito André Luiz. La 32-a ĉapitro enhavas kantotekston atribuitan al la spirito Ismália. La tuta libro legeblas en Esperanto, en traduko de Gonçalo Neves (*La Senditoj*: FEB/Lorenz, 2017).

Instruu nin, kiel malkovri ni povas
la grandajn trezorojn ja, kiujn Vi gardas
de l' Viv' en profundoj, por ni! Ilin trovas
serĉant', se li firme antaŭen rigardas.
Helpate de Vi, ekbruligu ni nian
lanternon, por trovi la celon racian.

Sinjoro, ni paŝas kun Vi en l' Eterno;
en Vi ni moviĝas; do nian laboron
Vi benu, lumigu nin en la interno,
ke Viajn komprenu ni Amon kaj Gloron!
Brilegu en ĉiuj ni Via hellumo,
fortigu nin ĝia ĉiela parfumo!

Emanu el Via benado, ho Dio,
al niaj okuloj perfekta klareco,
al niaj oreloj spirit-harmonio,
al niaj piedoj kaj manoj vigleco.
Kreitojn ja ĉiujn sur voj' evolua
Vi gvidas per Lumo de l' Amo konstrua.

En l' Amo Sublima de l' Ter' kaj Ĉieloj,
en vera beleco de ĉiuj vivantoj,
en la progresado de l' aĵoj kaj steloj,
de ĉiuj estuloj en voĉoj kaj kantoj
Vi estu laŭdata, kun pia fervoro,
de l' mondoj Sinjoro!

Heroldo de Esperanto, n-ro 1059 (15/12/1946)

Venu la Regno de Dio!

“Alvenu la Regno de Di' al la Tero!”
Mi preĝis sincere, kaj jenan mi havis
vizion, de kiu la bildo min ravis
pro sia belec' kaj feliĉo-konkero.

En ĝi ne aperis sopir' de mizero,
kaj homo neniu malsatis aŭ sklavis;
frateco homara ja ĉiujn jam savis
per rajto al vivo kaj al la prospero.

Ne estis jam kastoj, nek hom-ekspluatoj,
sed ĉiuj laboris kaj estis gefratoj,
la leĝojn de l' vivo kaj amo konante.

La bild' malaperis de mia vizio,
sed lasis l' admonon: Ke l' Regno de Dio
alvenu, laboru, gefratoj, konstante!

Boletim de Esperanto, mar/1953

Koncentriĝo

Kiam mia penso koncentriĝas plene
sur spirita vivo, pie, en silento,
for de la personaj ĝojo kaj lamento,
supersensa lumo banas min serene.

Savo de l' problemoj brilas senkurtene,
kiam plilarĝiĝas de fratec' la sento;
en l' eterna Plano ĉiu elemento
kaj estaĵoj ĉiuj staras unuĉene.

En la plej profunda de la mens' atomo
lumas l' ideala bildo de la Homo,
la spirita filo de l' eterna Dio.

Rigardante tiun bildon, en medito,
tre feliĉa sentas mi min en spirito,
kiel viva er' de l' Universkonscio.

Esperanto-Aldono, n-ro 50–51 (jul–aŭg/1968)[1]

1 Mi ne trovis pli fruan fonton; supozeble tajpaĵo aŭ manuskripto iel atingis la redakcion de *Esperanto-Aldono*.

Miaj Saŭdadoj

La fama poeto Casimiro de Abreu iam kantis:

“Ho, kun kiomaj saŭdadoj
mi pensas pri l' vivaŭroro,
l' infana aĝo de oro,
ha! ĝi ne revenos plu!”[1]

Mi parodias:

Min eĉ en miaj *okdek* jaroj
vizitas ofte la saŭdadoj
pri oraj revoj, pensoj, faroj
pasintaj, kaj pri l' kamaradoj
fidelaj en la pacbatalo
por nia sankta Idealo.

La mort' de l' Majstro, la militoj
detrui ĝin neniam povas.
Laboru ĉiuj, sen hezitoj,
por Esperanto, kiu movas
de l' homoj ĉiun noblan koron.
Al Zamenhof ni kantu gloron!

Brazila Esperantisto, n-ro 476–477 (nov–dec/1953)
Tajpaĵo el la arkivo de Jandira Lorenz

1 La poemo *Miaj ok jaroj*, esperantigita de Lorenz, troveblas en *Diverskolora Bukedeto* (FEB: 1941 (1-a eld.); 1987 (2-a eld.)) kaj en *Brazila Antologio Poezia* (Lorenz, 1994) — la du versioj ne estas tute identaj. En ĉi tiu libro troveblas ankaŭ Ido-traduko de Lorenz.

Al la Dekkvara Brazila Kongreso de Esperanto

Mens' de l' *homo* regas la Naturon,
ĉar la pensojn li paroli povas;
kaj la lingvo formas la kulturon,
ĝi edukas, sentajn korojn movas.
Lingva malsamec' malhelpojn semas
kaj malamon inter la nacioj;
Esperanto pri la paco temas,
ne pri ŝovinismaj ambicioj.

La malam' antikva de l' popoloj,
per nesaĝaj pensoj konservata,
ekperceptis sonon de l' paroloj
pacaj pri l' tutmonda Amo frata.
Venis en la mondon nova sento
per disvastigad' de Esperanto;
ĝi en Okcident', en Oriento
sonis en kongresoj, preso, kanto.

Eĉ dum mondmilitoj du ne mortis
tiu lingvo, kvankam ĝi suferis
persekutojn; ĝi esperon portis
ĉien, kaj neniam malaperis.
Do kun freŝaj fortoj ni laboru,
esperantistar' de l' tuta Tero.
Ke nun jam neniu plu ignoru,
ke ni pacon semas, kun espero!

Anais do XIV. Congresso Brasileiro de Esperanto – jan/1954. Curitiba: 1958.
Almanako Lorenz 1981

Tradukita Poemo en Ido

El la portugala

Casimiro de Abreu
(1839–1860)

Mea Ok Yari[1] [2] [3]

Quanta saudadin me havas,
ho! pri mea viv-auroro,
pri l'tempo plu kar kam oro,
qua esas pasinta ja!
Quant'amo, revi e flori
en l'ombro dil bananieri
e sub nia oranjieri
existis en jorni ta!

Quante bel diin l'existo,
kande ol vekas, eniras!
Omno quon l'anmo respiras,
esas inocent e pur.
La maro esas klar lago,
la cielo — blua mantelo,

1 Pri tiu poemo kaj la reago de Louis Couturat al ĝi legu en *Esperanto kaj Ido: malsamaj vojoj sur Parnason*, de Gonçalo Neves (Eldonejo Drako, 2019). Couturat kaptis la okazon por moki la Esperanto-poetojn, sed Lorenz senprobleme tradukis la saman poemon ankaŭ al Esperanto (du neidentaj versioj troveblas en *Diverskolora Bukedeto* (FEB: 1941 (1-a eld.); 1987 (2-a eld.)) kaj en *Brazila Antologio Poezia* (Lorenz, 1994)).

2 Vidu ankaŭ la originalan poemon *Miaj Saŭdadoj*.

3 En la Ido-poemoj de Lorenz la (ne)uzo de apostrofo ĉe elizio estas idiosinkrazia kaj nekonsekvenca, sed mi decidis konservi ĝin, kiel historian kuriozaĵon.

la mondo — revo e mielo
e la vivo — joyo nur.

Qua auroro, suno, vivo,
e qua nokto melodioza
en ita evo joyoza,
tempo sensorga, senpen'!
La cielon brodas la steli,
la sablon kisas l'ondaro,
la luno kisas la maro
e la tero odorplen'.

Cielo di mea printempo,
ho vi dii dil yuneso!
La ridetoza dolceso
neplus[4] retrovenos, ve!
Ne konocante chagreni,
me havis joyi sen fino,
men kisadis la fratino,
la matro karezis me.

Libera filio dil monti,
me tra la kampi[5] kuradis
e kontenta me iradis

4 *Neplus* [anstataŭ *ne plus*] eble ne estas kompost-eraro. En Ido primitiva oni uzis la formon *neplu* anstataŭ *ne plus*, sed la 20-an de Aŭgusto 1910, per sia decido 93, la Akademio adoptis la varianton *ne plus* anstataŭ *neplu*, kiu iĝis arkaika (*Progreso*, n-roj 31–32, Oktobro 1910, p. 386). Tamen, jam antaŭ tiu decido, kelkaj kunlaborantoj de *Progreso* eksperimente uzis la formon *neplus*, post kiam Paul de Janko proponis ĝin, kaj eble kelkaj plu uzis ĝin, pro alkutimiĝo aŭ neatento, post la decido... [noto de Gonçalo Neves]

5 *agri*

nudabrakia e senshu'.
En chemizo[6] apertita
me serchis la aquofali
e volis kaptar la ali
di bel papilioni blu.

En ita tempi felica
ofte me koliis pitangi,
klimis arbori pro l'mangi,[7]
ludis sur bordo maral.
Me pregis la bona Deo,
a la cielo sempre fidis,
irante dormar me ridis,
kantis ye l'horo vekal.

Quanta saudadin me havas,
ho! pri mea viv-auroro,
pri l'tempo plu kar kam oro,
qua esas pasinta ja!
Quant'amo, revi e flori
en l'ombro dil bananieri
e sub nia oranjieri
existis en jorni ta!

Correio do Povo, 31/10/1913

6 *kamizo*

7 En *Correio do Povo* la vortoj *mangi* kaj *pitangi* aperas inter citiloj, ĉar Lorenz konsideris ilin neologismoj. La vorto *mango* fakte jam estis aperinta, sed ĝi ankoraŭ ne estis oficiala. Kurioze, ke Lorenz ne tiel markis la multe pli obskuran vorton *saudadin*!

Originala Poemo en Ido

Du Astri[1]

La mondo esas tre bela
se lumas astro fidela:
dum jorno la varma suno,
e nokte la pala luno.

E to, quo esas la suno
e luno por nia tero,
por nia spirito esas
la pur'amo e l'espero.

Astro Idista, n-ro 1 (jan/1914)

1 Vidu ankaŭ la Esperanto-poemon *La vivo estas bela*.

Tradukitaj Poemoj en Volapuko

El la germana

Friedrich Beck
(1809–1888)

Klem.[1]

Peplepadön äso plo täv ya lätik
vädüpo ä nen kudo betikön,
atos binos ba te mod et verätik
läbädami su kapi al dugön.

Pavipölos oifugos vo meni;
pobölüdos, kelosi bedrenol;
fät libiko te lugivom[2] lebeni,
kel movienom, if omi sükol.

Kodem ba su valik steifam talik
seistom, ed ekipöl no livom,
deno ele nestümöl läbi alik
e nidi, ful omas polegivom.

Volapükan Belgänik, sep/1896

1 Vidu en la antaŭparolo pliajn informojn pri la volapukaj poemoj. La prilingvaj piednotoj estas de la nuna ĉifalo, Hermann Philipps.

2 En malnova Volapuko, la verbo *lugivön* signifas nur *pruntedoni* (germane *ausleihen, leihen, verleihen*). En formala germana, tiu verbo estas sporade uzata ankaŭ en figura senco, signifante *doni, donaci*. Mi ofte rimarkis, en la verkoj de germanaj volapukistoj el la 19-a jarcento, ke ilia Volapuko estis uzata en tre germaneca maniero, do eble oni ne tro kritiku la dubindan uzon de *lugivön* fare de Lorenz.

Klem.

Pepreparön äsä pro täv ya lätik
aldüpiko ä nen[1] tuo kudön,
ba te atos binos[2] et mod verätik:
läbi sui oka kap ad dugön.

Pavipölos ai fugos[3] vo meni;
e poperos, kelosi bedrenol;
fät lugivon[4] libavilo te beni,
kel mofliton, üfä[5] oni sukol.

Deät ba su valik steifam talik
leseaton,[6] keli i no livon;
if nestümol ye läba givis valik,
ba ful ona, ole polegivon.

Adapto al reformita Volapuko
Manskribaĵo el la arkivo de Mi̯haelo Bento

1 *nes* (*nen* ne estas uzebla antaŭ infinitivo)
2 *binon* (*binos* restis el la versio en malnova Volapuko)
3 *fugon* (*fugos* restis el la versio en malnova Volapuko)
4 En reformita Volapuko la verbo *lugivön* ne ekzistas; *pruntedoni* estas *prünön* (*doni* estis ĉiam simple *givön*) [vidu ankaŭ la noton ĉe la antaŭa poemo]
5 *üf* (Lorenz uzis la konjunkcian finaĵon *-ä*, sed sufiĉas *üf*)
6 La verbo *leseatön* signifas germane ne *liegen* (kuŝi), sed *lagern* (tendumi).

El la rusa

Miĥaíl Lérmontov[1] (1814–1841)

Plek.[2]

In liedik[3] minut lifa,
if[4] lüg blöti[5] jekom,
pleki milagik lan oba
linedälo plekom.

Binom valüd sanigivöl
in vödem at lifik,
natemöl nämi dalivöl
e jönäli sanik.

E dods, etomöl lani, nu
de ob faloms fagik,[6] —
e drenob, e kredob denu,
e vedos leitik.[7]

Volapükan Belgänik, sep/1896

1 Михаи́л Ле́рмонтов
2 Esperanto-traduko de Lorenz troveblas en *Diverskolora Bukedeto* (FEB: 1941 (1-a eld.); 1987 (2-a eld.)).
3 *glümik* (*liedik* taŭgas nur por priskribi homon, ne momenton)
4 *ven*
5 *ladäli* (*blöt* estas nur *brusto*, la korpoparto, sen metafora senco)
6 *falön* ne estas uzebla en la celita metafora senco, kaj *fagik* estas adjektivo, ne adverbo. Simpla alternativo estus *binoms fagik*.
7 *nefikulik* (*leitik* (malpeza) ne havas la celitan metaforan sencon)

Plek.

In liedik[1] minut[2] lifa,
if[3] lüg in blöt[4] lagon,[5]
pleki milagik lan oba
ninälüno[6] sagon.

Binon nämäd vo benüköl
in vöds at lifälik;
natem onas, lelivüköl
binon so keinik!

Dots, etomöl lani, anu
falons[7] ya, fagio;
drenob, e lekredob dönu,
peleitükölo.[8]

Adapto al reformita Volapuko
Manskribaĵo el la arkivo de Miĥaelo Bento

---

1 *düföfik* (*liedik* taŭgas nur por priskribi homon, ne momenton)

2 *timül* (en moderna Volapuko *minut* estas nur *minuto*, ne *momento*, sed en malnova Volapuko tiu kromsenco ekzistis, almenaŭ laŭ la fama vortaro de M. W. Wood)

3 *ven*

4 *ladäl* (*blöt* estas nur *brusto*, la korpoparto, sen metafora senco)

5 *lagön* (pendi) ne havas la celitan metaforan sencon. Simpla alternativo estus *binon*. Se ne konsideri la silabonombron, bona verbo estus *bedareigön* (*ven lüg ladäli bedareigon*).

6 *mu ninälo* (la finaĵo *-ün* estas uzata nur por adjektivoj)

7 *falön* ne estas uzebla en la celita metafora senco. Simpla alternativo estus *moikons e fagons*.

8 *esäditretülölo* (*leitik* (malpeza) ne havas la celitan metaforan sencon)

El la slovaka

Glorakanit.[1]
(Netakanit slovakik)

Kele lad suflamom plo verat sanik,
kel lifi kosekom gude vämenik,
ko neläb kel dreni kesena labom:
mane ut kanit at glori kanitom.

Kel vödi befölom nen tefod alik,
kel blibom egelo cödik, nobälik, —
keli jek no blekom, giv no ludugom:
mane ut kanit at glori kanitom.

Volapükan Belgänik, sep/1896

1 Esperanto-traduko de Lorenz troveblas en *Diverskolora Bukedeto* (FEB: 1941 (1-a eld.); 1987 (2-a eld.)).

Francisko Valdomiro Lorenz (1872–1957) estis fekunda kiel Esperanto-poeto: liaj poemaroj estas bone konataj, sed multo restis nur en periodaĵoj nun forgesitaj, aŭ eĉ ne estis publikigita.

La nuna postrikolto, pli ol 300-paĝa, arigas tiujn disajn poemojn: originalajn, mediumajn kaj tradukitajn — el 31 lingvoj!

ISBN 978-65-975688-0-2